

IL POPOLO
CINQUE

215V

中國報

12 1988



Familio de geedzoj-pilotoj

MA ĜEN

En Ĉinio estas familio de geedzoj-pilotoj. Edzo Ŝen Ĝiĉjun, malpli-ol-40-jara kaj 1.86 m. alta, okupiĝis pri aviado jam 20 jarojn. En 1987 li studis en Boeing-korporacio de Usono. Ĉiufoje, kiam finiĝis ekzameno pri aviado, lia rigora usona trejnisto laŭte diris al li: "Bone!" Nun Ŝen Ĝiĉjun estras la pilotan grupon de la Ŝjamen-a Aviada Kompanio de Ĉinio. Lia edzino Di Ĝjanŝiŭ estas la unua ĉina ĉefpilotino de Boeing-aviadilo kaj unu el la tri pilotinoj de Boeing-aviadilo en la mondo.

Kun la rapida disvolviĝo de la ekonomia konstruado de Ĉinio, tre viglas la servado de la Ŝjamen-a Aviada Kompanio. Ĉiusemajne la geed-

zoj aviadas 5-6 tagojn, po 6-7 horoj ĉiutage, kaj iam eĉ pli multe. Ofte okazas, ke apenaŭ la edzo surteriĝas, la edzino ekflugas. Kiam ili aviadas nokte, ilia solfilino Ŝen Ĝje distingas laŭ navig-lampoj, kiun aviadilon direktas la patro aŭ patrino. Ŝi tre deziras, ke ŝiaj gepatroj amuziĝu kun ŝi ĉe marbordo aŭ en parko en libertago.

Ilia vivo estas interesa kaj iliaj ĉambroj komfortaj, elegantaj kaj plenaj de vivetoso. Kiam iliaj parencoj aŭ amikoj gastas ĉe ili, la mastro preparas por ili pladojn. Pro okupiteco de la geedzoj la filino estas flegata de siaj geavoj. Vivante kiel emeritoj, la gemaljunuloj fieras pri siaj filo kaj bofilino kaj ĝuas feliĉon.

Filino Ŝen Ĝje pasigas sian naskiĝtagon ĉe siaj geavoj.






En parko

Di Ĝjansjū



Ŝen Ĝiĉjun antaŭ ekflugo





La geedzoj en la trejna centro de Boeing en Usono

Sur kolomba placo en Londono



ENHAVO

SUR LA KOVRILO:

Tibeta knabino

Foto de ŬANG GANG

VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ:

Familio de geedzoj-pilotoj

ĈINAJ ARTOJ:

Antikvaj bronzaĵoj de Ĉinio

Nova aspekto de Anjang

Fotoj de LI ZIŠING

SUR LA DORSKOVRILO:

[ĈINAJ POŜTMARKOJ]

Poŝtmarkaj blokoj el kvin pecoj

- 2 La 2-a IAKSTE en Pekino
- 8 Filatelo por Esperanto
- 10 SUR NIA LIBROBRETO: Pri «Atlaso de Insekta Morfologio»
- 11 POR KOMENCANTOJ:
Mi ŝatas promeni
La filo dommastrumas
- 12 ESP-NOVAĴOJ
- 14 Ningŝja—hejmloko de ĉinaj islamanoj
- 58 VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (24): Ĉarma pejzaĝo de Luŝan-monto
- 16 Scienc-populariga grupo sur altebenaĵo
- 18 Scio kaj interesa instruado
- 22 Ĝeng Ŝiju rompis tri mondajn rekordojn
- 20 Ĝaŭ Ĝanggŭang kaj har-panaceo
- 28 POR VIA SANO: Korpo-sanigaj metodoj (IV)
- 37 Redukti aĝon je dek jaroj (Novelo)
- 24 ĈINA LITERATURO:
Li Ju kaj aliaj ci-istoj de la Suda Tang-regno
Elektitaj ci-oj el la Suda Tang-regno
- 29 Suzhou (Poemo)
- 42 Ju Ŝiĝi, artisto de moderna teatro
- 30 ĈINAJ ARTOJ: Antikvaj bronzaĵoj de Ĉinio
- 46 Gasti ĉe monbaa vilaĝo
- 67 Anjang, la unua antikva ĉefurbo de Ĉinio
- 48 Ĉinaj sojfaboj
- 54 Impresoj dum vojaĝo en Ĉinio
- 50 Sindikato, labordono kaj disvolviĝo
- 44 ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Antikvaj steleoj de Ĉinio
- 52 ĈINAJ MOROJ:
Lignaj domoj de dong-oj
Ĉujge-oj de Dingĝou
- 56 KURANTAJ AFEROJ
- 9 26 41 KORESPONDI DEZIRAS
- 53 Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

LA 2-A IAKSTE EN PEKINO

La 2-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto okazis de la 10-a ĝis la 16-a de aŭgusto en Pekino. Tio estis kunveno, kie oni interŝanĝis scienc-teknikajn fruktojn per Esperanto en la internacia sfero.


La konferencon partoprenis pli ol 1400 sciencistoj, teknikistoj kaj

esperantistoj el 23 landoj. La nombro de la konferencanoj estis kvaroblo de ĝia unua konferenco julie 1986. Oni povas diri, ke la konferenco estis senprecedenca en la historio por praktiki Esperanton en scienc-teknika kampo. Propagandi Esperanton al sciencistoj kaj teknikistoj kaj sciencon kaj teknikon al esperantistoj, jen la celo de la kon-

ferenco.

La 7-taga konferenco okazis en la Pekina Lingva Instituto. La inaŭguron de la konferenco prezidis Jan Dongŝeng, speciala konsilisto de la Ĉina Akademio de Sciencoj (ĈAS) kaj prezidanto de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub ĈAS. En la inaŭguro

Diskuto pri medicino




parolis Lu Ĝjaŝji, vicprezidanto de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj honora prezidanto de la Sciencista-Teknikista E-Asocio sub ĈAS; Li Ĝenŝeng, vicprezidanto de ĈAS; Ĉen Haŭsu, vicministro de la Ministerio de Radio, Filmo kaj Televido; Ĝu Lilan, vicprezidanto de la Ŝtata Komisiono pri Sciencoj kaj Tekniko kaj famaj personoj en la scienc-teknika E-movado el Pollando, Japanio, Svedio kaj Hungario. Ili unuanime opiniis, ke Esperanto, kiel "internacia lingvo", estas taŭga al la reala vivo kaj apliki ĝin en la kampo de sciencoj kaj tekniko estas la komuna volo de la tutmonda esperantistaro.

La konferenca temo estas reciproka influo de sciencoj, teknikoj kaj socio. Oni diskutis, kian influon havas novteknika revolucio sur la nunajn ekonomion kaj socion, kiel novaj teknikoj ŝanĝas la ĉiutagan vivon de la homoj kaj kiamaniere oni utiligas la sciencajn fruktojn. Oni diskutis ankaŭ pri la sanprotektado kaj malsanpreventado, pri la novteknika revolucio kaj la postlerneja eduko. La konferenco donis premion "Verda Kosmo" al 13 ĉinaj kaj alilandaj famuloj, sciencistoj kaj intelektuloj, kiuj faris kontribuon por apliki Esperanton en la kampo de sciencoj kaj tekniko.

La 1-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, okazinta antaŭ 2 jaroj, proponis al la tutmondaj sciencistoj kaj teknikistoj kiel eble plej multe publikigi scienc-esplorajn disertaĵojn kaj raportojn en Esperanto. Ĉifoje oni prezentis entute pli ol 300 disertaĵojn al la konferenco, tio montris, ke Esperanto akiris riĉan rikolton en la kampo de sciencoj kaj tekniko. Ĝi pruvis, ke la E-movado en- kaj eksterlande havis novan progreson, pli kaj pli multaj sciencistoj kaj teknikistoj eklernis kaj uzas Esperanton, kaj ke oni kun pli kaj pli granda entuziasmo uzas Esperanton en la scienc-teknika interŝanĝo.

Post la inaŭguro komenciĝis fakaj kunvenoj: tiuj pri fundamentaj



Ĉina entomologo lo Chou (meze) interŝanĝas opiniojn kun junuloj.

sciencoj, praktikaj sciencoj, medicino, ekonomi-komerca interŝanĝo, lingvistiko, Esperanto-instruado k.a.

Alilandaj sciencistoj faris raporton en fakaj kunvenoj. D-ro Gábor Márkus, hungara industri-ekonomika konsilisto, prelegis pri "La rolo de teknika evoluo en la hungara ekonomia reformpolitiko", Christer Kiselman (Svedio) prelegis pri "La kultura signifo de la matematiko", Japana agronomo Sin'itiro Kawamuro prelegis pri "Proteino kiel nutraĵo".

Ĉinaj sciencistoj kaj teknikistoj voĉlegis sian disertaĵon. Gu Gongŝju, membro de ĈAS kaj geofizikisto, prelegis pri "Trovu pruvojn en terkrusta profundo por la tera scienco", Ĝjang Liĝin, membro de ĈAS kaj kemiisto, pri "Natura produktaĵo — hipokrelino", Ĉen Jong, esploristo de la Ŝtata Sismologia Buroo de Ĉinio, "Pri Tertremo en Ĉinio".

La konferenco invitis respondeculojn kaj fakulojn de iuj ŝtataj departementoj fari akademian raportojn, inter kiuj estis: "Ekspluatado de alta tekniko en Ĉinio", "Novaj teknikoj kaj faktoroj puŝantaj ilian evoluadon", "Perspektivo de la ĉina teknika merkato kaj ĝia kunlaboro kun aliaj landoj", "Spacaj sciencoj", "Esplorado en Antarkto", "Homoj kaj biosferoj" k.a.

Estas menciinde, ke la disertaĵoj prezentitaj al la konferenco ampleksis preskaŭ ĉiujn gravajn fakojn de la scienc-teknika kampo, kiaj matematiko, fiziko, kemio, astronomio, lingvistiko kaj ekonomia administrado. Ili manifestis la novan direkton kaj novan tendencon de la sciencoj kaj teknikoj kaj havas altan teorian signifon kaj praktikan valoron.

Krome, la konferenco aranĝis kunvenon, kie oni diskutis pri teknika transigo, ekonomia kaj negocaj kontaktoj k.a. ĉ. 500 personoj el ĉ. 100 kompanioj kaj entreprenoj



Pola kuracistino Barbara akceptas la premion "Verda Kosmo".

partoprenis la negotraktan kunvenon. 72 interkonsentoj estis subskribitaj.

La 16-an en la ferma kunveno, oni proklamis ok decidojn de la konferenco: fondi la ĉinan scienc-

teknikan E-unuiĝon kaj la internacian kontaktan reton pri sciencoj kaj tekniko en Esperanto; prepari la internacian E-centron pri scienc-teknikaj informoj kaj internacian scienc-teknikan E-universitaton; kolekti monon por redakto, traduko kaj eldono de Esperantaj scienc-teknikaj legaĵoj; publikigi elektitajn disertaĵojn de la 2-a konferenco; okazigi la 3-an Internacian Akademian Konferencon pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto de la 25-a ĝis la 30-a de majo 1990 en Pekino kaj la internacian intertraktadon pri teknika transigo kaj ekonomia kunlaboro en Esperanto.


Ĉar Esperanto estis la sola laborlingvo, la konferenco iris ĉiam en harmonia atmosfero. La ĉeestantoj ne nur interŝanĝis scienc-teknikajn fruktojn kaj spertojn en apliko de Esperanto en la kampo de sciencoj kaj tekniko, sed ankaŭ konatiĝis kun novaj amikoj. Ili esperis, ke oni okazigos pli da similaj kunvenoj por akceli la kuniĝon de Esperanto kun sciencoj kaj teknikoj.

LA KVINA PACIFIKA KONGRESO DE ESPERANTO DE 1992 OKAZOS EN ĈINIO

La Kvara Pacifika Kongreso de Esperanto okazis 11-20-an de septembro, en Brisbano de Aŭstralio. Ĝin ĉeestis 220 esperantistoj el 15 landoj. En la kongreso partoprenis Ĝu Mingji kaj Daj Song'en de la Ĉina Esperanto-Ligo, delegitoj de la Ĉindaŭ-a Esperant-Asocio Ŭang Ŝeng'an, Gaŭ Ŝuzeng kaj Ŭej bing, ĉina studento en Aŭstralio kaj 2 aliaj. La 26-a Aŭstralia Kongreso de Esperanto okazis samtempe.

La kongresa temo estis "Esperanto por la junularo de la mondo". La kongreso briliantis per diversaj fakaj kunsidoj, prelegoj, Esp-kursoj, sperto-interŝanĝaj kunsidoj kaj varieteoj.

La kongreso unuvoĉe akceptis la peton de la Ĉina Esperanto-Ligo, ke la Kvina Pacifika Kongreso de Esperanto de 1992 okazos en Ĉinio.



En la konferencejo

Pola kuracisto s-ro Marian Laba en la konferenco





Finlanda esperantistino Sabira (dekstre) kaj ĉinaj esperantistinoj


Raportisto de EPĈ (dekstre) kaj sovetunia kuracisto s-ro Maruška Alfredas en la konferenco





Nome de la Ĉina Akademio de Sciencoj, Lu Ĝjaŝji (maldekstre) donas la premion "Verda Kosmo" al sveda matematikisto s-ro Christer Kiselman.

En la akupunktura kaj moksa sanitarĵejo de la Hospitalo de la Pekina Universitato




Sen Ĉengju, vicprezidanto de STEA sub ĈAS, legas rezolucion en la fermo.




LIŬ CAJŜENG:

FILATELO POR ESPERANTO



Cen Ŝan en ordigo de poŝtmarkoj



Esperantistoj en ekspozicio de poŝtmarkoj



Dum la Dua Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto en iu salono eksponiĝis 300 paĝoj kun pli ol 600 Esperantaj poŝtmarkoj, tutaĵoj kun surprisaj poŝtmarkoj, stampitaj kovertoj k.a. La eksponaĵoj estas bone aranĝitaj, kio klare vidigis la zorgeman laboron de la eksponanto.

La eksponanto estis juna esperantisto Ĉen Ŝan, unu el la multaj ĉinaj filatelistoj, kiuj okazigis sian personan filatelan ekspozicion. Liaj filatelaĵoj eksponiĝis 9-foje en malsamaj lokoj. Julie de 1986 en la filatela ekspozicio okazigita de la Instruista Kolegio de Mjanjang, Siĉŭan-provinco, li gajnis la unuan premion. Oktobre de la sama jaro en la dua filatela ekspozicio de Mjanjang li refoje gajnis la unuan premion. Julie de la sekvanta jaro en la unua filatela ekspozicio okazigita de la Siĉŭan-a Akademio de Sociaj Sciencoj li gajni honoran premion. Post tio li plurfoje partoprenis filatelan ekspozicion kaj eĉ okazigis personan Esperantan filatelan ekspozicion, kio vekis fortan eĥon ĉe la publiko. La radiostacio, TV-stacio kaj ĵurnalo de la provinco raportis pri lia ekspozicio.

Lia Esp-filatela ekspozicio estis diferenca de la ordinaraĵoj. Ĝi estas aranĝita ne laŭ la tempo de la emisio de la poŝtmarkoj kaj iliaj kompletoj, sed ĉefe celis propagandi Esperanton en la filatelo. Post prologo de la ekspozicio vidiĝis poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj, kovertoj kun verda stelo, emblemo de paco kaj post ili estis 15 specoj de poŝtmarkoj kun portreto de L.L. Zamenhof, la kreinto de Esperanto. La filatelaĵoj pri universalaj kongresoj de Esperanto montris la vastan aplikon kaj historion de la internacia lingvo Esperanto. Sub la rubriko "Esperanto en Ĉinio" eksponiĝis pli ol 100 pecoj de afrankitaj kovertoj kaj aliaj Esp-poŝtmarkoj el 27 ĉinaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. Sub la rubriko "Alilandaj Esp-poŝtmarkoj" vidiĝis 100 paĝoj de Esp-filatelaĵoj el 35 landoj. Inter ili troviĝis poŝtmarkoj emisiitaj de Sovetunio en la 20-aj jaroj kaj 28 Esp-stampoj faritaj de Hispanio de post 1934. Tie montriĝis ankaŭ Esperantaj filatelaĵoj de Hungario, Pollando, FR Germanio, Japanio, Usono, Svisio k.a. Per faktoj ili pruvis la internaciecon de nia lingvo, la vastecon de ĝia studado kaj aplikado kaj ĝian enradikiĝon en la reala homa vivo.

En la konferenco s-ro Ĉen Ŝan akiris la unuan premion "Verda Stelo". Liaj atingoj estas kompreneble nedisigeblaj de lia diligenteco kaj talento. Kaj krome li devis ŝuldi siajn sukcesojn ankaŭ al la fervora helpo de veteranaj esperantistoj-filatelistoj, inter kiuj troviĝas Song Ŝengtān, Ĉin Kajĝji kaj precipe hispana Esperanta kolektanto s-ro Josep Cervell, kiu donacis al li 28 valorajn Esp-poŝtmarkojn. Ĉen Ŝan ankaŭ bone kunlaboras kun samideanoj de FR Germanio, Svedio, Nederlando kaj Germana DR.

Lia celo kolekti Esp-poŝtmarkojn kaj okazigi ekspozicion, li diris, estas propagandi Esperanton. Ĉiufoje antaŭ la eksponado li atente verkis prologon kaj preparis notojn. Ekz. li verkis prologon por siaj eksponaĵoj kun titoloj "Esperanto—Paca kaj Amikeca Lingvo" kaj "Esperanto—Internacia Helpa Lingvo". Li metis iun brazilan poŝtkarton sur okulfrapan lokon, ĉar sur ĝi estas presitaj la 16 reguloj de la Esperanta gramatiko, kiuj konigas ne nur la koncizecon, sed ankaŭ la sciencecon de nia lingvo. La eksponado mem estas propagando de nia lingvo al la neesperantistaro. La Filatela Asocio de Mjanjang iam publikigis artikolon pri Esperanta poŝtmarko de Ĉinio. Estas nemalmultaj homoj, kiuj ekkonis Esperanton kaj komencis lerni ĝin ĝuste post vizito de la ekspozicio de Ĉen Ŝan.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: unu internacia respondkupono por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Geesperantistoj (20-40j.) de Kunshan E-Grupo dez.kor. kun geamikoj tm. pri literaturo, vojaĝo, ĉinmedicino k.a. Esperante kaj angle, starigi kunlaboron kun eksterlandaj E-organizoj, interŝanĝi E-eldonaĵojn kaj kolekti pm. bk. por E-ekspozicio. Adr.: Tao Xueqi, Medical Corporation, Kunshan, 215300, Jiangsu, Ĉinio.

* Jia Juncheng, 33-j, dez. kor. tm. Esperante aŭ angle, interŝ. neuzitajn kompletojn da poŝtmarkoj. Adr.: Cao Yang 7 Cun, 61 Hao, 104 Shi, Shanghai, Ĉinio.

* Zhang Xiaojun, 29-j, dez. kor. tm. pri ĉt., interŝ. bk., pk., pm., unuataĝajn kovertojn kaj filatelaĵojn pri Esperanto, kaj kolekti kalendarojn, mapojn, E-insignojn kaj bild-gazetojn. Adr.: 23, Huang Pu Lu, Wuhan, 430010, Hubei, Ĉinio.

* S-ino Zheng Jiangling, 27-j., dez. kor. tm. pri ĉt., interŝ. pm., pk., bk., unuataĝajn kovertojn kaj kalendarojn. Adr.: 51 Hui Ji Lu, Changban Fangjianchu, Wuhan 430010, Hubei, Ĉinio.

* 26-j. instruisto dez. kor. kun esperantistoj tm. pri goo kaj ĉina ŝako, interŝ. poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn. Adr.: Chen Yuming, Di Liu Zhong Xue, Shiyan, Hubei, Ĉinio.

* Internacia Koresponda Servo helpos al vi trovi korespondant(in)on, amik(in)on aŭ partner(in)on. Por pluraj informoj sendu unu internacian respondkuponon al: Box 163 Stn. "A" Downsview, Ont. M3M 3A3 Canada.


PRI «ATLASO DE INSEKTA MORFOLOGIO»

de LU ĜINŜENG

En la lastaj jarcentoj Esperanto senĉese evoluis, riĉiĝis kaj havis sian lokon en multaj kampoj. Apliko de Esperanto en sciencoj kaj teknikoj komenciĝis kaj disvolviĝas. Ŝlosilo de tiu flanko kuŝas en sistemigo, normigo kaj stabileco de terminoj. La «Atlaso de Insekta Morfologio», ĉinigita, esperantigita kaj reredaktita de Li Kexi, estas utila provo por apliki Esperanton en sciencoj kaj teknikoj. Ĝi estas ne nur atlaso de insekta morfologio, sed ankaŭ terminaro de insekta morfologio. Ĝi, enhavoriĉa, zorge aranĝita kaj ilustrita, povas esti rigardata kiel Esperanta-latina-ĉina bildvortaro de insekta morfologio. D-ro C. Stop-Bowitz, zoologia profesoro de Universitato de Oslo, Norvegujo, membro de la Akademio de Esperanto kaj prezidanto de la Internacia Scienca Asocio Esperantista skribis antaŭparolon por la atlaso. En sia antaŭparolo li laŭdis, ke “La Atlaso de Insekta Morfologio estas la unua vere scienca terminaro pri speciala fako, kiu ricevis esperantan veston. Ĝi montras la vojon de la transiro de la antikva latina al la moderna esperanta formo de la unuopaj terminoj kaj prezentas modelon por kreado de esperantaj fakterminoj, utiligeblan de estontaj verkantoj de alifakaj terminaroj.”

La atlaso konsistas el kvar partoj, nome, kapo, torako kaj abdomeno kaj apendico, kun ilustraĵoj. Por faciligi uzon de la legantoj, la atlaso havas kvar indeksojn: esperanta-latina-ĉina, latina-esperanta-ĉina, ĉina-latina-esperanta, kaj ĉina-latina-angla. Ĉiu leganto, ĉu li estas esperantisto aŭ ne, povas ricevi multe da scioj kaj sugestoj el la atlaso. Ĝi estas leginda kaj por morfologoj-esperantistoj kaj por diletantoj-esperantistoj.

Latina originalo de H. Steinmann kaj L. Zombori
 Esperantigita, ĉinigita kaj reredaktita de Li Kexi
 Eldonita de Ĉina Esperanto-Eldonejo
 512 p., 757 desegnaĵoj



Formato: 20 cm × 14 cm, bindita

Prezo: US\$ 20 plus 3.5 (sendokosto)

Kontaktigu kun Li Kexi, P. O. Kesto 85, Nordokcidenta Agronomia Universitato, urbeto Jangling, Ŝenŝji-provinco, Ĉinio.

Mi ŝatas promeni

Post vespermanĝo mi kaj mia edzo promenas, kiam la suno subiras.

Antaŭe ni interkonsentis: ni urĝu lin, unu la alian, kiam iu el ni ne volas tion. Kaj ni tion faras dum lastaj dekelkaj jaroj, en ĉiuj sezonoj, en ĉiaj veteroj.

Mia edzo petis, ke mi rakontu al li historieton dum la ĉiutaga promenado. Mi jesis. De tiam en postlaboraj horoj mi atente legas librojn, gazetojn kaj jurnalajn, aŭskultas novaĵojn kaj humuraĵojn de aliaj. Kun paso de tempo miaj scioj multiĝas kaj mi havas pli da historietoj kaj humuraĵoj por rakonti. Iam ankaŭ mia edzo rakontas al mi humuraĵojn. Ĉe brilaj partoj de lia rakonto mi ridegas, kaj pro ridego ŝanceliĝas, eĉ kaŭriĝas. Tiel de tago al tago niaj koroj pliproksimiĝas.

Mi havas 12-jaran sol-filon. Antaŭe lian ĉiutagan vivon zorgis aliaj: kiam oni portis al li veston, li etendis siajn membrojn; kiam oni pretiĝis la manĝaĵon, li ekmovis sian buŝon. En la familio pluraj flegis lin, sinjoridon. Al tio ĉiuj jam alkiutimiĝis.

En la someraj ferioj ĉi-jare, mi devis reveni hejmen je la tagmezo por prepari manĝaĵon por mia filo, kaj post la tagmanĝo mi devis haste reiri al laboro. Poste mi pensis, ke li jam estas granda infano, kaj devas lerni sin zorgi. Mi proponis al li "alternan dommastrumadon", t.e., ĉiu el ni dommastrumu tri tagojn semajne, kaj en la dimanĉo, ni kune preparu la manĝojn. Li kun ĝojo konsentis.

La filo dommastrumas



Estas ridinde, ke komence li eĉ ne kuraĝis bruligi alumenton. Post kelkfoja ekzercado li finfine povis ekbruligi la gasfornon. En la antaŭvespero de lia unuata dommastrumo mi demandis al li, "Kian manĝaĵon vi preparos morgaŭ?" "Estu trankvila!" li petole respondis, "Morgaŭ la tagmanĝo certe kontentigos vin." Je la sekva tagmezo mi revenis hejmen, kaj trovis la manĝaĵon preta. Li diris al mi, ke aĉeto de la kuko forrabis de li preskaŭ 40 minutojn. Nu, ankaŭ li jam ekkonis la malfacilon de ĉiutaga vivo.

En la dua semajno mia filo jam komencis esplori prezojn de legomoj kaj konsideri kiel elekti malalt-kostajn kaj freŝajn legomojn. En la lastaj tagoj li interesiĝis pri preparado de pladaĵoj.



INTERNACIA INFORMŜANĜA CENTRO DE LIŬĜOŬ FONDITA

La nomita centro estas fondita de la Esperanto-Asocio de Liŭĝoŭ en la dua tagdeko de julio. Ĝi estas ekonomia establo por konsultado, praktikanta sendependajn ekonomian kalkuladon, entreprenadon kaj respondon de profito kaj malprofito. Ĝi stimulos la aplikadon de Esperanto en kampoj de ekonomio, sciencoj kaj teknikoj, negoco k.a. La centro deziras subtenadon de ĉiuj Esperantaj organizoj kaj fondi interrilatojn kun ili.

Adreso: Yufeng-a Kesto en Liŭĝoŭ, Ĉinio, la Internacia Informŝanĝa Centro de Liŭĝoŭ.

VERDSTELA GASTEJO

Por grandigi la influon de Esperanto, Ŭang Fengju kaj Ŭang Fejsjŭe, membroj de la Ĝingŭoŭ-a Esperanto-Asocio, Ljaŭning-

provinco, fondis la Verdstelan Gastejon sub la aŭspicioj de siaj gepatroj kaj la asocio. En la gastejo eksponiĝas "El Popola Ĉinio", "La Mondo", "Verda Stelo", Esperantaj libroj k.a. Esperantistoj povas ĝui rabaton en la loĝado. Ili donacos parton de sia enspezo al la Esp-movado.

La 20-jaraj Ŭang Fengju kaj Ŭang Fejsjŭe estas ĝemelaj fratinoj. Ili komencis lerni Esperanton antaŭ 9 jaroj.

CUJ ĜIĈIN RICEVIS PREMION DE UMEA

Antaŭ nelonge, Cuj Ĝiĉin, vicestro de la farmacia sekcio de la Ĉin-medicina Hospitalo de Ŝanhajo, ricevis la premion de UMEA en 1988. Li estas la unua ĉino, ricevinta tiun premion. Cuj komencis lerni Esperanton en 1982 kaj tradukis kaj verkis medicinajn diser-

taĵojn en Esperanto. Li jam publikigis 9 disertaĵojn sur Esperantaj gazetoj.

ALIAJ INFORMOJ

La Esperanto-Asocio de Ŝangjaŭ-subprovinco, Ĝjangŝji, fondiĝis en septembro de 1988. Respondeculoj de la tieaj partia komitato kaj registaro ĉeestis la fondkunvenon kaj esprimis varman gratulon al la pli ol 100 membroj de la asocio. La nomita asocio estas la unua subprovinca Esp-asocio de Ĝjangŝji. Ĝi donos aktivan influon al la disvolviĝo de la Esp-movado en diversaj lokoj de Ĝjangŝji.

Por la Dua Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, la poŝtofiĉejo de la urbo Ĉangŝu, Ĝjangsu-provinco, speciale faris memori-gajn kovertaĵojn kaj memorigan stampilon en la ĉina lingvo kaj Esperanto. La projektinto estas esperantisto Ĝang Linĵuj.

La scienc-populariga dumonata gazeto "La Mondo de la Miniatura Komputero", eldonita de la Ĉina Mikro-komputer-utiliga Asocio kaj Elektroniko-utiliga Instituto de Uŝji, ekhavis Esperantan titolon de la kvara numero en 1988.

Antaŭ nelonge, la televida dokumenta filmo "La Antikva Urbo Dali" filmita de la Televidstacio de Junnan-provinco, ekhavis Esperantan eksplikon kaj projekciigis en- kaj eksterlande. La urbo Dali en Junnan-provinco, sudokcidenta Ĉinio, estas la trapasejo de la "Silka Vojo en Sudokcidenta Ĉinio" de la antikva Ĉinio por vojaĝi al Hindio. La bela urbo kun longa historio estas loko loĝata de multaj nacimalplimulto, kie konserviĝas multaj interesaj popolaj moroj.

Ŭang Fengju (la dua de dekstre), Ŭang Fejsjŭe (la unua de maldekstre) kaj iliaj gepatroj antaŭ la Verdstela Gastejo



ĈINIO ALIĜIS AL IFEF

La 40-a IFEF-kongreso okazis inter 4-11 de junio, 1988 en Perpignan de Francio. Ĝin partoprenis 553 personoj el 19 landoj. S-ro Pierre Robiolle, prezidanto de la Franca Fervoĵista Esperanto-Asocio kaj prezidanto de LKK prelegis en la kongreso.

Kiam la kongreso unuanime aprobis la proponon akcepti la ĉinajn esperantistajn fervoĵistojn en la kadro de Internacia Federacio de Esperantistaj Fervoĵistoj, la kongresanoj stariĝis por saluti per viglaj aplaŭdoj la envenon de la 20-a landa federacio en IFEF.

Krome, s-ro Ritterspach, kiu respondecas pri la terminara komisiono, anoncis la fintradukon de la internacia regularo de la fakaj terminaroj.

La 41-a IFEF-Kongreso okazos de la 13-a ĝis la 19-a de majo, 1989 en Salou de Hispanio.

SIMPOZIO PRI TIBOR SEKELJ

En kadro de la KVARA INTERNACIA RENKONTO "Ivan Flanjak" (Osijek, la 25-an kaj 26-an de marto 1989) Esperanto Kultura Centro (EKCE) organizas simpozion sub la titolo "TIBOR SEKELJ--JURNALISTO KAJ VERKISTO". Maŝintajpitajn eseojn kaj bibliografiaĵojn bonvolu sendi al la adreso: mag. Antun ŠIMUNIĆ, EKCE, 54000 OSIJEK, Dž. Bijedića 7/I, Jugoslavio (ĝis la fino de januaro 1989). Aŭtoroj de akceptitaj kontribuoj havos senpagan restadon en Osijek.


ESPERANTO EN UNIVERSITATO

La universitato Karlsruhe de FR Germanio prezentos, ekde la venonta vintrosemestro 1988/1989, ankaŭ instruadon de Esperanto. Laŭ indikoj de la universitato, post la 19-a de oktobro, la planlingvo estos instruata en du kursoj por komencantoj kaj por progresantoj.



La podio de la 40-a IFEF-kongreso

Gajninto de la unua premio en poezia konkurso okaze de la "Jaro de A. Grabowski" en Varsovio



Ningŝja—hejmloko de ĉinaj islamanoj

En Ĉinio 10 naciminoritatoj kreas je islamo. Inter ili huj-nacio estas grandnombra kun kompare prospera ekonomio kaj kulturo.

Fine de la 7-a jc p. K., nemalmultaj arabaj kaj persaj komercistoj ŝipe atingis la sudorientan marbordon de Ĉinio kaj ekloĝis en Kantono, Ĉjūangōū kaj aliaj lokoj, okupante sin per komerco pri rincocera korno, eburo kaj perlo. La nombro de tiaj komercistoj senĉese kreskis kaj fariĝis parto de huj-oj. En la 13-a jc la gvidanto de mon-

goloj Ĝingis-Hano ekspediciis okcidenten kun siaj trupoj. Kun venko en la milito, granda nombro da mez-azianoj, persoj kaj araboj devis transloĝiĝi orienten. Ili formis la ĉefan konsistigan parton de la huj-oj.

La transloĝintoj plejparte estis soldatoj, metiistoj, kaptitaj virinoj kaj infanoj, kaj krome, estis ankaŭ instruituloj, mondumanoj kaj komercistoj, kiuj memvole venis al Ĉinio el la trafika vigliĝo inter la Oriento kaj Okcidento. Pres-

kaŭ ĉiuj soldatoj partoprenis en la milito levita de mongolaj nobeloj por konkeri la tutan Ĉinion kaj tial ili ekloĝis en diversaj partoj de la Lando. Post la milito, ili, islamanoj kun malsama ŝtataneco kaj nacieco, kune loĝis, kultivis teron kaj miksedziĝis kun lokaj hanoj, ujguroj, mongoloj k.a. Dum longa tempo ili tenis originalajn morojn kaj religian kredon kaj formis iompostiotime unuopan huj-nacion.

Nun pli ol 7.2 milionoj da huj-oj loĝas en diversaj partoj de Ĉinio. Huj-nacio, kiel unu el la 55 naciminoritatoj de Ĉinio, havas la plej grandan disloĝatecon. Miksloĝante kun aliaj nacioj, ili tamen havas sian propran loĝlokon en kamparoj kaj urboj. Pro historia kaŭzo vivas multe da huj-oj en nordokcidenta Ĉinio, precipe en Ningŝja. Triono de la 4.2 milionoj da loĝantoj en Ningŝja estas huj-oj. La 23-an de septembro 1958 fondiĝis la Ningŝja-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono kaj la regiona registaro plenumas sian aŭtonomion kadre de koncernaj difinoj de la Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko. En la lastaj jaroj la Konstanta Komitato de la Popola Kongreso de la regiono, surbaze de naciaj kaj lokaj karakterizaĵoj, publikigis pli ol dek kodojn, paŝo post paŝo perfektigis konstruadon de leĝa sistemo de nacia aŭtonoma regiono kaj plenumis sian nacian aŭtonomecon.

Ningŝja situas sur la Leŭsa Altebenaĵo, kiun trafluas la Flava Rivero. La parto de la Flava Rivero en Ningŝja longas 400 km. Ambaŭ-

Islamanoj en moskeo



flanke de la rivero sterniĝas fekunda tero, prospere kreskas arboj kaj herboj. La loko estas nomata "lando de fiŝoj kaj rizo". Kiom frue, tiom antaŭ 2000 jaroj ĉinoj, utiligante la naturdotitajn kondiĉojn, konstruis kanalojn por irigacii kampojn. La antikvaj kanaloj Ĉinĉju, Hanĉju kaj Tangĉju ludas ankoraŭ gravan rolon en irigaciado. Post kiam huj-oj fiksloĝiĝis tie, ili kaj aliaj nacioj konstruis centojn da kanaloj por konduki akvon el la rivero kaj irigacii kampojn. En la pasintaj jaroj la tieaj loĝantoj kondukis akvon el la Flava Rivero al la sekaj montoj, ke en la montoregionoj ne plu mankas akvo por ĉiutaga vivo kaj agrikulturo. Ekz-e, antaŭe en la sekaj jaroj terure mankis eĉ trinkakvo en la montoregionoj de suda Ningŝja. Por ŝanĝi la staton, la loka registaro asignis 200 milionojn da jŭanoj por konstrui grandan akvokondukilon, kiu irigas akvon el la Flava Rivero al la montaroj, tra 11 pumpstacioj kaj la 152-kilometra kanalo, kun totala alto de 379 m. Nun sur la antaŭe dezerta tero ombas arboj, kreskas herboj kaj prosperas grenplantoj. Favorate de la Flava Rivero, sufiĉeco da sunlumo kaj granda diferenco de temperaturo inter tago kaj nokto, la tieaj rizo kaj tritiko estas bonkvalitaj kaj la fruktoj kaj melonoj miele dolĉaj.

Pro longa miksloĝado kun hanoj, la nunaj huj-oj portas vestojn similajn al tiuj de hanoj. Ie en Ningŝja la virinoj portas ornamtukon sur la kapo, dum la viroj kun lipharoj plejparte blankan ĉapon. En manĝado kaj trinkado ili tenas apartajn kutimojn de sia nacio. La huj-oj ŝatas fortan teon, bovaĵon kaj ŝafaĵon kaj neniam manĝas viandon porkan, ĉevalan, azenan, mulan kaj tiun de ĉia ajn rabobesto aŭ rabobirdo. Ili neniam manĝas ankaŭ sangon de besto kaj viandon de besto mortinta de malsano. Vino ne estas lica ĉe la islamanoj. Por respekti iliajn kutimojn oni funkciigas restoraciojn ekskluzive por huj-oj en la regionoj de aliaj nacioj.

La huj-oj plejparte kredas je islamo. La kulturo kaj naciaj moroj



Preparo de manĝaĵo por festo

estas multe influataj de religio. En la regionoj loĝataj de huj-oj estas moskeoj, kie islamanoj faras religiajn aktivadojn. Ili sin banas, kultas, predikas pri islama doktrino aŭ okazigas riton. La moskeoj kompakte rilatas kun la vivo de la huj-oj. Tie imamoj benas novgeedzojn, prezidas funebrojn por islamanoj, preĝas por mortintoj en festo kaj direktas ceremonion de bestobuĉado.

En la Ningŝja-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono troviĝas pli ol 2000 grandaj kaj malgrandaj moskeoj. La Granda Moskeo en Tongŝin-gubernio havas historion de 400 jaroj kaj ĝin pilgrimas islamanoj de diversaj lokoj de nia lando. La moskeo Nangŭan kun islama arkitektura stilo en Jinĉŭan, la ĉefurbo de la aŭtonoma regiono, estis konstruita en 1981. Ĝiaj kvin verdaj kupoloj majestas, ĉiu kun pokalforma ornamo. Supre de la plej alta kupolo en la centro de la tegmento estas lunforma lampo, simbolo de profeto Mohamedo de islamo; kaj la malgrandaj kupoloj ĉe la anguloj simbolas la kvar grandajn sektojn de islamo. En la

teretaĝo de la templo estas banejoj por viroj kaj virinoj respektive, malgranda preĝejo kaj ĉambroj por imamoj. En la unua etaĝo estas halo kun longo kaj larĝo respektive de 21 m., kiu povas enteni milon da personoj.

La Fastoĉesa Festo, Korban-festo kaj Memor-festo estas la tri grandaj festoj por la islamanoj. Laŭ difino de korano, en Ramadanano la islamanoj devas fasti. De la sunleviĝo ĝis la sunsubiro la adoltaj islamanoj devas strikte fasti kaj sin deteni de ĉia ajn pasio kaj aspiro. Oni manĝas nur post la vespera krepusko. La Fastoĉesa Festo datiĝas en la 1-a de la deka monato laŭ la islama kalendaro. Tiutage la islamanoj, sin baninte, surhavas festajn vestojn, vizitas siajn parencojn kaj amikojn kaj reciprokas saluton kaj bondeziron kun ili. Ĉiu familio regalas gastojn per frititaj farunaĵoj. En la festo oni estas tre bonvenigata eĉ en hejmo de fremduloj. La islamanoj diservas en la moskeoj. Laŭ difino de la ŝtato, en la Fastoĉesa Festo huj-oj kaj aliaj islamanoj ĝuas unutagan ferion.

SCIENC-POPULARIGA GRUPO SUR ALTEBENAĴO

La tritiko sur ĉ. 0.5 hektaro kultivata de tibet-nacia kamparano suferis de stria rusto, kaj li ne sciis kion fari. Ĝuste en tiu tempo venis scienc-populariga grupo kaj li iris al la grupo kun unu malsana plantido. Agronomo de la grupo rakontis al li pri la kialo kaj kuracmetodo de la malsano kaj preparis por li kemiaĵon kontraŭ ĝi. Reveninte hejmen, li tuj ŝprucigis la kemiaĵon kaj savis siajn plantaĵojn. Kaj li laŭdis la agronomon kiel kuraciston de kultivaĵoj.

Tio okazis en la provinco Ĉinghaj sur la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo. En tiu provinco, krom hanoj, loĝas ankaŭ tibet-nacianoj, hujoj, salaroj, tuoj, mongoloj kaj aliaj naciminoritatoj, kiuj konsistigas 40 procentojn de la loĝantaro de la provinco. La altebenaĵo estas danĝera topografie kaj la tiea vetero ŝanĝigema. Tial estas tre malfacile komuniki informojn, la kondiĉoj por instruado kaj edukado estas malfavoraj kaj la nivelo de scienco kaj tekniko malalta. Ĉio ĉi rezultigis la postĝintecon en produktado kaj mizeran vivon de la loĝantaro.

Regas forta religio kaj superstiĉo inter la lokaj nacimalplimultanoj. Por kulti budhostatuojn multaj tributas al la temploj grenon, buteron kaj monon, iuj eĉ fordonas sian tutan havaĵon. Tiukaze estas tre malfacile popularigi sciencan kaj teknikon kaj diskonigi aliajn

sciojn. La avangardaj maŝinoj por kampaj kaj paŝtejaj laboroj kaj kemia sterko donitaj de la registaro estis ne uzataj pro nesciado de tekniko. Kiam brutoj malsaniĝis, ili estis destinitaj morti sen kuraco. En la dekoj da jaroj, kvankam la ŝtato donis grandan monhelpon al la loko, tamen tio povis nur savi la loĝantojn de malsato kaj malvarmo kaj ne povis radikale ŝanĝi la postĝintecon, tiel ke la regiono pli

kaj pli postĝis post aliaj lokoj de la lando. La kamparanoj kaj paŝtistoj de la nacimalplimultanoj en la regiono, ne volontante sian postĝintecon, urĝe bezonas popularsciencajn sciojn.

Por pli efike popularigi sciencan kaj teknikon inter la naciminoritatoj, la Scienc-teknika Asocio de Ĉinghaj-provinco organizis en 1986 sep-personan sciencopopularigan grupon el inĝeniero,

Scienc-popularigo inter tibet-naciecanoj





Kampadejo de la scienc-populariga grupo

veterinaro, agronomo, teknikisto k.a. La grupo estas armita per aŭtobuso, kinematografo, televidilo, video-aparato, kamerao, fotografiilo kaj dinamo, kaj krome, ankaŭ per tendo k.a. por faciligi sian laboron.

La grupo tutjare laboras sur lokoj pli ol 3000 m. super la marnivelo, kiel ekzemple, ĉe la bordo de Ĉinghaj-lago, ĉe la piedo de Bajanhara-montaro kaj en Ĉajdam-baseno. Ili jam veturis pli ol 10000 km. kaj restigis siajn piedsignojn en ses aŭtonomaj subprovincoj kaj sep aŭtonomaj gubernioj en la kadro de la provinco. En tiuj dezertaj lokoj estas malvarmege kaj mankas oksigeno. Spite la malfacilojn, ili veturigis aŭtojn de loko al loko por projekcii filmon kaj diskonigi popular-sciencajn sciojn al ĉ. 30000 kamparanoj kaj paŝtistoj de diversaj nacioj. Krome, ili ankaŭ kuracis, preparis agrikulturajn kemiaĵojn kaj medikamentojn por brutoj, kaj riparigis magnetofonojn kaj agrikulturajn maŝinojn. Aparte menciindas, ke ili faris multajn laborojn por elkulturi sciencistojn el naciminoritatoj. Pro tio ili estas honoritaj kiel "Scienc-populariga Malpeza Kavalerio sur Altebenaĵo".

En paŝtejo, ĝenerale, la distanco inter tendoj estas kelke kaj eĉ de-

koj da km. Kompreneble, estas tre malfacile popularigi sciencan kaj teknikon inter dise loĝantaj popolamasoj. Tial, festotagoj kaj ferioj, precipe tradiciaj festoj de nacimalplimulto, donas bonan ŝancon grandskale popularigi sciencan kaj teknikon. La Flor-festivalo, Ĉevalkonkurs Festivalo, Nadamufestivalo kaj aliaj tradiciaj festivoj de la nacimalplimulto sur la altebenaĵo altiras popolamasojn al si. Ili alvenas sur ĉevalo aŭ per veturilo de diversaj lokoj kelkdek aŭ cent km. fore. Tiutempe la grupo kaj loka registaro kune organizas grandskalan scienc-popularigan aktivadon kun bona efiko.

De la 2-a ĝis la 7-a de aŭgusto 1988, okazis la tradicia Junia Festivalo en Gujde-gubernio, la Hajnan-a Tibet-nacia Aŭtonoma Subprovinco, Ĉinghaj-provinco. Tibet-nacianoj, hanoj, huoj, tuoj, mongoloj, salaroj kaj aliaj, sume cent mil homoj, ĉe la fonto de la Flava Rivero starigis milojn da tendoj en ĉeriveraj arbaroj por ĝui la festivalon. La scienc-populariga grupo kaj la registaro de Gujde-gubernio starigis pli ol 40 tendojn, kiuj formis 150 m. longan straton scienc-popularigan. Sciencistoj venintaj de diversaj departementoj servis kiel propagandantoj kaj laborantoj. Kuracistoj de higi-

enaj organizoj ekzamenis la korpon al virinoj kaj infanoj, vakcinis al la infanoj el foraj paŝtejoj, donis konsultiĝan servon al suferantoj de endemiaj malsanoj, diagnozis malsanulojn kaj popularigis higienajn sciojn. La agrikultur-sciencia departemento eksponis envazajn specimenojn de plantoj kultivataj en la regiono por diskonigi la scion pri kultivado, bonrasajn speciojn, kultivadon sub plasta membrano kaj preventadon kontraŭ fiinsektoj kaj malsanoj de plantoj. La departemento pri brutobredado ne nur donis sciojn pri gruntbovo kaj ŝafo, ĉefaj brutoj sur la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo, sed ankaŭ diskonigis sciojn pri bredado de bonrasaj viandkoko kaj teknikon de rapida kreskigo de porkoj. Ili ankaŭ popularigis sciojn per scienc-eduka filmo, video, ekspono kaj aktivado de gejunuloj kaj geknaboj.

La scienc-populariga grupo donas grandan atenton al propagando per specimenoj. Ili transplantis kultivaĵojn en vazojn kaj montris specimenojn suferantajn malsanon kaj atakatajn de fiinsektoj kaj fiinsektojn surtable. Kiam la kamparanoj vidis la specimenojn kaj informiĝis pri la malsano de sia kultivaĵo, ili sciigis kiel preventi kaj kuraci la malsanon. Tibetnacia kamparanino de Gujde-gubernio kultivis 18 pirarbojn, kies folioj iom post iom flaviĝis kaj kies piroj ĉesis kreski. Ŝi opiniis, ke la dio plagis ŝian familion, kaj ĉiutage bruligis buterlampon kaj adorkliniĝis antaŭ dia statuo, por ke la dio benu ŝin kaj forigu la katastrofon. Malgraŭ ŝia pia kultado, la malsano de ŝiaj pirarboj pli kaj pli serioziĝis. Kiam ŝi vizitis la scienc-popularigan eksponejon, ŝi sciigis, kiun malsanon suferas ŝiaj pirarboj. Sciencisto preparis por ŝi kemiaĵon kaj donis al ŝi metodon kontraŭ la malsano.

Scienc-edukaj filmoj kaj video estas plej bonvenaj al popolanoj, ĉar ili estas vivecaj, interesaj kaj facile memoreblaj kaj ludas bonan rolon en lernado de scienco kaj forigo de superstiĉo.



Li montras sian inventaĵon al kunlernantoj.

Laŭ informo de la eduka departemento de Pekino en iuj elementaj lernejoj oni unuflankece substrekas gajnon de bonaj notoj pro la influo de intensa konkuro en ekzameno por viziti mezlernejon. En tiuj lernejoj lernantoj lernas ĉiutage nur en la klasĉambro. Krom la ordinaraj lernohoroj, lernantoj devas pasigi ankaŭ postlecionajn lernohorojn. La diplomotaj lernantoj, kiuj intencas viziti bonan mezlernejon, pasigas pli multe da postlecionaj lernohoroj. Ĉiutage ili preskaŭ ne havas tempon por ludi, sporti aŭ fari ŝatatan aktivadon. Tio damaĝas la sanon de lernantoj, influas ilian lernadon, lacigas instruistojn kaj vekis la atenton de la socio. Iuj elementaj lernejoj serĉas instruan metodon malpezigi la ŝarĝon de lernantoj kaj altigi la lernoefikon.

Tamen ekzistas lernejoj, kiuj elstarigis per sia vigla kaj efika instruado. Mi vizitis la Ŝangtoŭtjaŭan Elementan Lernejon de Ĉongŭen-distrikto.

La lernejo plenas de gaja etoso. Ĝi aplikas metodojn tute malsamajn. Ĝi eksplicite difinis: Instruistoj ne longigu lernohoron, nek aldonu postlecionan lernohoron; ĝi kuraĝigis lernantojn rigardi televidon

SUN GŬOLJANG:

SCIO KAJ INTERESA INSTRUADO

kaj aŭskulti radio-programerojn, zorgi pri la socio kaj partopreni diversajn utilajn aktivadojn en libera tempo. Tio ne nur ne reduktis la poentojn, sed male ebligis al ĉiuj lernantoj sukcese trapasi ekzamenon en sinsekvaj jaroj por viziti mezlernejon. En la matematika konkurso okazigita en Ĉongŭen-distrikto en 1988, el la kvar partoprenantoj de la lernejo unu gajnis la unuan premion kaj du la trian.

Kiam mi atingis la lernejon, kunvenis lernantoj de la sesa klaso. Ili nomas la kunvenon "novaĵ-publikigo". Tuj kiam la prezidanteto deklaris la kunvenon komencita, lernantoj konkure publikigis novaĵojn: "Hieraŭ trajno elreliĝis en Grekio, pro tio dekkelkaj homoj mortis." "Irano kaj Irako interkonsentis pri armistico." "Senpaga sangodono komenciĝis en Pekino." Iuj aĉetis personaŭton el eduka kaso en Sijang-gubernio, Ĝjansu-provinco." La novaĵoj estas diversaj enlandaj kaj eksterlandaj. Mi miris kaj demandis la gvidanton de la lernejo: "Kolekti tiom da novaĵoj bezonas ne malmulte da tempo, ĉu tio ne malhelpas la ekzamenon de la diplomotaj lernantoj?"

“Ne!” definitive respondis la gvidanto de la lernejo. Li diris al mi, ke la lernejo devas ĉiuflanke kulturi lernantojn. Nun la diplomotaj lernantoj ne havas postlecionan lernohoron. Ili estas ĉefa forto en diversaj aktivadoj, ekz., en konkurso de kantado kaj sporto, eĉ en la aktivado por propagandi pri trafika sekureco. Oni devas atenti ilian lernadon ekde malfaltaj klasoj kaj la efikon de lernohoroj. Por tio oni devas plibonigi la instru-metodon kaj interesi la lernantojn pri la lecionoj.

La gvidanto de la lernejo kondukis min en la kvaraklasan klasĉambron. En la leciono la instruisto ne klarigis matematikan problemon, sed iniciatis aktivadon “elekti direktoron”. Li diris: “Iu magazeno volas elekti direktoron el nia klaso. Vi ĉiuj havas eblecon fariĝi direktoro. Kiu akiros plej multe da poentoj en la matematika operacio, tiu estos elektita. Tuj poste la instruisto starigis ekzamenajn demandojn. La lernantoj respondis ilin tre atente. Kvankam iuj demandoj estis multe pli malfacilaj ol tiuj en la lernolibro, tamen iuj lernantoj ĝuste solvis ilin. En manklakado kaj ridado la instruisto donis engaĝ-ateston al la elektita lernanto. Tiel la seka matematika leciono fariĝis tre vigla.

Multaj lernantoj timas fari verkan ekzercon. Malgraŭ ke mankas al ili vortoj en verkado, instruistoj postulas, ke ili faru po unu verkan ekzercon ĉiu-semajne. Tiel verka ekzerco fariĝis ilia ŝarĝo. La gvidanto de la lernejo diris al mi, ke por solvi la malfacilon, antaŭ ĉio oni devas havigi al la lernantoj vortojn. De kie venas vortoj? De la vivo. La ŝlosilo estas instrui al la lernantoj observi la vivon. Iu instruisto aranĝis la lecionon “taŭrobatalo” por verki artikolon. Li petis, ke unu lernanto ludu taŭron kaj alia—taŭriston. Li surdorsigis al ili po unu paperpecon kun malsamaj ciferoj. Kiu la unua vidas la ciferon sur alies dorso dum la “taŭrobatalo”, tiu gajnas la ludon. En la leciono ĉiuj lernantoj konkure ludis “taŭriston”. La taŭrobatalo estis tre intensa kaj la rigardantoj tre ekscititaj. La instruisto tiel direktis siajn lernantojn en observado kaj priskribo de la ludo. La lernantoj ricevis edifon kaj vastigis sian vidkampon. Ili rememoris interpuŝigon en aŭtobuso, sporton en sketejo, malvastan loĝejon de kunlernantoj... Ili trovis vortojn kaj interesiĝis pri ekzerco. Multaj lernantoj iom post iom kutimiĝis al skribado de ĉiutaga observa noto kaj povas verki artikolon, kies temon ili mem elektas.


La Ŝangtoŭtjaŭ-a Elementa Lernejo tre atentigas vigligon de la penso de lernantoj en ekzerco kaj levon de ilia imagipovo. La lernejo opinias, ke tio estas ŝlosilo por ĉiuflanke kulturi lernantojn. Mi ĉeestis lecionon pri belarto, kiu profunde impresis min. En la leciono la instruisto disverŝis diverskolo-

rajn farbojn sur paperojn por fari naturajn konturojn de bildoj. Poste la lernantoj laŭ sia imago pentris sur la paperoj. Iu lernanto pentris petoleman simion, alia belan akvofalon, tria levigantan sunon... La pentraĵoj de la lernantoj en la klaso ne estis samaj. Ĉiujare lernantoj de la lernejo gajnis premiojn en ekspozicio aŭ konkurso pri belarto en la urbo aŭ distrikto.

La gvidanto de la lernejo diris al mi, ke pro limigiteco de loko la lernantoj povas fari nur simplan sporton, tial la sporta aktivado iris ne bone. Tamen la lernejo ne malstreĉis korpo-ekzercadon de la lernantoj, sed laŭeble organizis iujn aktivadojn kaj konkursojn por kuraĝigi ilin al korpo-ekzerco en postlecionaj horoj. La lernejo jam sendis naĝistojn, korbopilistojn kaj piedpilistojn al urbaj kaj distriktaj teamoj. Ĉiufoje ekde 1984 la lernejo estis honorita kiel organizo avangarda en sporto en la distrikto.

Ĉar la lernejo ĉiam praktikas la principon kreskigi intereson de lernantoj, ĉiuflanke kulturi ilin kaj malpezigi ilian ŝarĝon, ĝi ricevis efikon en instruado kaj estis honorita de la urbo kiel avangarda lernejo en persisto en ĉiuflanka kulturado de lernantoj, malpezigo de ilia ŝarĝo kaj altigo de eduka kvalito.

Instruisto pri belarto helpas lernantojn en pentrado.




ĜAŬ ĜANGĜŬANG KAJ HAR-PANACEO

46-jara kaj malalta-statura Ĝaŭ Ĝanggŭang, kun maldika vizaĝo kaj, maldensaj brovoj, aspektas kiel instruitulo kun iom da kamparanco. Li estas popola kuracisto kaj amas ĉinmedicinon jam de sia knabeco. En la komenca periodo de la 70-aj jaroj li komencis esploron pri kuracado de alopecio, aplikante ĉinmedicinan teorion. Post 101-foja eksperimentado en 4 jaroj, li inventis "har-panaceon 101" finfine en 1974.

EN MONDA FOIRO

Septembron 1987, Ĝaŭ Ĝanggŭang memfide staris ĉe la ĉina stando en la Eureka Monda Foiro okazinta en Bruselo de Belgio. Sur la stando apud li estis vico da boteloj ene kun ruĝeta likvaĵo "101", kun alto de 13 cm. kaj diametro de 4 cm.

Pli ol 500 fotoj sur la stando vekis atenton de multaj homoj. La fotoj montris kapon de centoj da alopeciaj suferintoj de Ĉinio antaŭ kaj post la kuracado per lia "101", kio ŝajnis nebla. Eĉ iuj dermatologoj ĵetis al ili duban rigardon. Ĝaŭ Ĝanggŭang anoncis al vizitantoj: "La 'har-panaceo 101' de Ĉinio povos rivali kun hararrekreskigaĵo de ĉiu ajn lando. La juĝkomitato povos determini hospitalon kaj pacientojn por provi la kuracefikon de la har-panaceo, sen anonco de la nomo kaj fabriko de la kuraciloj kaj kun kaŝa marko, kaj rigardu, kiu kuracilo povos rekreskigi novan hararon por la



Har-panaceoj

alopeci-suferantoj en fiksita tempo. La pacientoj, kiuj uzos la kuracilon '101' kaj trovos ĝin senefika post kuracado de tri monatoj, povos ricevi la pagon de la kuracilo. Se la kuracilo kaŭzos malbonan rezulton dum la kuracado, mi portos la leĝan respondecon!"

Lia anonco estigis sensacion en la foiro, ke alopeciaj suferantoj de blankuloj, negroj kaj flavuloj torentis al Ĝaŭ Ĝanggŭang kaj ĉirkaŭis lian standon.

Mantenante botelon, Ĝaŭ Ĝanggŭang broŝe ŝmiris la likvaĵon

"101" simetrie sur la kapon de suferantoj.

17-jara belga junulino denaske sen hararo, traborinte la homamason, venis al Ĝaŭ Ĝanggŭang kaj fingromontris sian kapon kun larmoj. Ĝaŭ Ĝanggŭang konis ŝian deziron, serioze faris ekzamenon al ŝi kaj diris: "Estu trankvila, via malsano estas kuracebla."

Forpasis 17 tagojn, post kiam la kuracilo "101" estis ŝmirita sur la kapo de la junulino. Tavolo da flava lanugo elkreskis sur ŝia kapo. Unuafoje vidinte siajn nove kres-

kintajn harojn, la junulino ĝojis preskaŭ freneze.

La suferantoj starigis sian dikfingron por laŭdi la kuracefikon de "101". Sed la juĝo de la juĝkomitatanoj surprizis lin. Iutage, kelkaj juĝkomitatanoj venis al la stando de "101", unu el ili faris dikan markon "X" sur la specimena tabulo. Subite peziĝis la koro de Ĝaŭ Ĝanggŭang: Kion signifas tio? Laŭ la ĉina kutimo "X" montras rifuzon. Vidinte la surprizan kaj suspektan sintenon de Ĝaŭ Ĝanggŭang, la ĉina interpretisto venis al li, mistere palpebrumis al li kaj flustris: "Tio estas fortuna, 'X' estas signo de konsento pri via eventaĵo al juĝado."

La unuan de oktobro 1987, la halo de la foiro estis iluminata, en la nomo de la reĝo de Belgio la Brusela urbestro donis unuaklasan kavaliran ordenon al Ĝaŭ Ĝanggŭang.

Ĵurnaloj, radioj kaj televidstacioj de multaj landoj konkure raportis pri tiu novaĵo kaj la ardo pri "101" leviĝis kiel kirlo-vento.

Post sep monatoj, en Ĝenevo okazis la 16-a Monda Ekspozicio pri Novaj Teknikoj kaj Novaj Inventaĵoj. Ĝaŭ Ĝanggŭang refoje partoprenis ĝin kun sia "101" kaj gajnis la unikan premion de la Oska Ora Pokalo de individua invento kaj lia "101" gajnis ormedalan premion de produktaĵo.

LI HAVIS SUFERON SAME KIEL ALOPECIAJ PACIENTOJ

En 1943 Ĝaŭ Ĝanggŭang naskiĝis en familio de ordinara kamparano. Pro malriĉeco li ĉesigis sian lernadon kaj okupiĝis pri kamplaboro, lerninte en la dua klaso de elementa mezlernejo.

En 1968, li suferis de dermozo kaj estis dujare kuracita en hospitalo de la urbo Hangĝou. Li estis lernema, kuracate, li lernis ankaŭ la medicinon. Post kiam li resaniĝis, li fariĝis kuracisto en la vilaĝo kaj fondis sanprotektan stacion. Li kuracis ordinariajn malsanojn kaj samtempe simplajn dermozojn por vilaĝanoj.



Ĝaŭ Ĝanggŭang (kun floroj en la fronto) revenis al sia lando.

En la hejmloko de Ĝaŭ Ĝanggŭang, nemalmultaj vilaĝanoj suferis de alopecio. Iu instruistino en lia vilaĝo senhariĝis. Ŝi estis ofte mokata de petolaj infanoj eĉ dum ŝia leciono-donado. La memrespekta instruistino devigite rezignis sian oficon kaj ne eliris el sia hejmo 7 jarojn.

La hararo de junulino en najbara vilaĝo defalis en unu nokto. Ŝia fiancineco rompiĝis pro tio. Ŝi multfoje vizitis kuraciston, sed ne trovis efikan kuracadon. La malespero preskaŭ kondukis ŝin al sinmortigo.

Iun tagon, akompanate de sia patrino tiu junulino venis al Ĝaŭ Ĝanggŭang kaj kun larmoj diris: "Mi petegas vin! Nepre kuracu por mi la alopecion!"

La sufero de la junulino kaj la instruistino donis al Ĝaŭ Ĝanggŭang neforviŝeblan impreson. Ankaŭ li sentis suferon kaj ĵuris inventi bonefikan alopecio-kuracilon.

VOJO FARIĜAS DE IRADO

Proverbo diras: "Astmo estas la

plej malfacile kuracebla el la internaj malsanoj kaj favoro tiu el la kirurgiaj malsanoj." Kuraĉi alopecion estas pli malfacile ol favoro. Rekreskigi harojn por beligi la vizaĝon estas antikva kaj nova temo. Kvankam la homaro paŝis jam en prosperan epokon de sciencoj, tamen la kuracistoj ne trovis idealan kuracrimedon por la alopeciacaj pacientoj.

Kun firma volo prefere oferi ĉion por efektiviĝi sian celon, Ĝaŭ Ĝanggŭang komencis sian esploron. Li diris: "Mi ĉiam kredas, ke la vojo fariĝas de irado."

Tage, ŝultre portante sian medikamentan keston, li vizitis maljunajn ĉinmedicinajn veteranojn kaj maljunajn drogherbo-kolektantojn por kolekti efikajn alopecio-kuracajn receptojn en la popolo. Nokte, li klasifikis la kolektitajn materialojn kaj atente esploris la teorion, funkcion kaj efikon de ĉinmedicinaj drogherboj.

En la loĝejo de Ĝaŭ Ĝanggŭang ĉie estis boteloj kaj potoj. Sur sia kapo, ankaŭ sur tiu de siaj 72-jara patro kaj 7-jara filino, li faris provadon per memfarita har-panaceo

foje-refoje. Li malsukcesis dekojn da fojoj. En lia ĉambro ĉiam regis fortaodoro de drogoj. Liaj familianoj eĉ ne povis ripozi pro ofta vizito de la pacientoj. Por fari eksperimenton li devis aĉeti drogherbojn kaj vazojn. Pro tio, li jam devigite pruntis de aliaj monon kaj eĉ vendis parton de siaj domoj.

Tri jaroj forpasis. Iun frumatenton en la kvara printempo, Ĝaŭ Ĝanggŭang en dormo estis vekita de pordofrapo. Iu paciento emocie kriis ekster lia domo: "Ĝanggŭang, Ĝanggŭang! Elkreskis miaj haroj!" Ĝaŭ Ĝanggŭang ellitiĝis en ĝojo kaj hastis al la pordo. Kiam li vidis la hararon sur la kapo de la pacien-

to, la persistema Ĝaŭ Ĝanggŭang ekploris de emocio.

Alvenis boninformo-anoncantoj unu post alia. La pacientoj kuracitaj de lia likvaĵo havis ĵus elkreskitan nigran hararon.

Post 100-foja malsukceso finfine sukcesis lia eksperimento de harar-rekreskigaĵo, tial ĝi ricevis la nomon "har-panaceo 101".

La har-panaceo de Ĝaŭ Ĝanggŭang estas farita el plurspecaj ĉinaj drogherboj, havas efikon vigligi sango-cirkuladon kaj funkcion de *ĝinglito*-oj. Ĝi povas plibonigi la sangoliveradon de harfolikla strukturo kaj akceli ilian har-kreskigan

funkcion. Laŭ statistiko, la kuracefiko de "101" por la kapoj tute kalva, pelada kaj ordinare kalva estis pli ol 90% kaj la tute resanigitaj pacientoj atingis 84%. Sed la kuracilo estas efika ne por ĉiuj pacientoj, la kuracefiko estas influata de spirito, malsana historio, heredo, vivkutimo, sanstato de la suferantoj.

Nun, la kuracilo "101" estas eksportita al 18 landoj kaj regionoj, kiaj Usono, Svedio kaj Japanio. Sed Ĝaŭ Ĝanggŭang ne ĉesigis sian esploradon, liaj novaj produktaĵoj "101-A" kaj "102" de la dua generacio de "har-panaceo 101" baldaŭ aperos en la mondo.

ZONG HE:

ĜENG ŜIJU ROMPIS TRI MONDAJN REKORDOJN

En la Internacia Konkurso de Naĝilnaĝo 1988, ĉina sportistino Ĝeng Ŝiju gajnis 3 ĉampionecojn, rompinte la mondajn rekordojn de 50-metra subakva apnea naĝo, 100-metra naĝilnaĝo kaj 100-metra mergado. (la angl. immersion).

La konkurso okazis en Pekino de la 8-a ĝis la 11-a de majo. Ĝin partoprenis 66 sportistoj el Sovetio, Italio, Hungario, Svedio, Japanio, Indonezio kaj Ĉinio. La plej fortaj naĝilnaĝistoj en la mondo estas tiuj de Sovetio, Italio, Ĉinio kaj Hungario, kiuj gajnis la kvar unuajn lokojn en la Internacia Konkurso


de Naĝilnaĝo, 1986. Ĉifoje ili sendis siajn plej fortajn sportistojn por partopreni la konkurson. Tial la ĉifoj konkurso estis la plej altnivela.

Kiam Ĝeng Ŝiju estis 12-jara, ŝi eniris en la naĝkurson de la Ljaŭjang-a Sporta Mezlernejo kaj fariĝis membro de la Ljaŭning-a Teamo de Naĝilnaĝo, kiam ŝi estis 13-jara. La naĝilnaĝo estas nova sporto tre peniga. La naĝilnaĝistoj devas porti platformajn piednaĝilojn el vitroplasto. Dum la naĝado la sportistoj devas meti siajn piedojn en ilin kiel fiŝvosto. La naĝis-

toj antaŭen naĝas frapante akvon, ĉefe per fortoj de la talio, ventro kaj ambaŭ kruroj. Iuj knabinoj forlasis la teamon pro tio, ke ili ne eltenis la penigan trejnadon.

"Mia trejnisto postulas, ke mi ekzercu min kune kun la knaboj ne nur tage, sed ankaŭ vespere." Ĝeng Ŝiju diris. Ŝi povas rigardi filmojn kaj televidelsendon nur dimanĉe kaj en aliaj tagoj ŝi devas sin ekzerci.

Ŝi estas ĝoja en venko de malfaciloj, kaj iam, kiam ŝi tro laciĝis, ŝi iel artifikis.



Geng Ŝiju kaj ŝia trejnisto Ĝang Ĵuanmoŭ

En unuhora ekzercado ŝi devas naĝi 10000 metrojn. Foje ŝi rimarkis, ke trejnisto Ĝang ne atentis ŝin, ŝi do returniĝis, ne atinginte la celon. “Jen, mi finis mian naĝadon!” ŝi diris al la trejnisto.

Rigardinte la klikhorloĝon,

trejnisto Ĝang Ĵuanmoŭ diris: “Ha, vi superis la mondan rekordon je dekoj da sekundoj!” Ĝeng ruĝiĝis de honto. Ŝi estis klara, ke ŝiaj trompoj ne sukcesos kaj ŝia trejnisto estas severa, tamen ŝi restis tiel petola kelkfoje.

Tiu ĉi 19-jara rekordulino iam estis severe punita de la trejnisto pro ŝia malbona ekzercado. Ekz., ŝi naĝis je 100 metroj malpli ol la difinita distanco, ŝi devis kuri 1000 metrojn surtere. Trejnisto Ĝang opiniis, ke malsama fizika ekzercado iaforte postulas egalan fizikan forton. Bonaj sukcesoj baziĝas sur rapida kurado. Foje li ordonis al ŝi senhalte kuri 20000 metrojn. Rifuzinte plurajn indulgpetantojn, li insistis kaj ŝi kuris de la 17-a ĝis noktiĝo.

Saĝa kaj sagaca, Ĝeng bone konsilas sian trejniston. “Se li ne tiel traktus min, mi ne atingus bonan sukceson.” En la trejnado, la piednaĝiloj vundis ŝian piedhaŭton, sed ŝi ne plendis. Post la ekzerco, ŝi sentis, ke ŝiaj gamboj fariĝis tre pezaj, sed ŝi eltenis tion, kunpremanante siajn dentojn.

Trejnistino Ĝang opiniis, ke ŝi povis rompi 3 mondajn rekordojn ĉefe pro ŝia aktiva kunlaboro kun la trejnisto. Li kredas, ke ŝi refoje rompos la rekordon en la Internacia Ĉampioneca Konkurso de Naĝilnaĝo post du jaroj.

ABONU KAJ ABONIGU EPĈ KUN NOVA ASPEKTO!

Laŭ proponoj de legantoj la redakcio de EPĈ aperigos sian revuon en nova aspekto:

Ĝi ŝanĝos paperon, prenos alian preson, pliiĝos 8 paĝojn da koloraj bildoj kaj altigos la kvaliton de nigra-blankaj bildoj.

Ĝi pli multe raportos pri Esperanto kaj publikigos artikolojn de diverslandaj esperantistoj- eminentuloj.

Ĝi objekte raportos pri diversaj ŝanĝiĝoj en la nuna Ĉinio kaj pri la vivo kaj laboro de ordinaraj ĉinoj.

Ĝi aldonos jenajn rubrikojn: “Laŭ la Suda Silka Vojo”, “Angulo de Esperantistoj-Eminentuloj”, “Facetoj de la Ĉina Socio”, “Intervjuo”, “La Imperiestra Palaco” kaj “Eksterlandanoj pri Ĉinio”.

Li Ju kaj Aliaj Ci-istoj de la Suda Tang-regno

de MEJ ĜI

En la lastaj jaroj de Tang-dinastio (618-907) aperis granda separatisma situacio en la ĉina historio. En mallonga periodo de 60 jaroj kvinfoje ŝanĝiĝis la dinastioj en norda Ĉinio kaj aperis dek malgrandaj separatismaj regnoj en la sudo. Tio estis la periodo de Kvin Dinastioj kaj Dek Regnoj.

Dum tiu periodo, la nordo troviĝis en konstanta milita haoso. La tieaj agrikultura produktado kaj urba komerco estis ekstreme serioze detruitaj. Pro la norda milito en fora loko, la sudo troviĝis en relativa stabileco, precipe la regnoj Okcidenta Ŝu kaj Suda Tang. La ekonomio kaj kulturo de tiuj du regnoj prosperis kaj ili fariĝis siatempe du ekonomiaj centroj. La Hŭaĝjan-skolo, priskribita en la lasta numero de nia revuo, konsistis el ci-istoj aperintaj en la poezia rondo de la Okcidenta Ŝu. La aliaj iom malpli frue aperintaj ci-istoj vivis en la Suda Tang. La historiistoj nomis ilin Sud-Tang-aj ci-istoj. El ili la gravaj personoj estis Feng Janĵi, Li Ĝing kaj Li Ju. Inter ili Li Ju havis plej grandan sukceson kaj plej grandan influon.

En sia frua periodo la Suda Tang estis potenca, sed en la posta reg-periodo de la imperiestro Li Ĝing (916-961), ĝi komencis esti minacata de la nordaj imperioj kaj malfortiĝis pli kaj pli, fine ĝi devis fleksiĝi kaj ĉiujare tributi al la nordaj imperioj por sia ekzistado. En la danĝera situacio ĝiaj regantoj daŭre vivis diboĉe kaj sin amuzis senfine, dume ili ankaŭ montris sian malesperon. Tio estis la sentimentala bazo de la ci-oj de la Suda Tang. Kvankam Li Ĝing postlasis nur kvar ci-ojn, kiuj tamen montris tiun trajton de la tiamaj ci-oj. Ekz., lia reprezenta verko "Hŭanŝjiŝa"

*Jam malaperis la aromo de l' lotusoj velkaj,
Ĉagrenas blovo okcidenta el la ondoj verdaj.
Forpason de l' junulaj jaroj sekvas jam kadukaj,
Ŝi songis ĵus pri l' fora Nordo dum la pluv'*
subtila,
*En frosta la ĉambret' turmentas ŝeng-muzik'*¹
korŝira.

Kiom da larmoj ĉe la balustrado elverŝiĝis

De ŝi kun kor' sopira...

priskribis malĝojon de adiaŭo, la pejzaĝo kaj sento teksis kortuŝan bildon. Precipe la duversoj

Ŝi songis ĵus pri l' fora Nordo dum la pluv'
subtila,
En frosta la ĉambret' turmentas ŝeng-muzik'
korŝira.

havis profundan sencon kaj estis multe admirata. La du versoj bildigis profundan sopiron. La muzikajo en malvarma nokto sentigis fortan malĝojon. La sufoka kaj trista etoso ĝuste spegulis la koron de la aŭtoro.

Feng Janĵi (904-960) postlasis pli ol cent ci-ojn. Li iam estis ĉefministro de la Suda Tang. Liaj ci-oj plejparte priskribis diboĉan vivon de burokratoj. Ili temis ĉefe pri virinoj kaj amo. Estis admirinde, ke liaj nemalmultaj verkoj havis gracion kaj buntan trajton, kaj li turnis sian atenton de priskribo pri la aspekto kaj vestoj de virinoj al tiu pri la neforgesebla malĝojo de la herooj. Liaj pli ol dek ci-oj "Ĉjŭetaĝi" estas plej eminentaj, jen unu el ili:

*Kien dum tagoj nube migris la diboĉa viro?
Forgesis li eĉ pri hejmmreiro,
Kaj ne rimarkis pri l' printempa fino...
Sur lia vojo flore logas ja amoroj.
Ĉe kies pordo restas lia luksa veturilo?
Kun larmoj ŝi murmuris sur balkono en sol-staro.
Alflugas hirundparo?
"Ĉu vi renkontis lin sur vojo?"
Tumultas la ĉagrenaj sentoj kiel salikfloroj.
Ne eblas por ŝi lin trovi eĉ dum songaj horoj.*

Lia alia ci-o "Jeĝinmen":

*Subite vent' ekblovas,
Ondetojn en lageto plise ĝi ekmovas.*

Jūanjang-oj³ ŝi kondukas en florpaddon preter volo,
 Enmane dispremiĝas abrikota floro.
 Ĉe anaslukt-barilo⁴ jen ŝi staras sola.
 Kliniĝas jasp-harpinglo ŝia altvalora.

Ŝi sopiradas sian sinjoron, vidi lin ne povas.

*Aŭdiĝas piga pep*⁵—*aŭgur' favora.*
 priskribis junan virinon. Je la komenco printempa
 vento sulkigis la lagetan akvon, kio ekscitis la koron
 de la heroino. Poste ŝiaj movoj rezultis de ŝiaj sopiro
 al la edzo kaj melankolio. La lasta verso ŝanĝis la
 melankolian etoson per "Aŭdiĝas piga pep'pepon",
 estigis la esperon pri la reveno de ŝia edzo kaj forigis
 ŝian melankolion. Ĝi eble estas unu el la nemalmul-
 taj konservataj ci-oj de la Suda Tang kun iom gaja
 koloro.

Li Ju (937-978) estis la lasta imperiestro de la
 Suda Tang. Kiam li surtroniĝis en la jaro 961, lia
 ŝtato Suda Tang jam troviĝis en danĝera situacio. Li
 Ju travivis pli ol dek jarojn en humiliĝo. Unuflanke,
 li estis maltrankvila pri la sorto de sia regno, ali-
 flanke, li laŭeble ĝuis la luksan vivon kaj imperies-
 tris pli ol dek jarojn en diboĉa vivo. La Suda Tang
 fine estis pereigita de la armeo de Song-imperio,
 ankaŭ li estis kaptita kaj spertis vivon de kaptito pli
 ol du jarojn. En 978 li estis venenita de sendito de
 la imperiestro Tajzong de Song-dinastio.

La abrupta ŝanĝiĝo evidente influis la verkadon
 de Li Ju. Liaj ci-oj en la antaŭa kaj posta periodoj
 diferencis unuj de la aliaj. Tiuj de la antaŭa periodo
 prezentis ĉefe la palacan vivon kaj montris lian
 fortan inklinon al la luksa vivo. La reprezentaj
 verkoj de tiu periodo "Juloŭĉun"

La haŭto neĝe blankas post la tualet' vespera,
En la palac' printempa flirtas virinaro bela.
La blovaj instrumentoj sonas ĝis la horizonto,
Vibradas tra l' aero Niŝang⁶, dancmuzik' ĉiela.
La sun' levigis jam tri ĝang-ojn⁷ en matena horo,
En la orfornojn aldoniĝis best' de bonodoro⁸.
Ĉifiĝis la tapiŝ' ruĝsilka pro la danc-fervoro.

...
 priskribis pimpan, tedan kaj diboĉan vivon en lia
 palaco.

Kun senĉesa malfortiĝo de la ŝtato Li Ju iom post
 iom konsciis pri sia fatalo, tial en liaj verkoj aperis
 versoj plenaj de tristo, ekz., "Ĉingpingjue":

Jam duonpasis primavero,
Post la disiĝ'; tristplenas tuta l' tero.
Sub la perono umefloroj flirtas kiel neĝeroj,
Mi ree de ili plenas baldaŭ post forpelo.

Informon ne alportas al mi la sovaĝanseroj⁹.
Reven' ne eblas por l' foreco eĉ dum songapero.
Al verdaj herboj ja similas la disiĝ-ĉagreno,

Abundas ĉie en printempo sur la tuta tero.

Kvankam ĝi prezentis tristan disiĝon, tamen la fal-
 intaj floroj, "Mi ree de ili plenas baldaŭ post forpe-
 lo", kaj la printempaj herboj "Abundas ĉie en prin-
 tempo sur la tuta tero." jam sentigis la malordan kaj
 pezan korsenton de la aŭtoro.

La plej bonaj ci-oj de Li Ju estis verkitaj post lia
 kaptiĝo. Dum tiu periodo li havis grandan suferon
 de karceriĝo kaj ofendiĝo kaj spertis mizeran vivon
 neordinaran, precipe por imperiestro. Tia travivaĵo
 ebligis al li verki verkojn plenajn de profunda mal-
 ĝojo. Ekz., la fame konataj ci-oj "Jumejjen"

Kiam finiĝus lun' aŭtuna kaj printempaj floroj?
Kiom da pasintaĵoj en memoro?

*Ĉambreton mian lastanokte eostvent*¹⁰ *reblovigis,*
En luna nokto pri l' Patrio pensi mi ne povis.
Kredeble restas l' jadŝtuparo de l' palacpejzaĝo,
Sed jam ŝanĝiĝis mia junvizaĝo.

Vi min demandas: "Kiom da ĉagreno nun
vi sentas?"



*Similas ĝi printempan riverakvon, kiu al la mar'
torentas.*

kaj "Langtaŭŝa"

Susuras pluvo ekster la kurteno,

Printempo estas jam en sveno.

*Silk-litkovril' tro mincas¹¹ kontraŭ frosto de l'
mateno.*

En sonĝo mi ne konsciis, ke mi estas gasto,

Kaj dronis en plezur-mielo.

Senlima Patri-tero,

Facilas vin forlasi, male via reapero!

Forpasis kiel flu' printempo kun velkintaj floroj,

La mond' for-distas de l' ĉielo!

klare montris la triston de malfeliĉulo. Per komparoj de vivaj figuroj kaj forta arta ĝeneraligo li esprimis pezan triston. Per "velkintaj floroj" li prezentis la forpasintan kaj nerevenigeblan ĝojon, per "printempa riverakvo" li prezentis la senfinan triston. Ĉio ĉi tio donis al liaj verkoj kortuŝan forton kaj fortan artan efekton. Ĝuste pro tio, en la pasinta longa tempo, la ci-oj de Li Ju vekis iagrade simpation ĉe nemalmultaj personoj. Per liaj versoj iuj prezentis sian similan senton por rememori pri sia pasinta bela okazaĵo.

La ci-oj de Li Ju havis neignoreblan pozicion en la klasika literatura historio de Ĉinio. Krom la arta sukceso de liaj ci-oj, komence de Li Ju, la ci-oj rompis la antaŭajn kutimojn kaj en la temoj kaj en la enhavo. Ili sin liberigis el priskribo pri virinoj, amo kaj similaj, pliigis la povon de ci-oj en prezentado de la vivo kaj esprimo de la sentoj. dank' al tio la ci-oj ekhavis la pozicion, same kiel la klasikaj poemoj, en la literatura historio de Ĉinio.

1. Seng-o estas muzikilo kun ĉ. 15 tubetoj anĉ-havaj, kiuj povas produkti



je blovo sonojn similajn al tiuj de buŝharmoniko.

2. Hirundparo simbolas por ĉinoj paron de geamantoj.

3. Ĵuanjang-oj (Aix galericulata) — speco de akvobirdoj, kiuj kutime vivas en paro kaj estas rigardataj de ĉinoj kiel simbolo de fidela amo.

4. Anaslukt-barilo — ĉirkaŭbarilo en kiu luktas anasoj por amuzo de gesinjoroj en antikva Ĉinio.

5. Piga pepo estas rigardata de ĉinoj kiel bona aŭguro pri alveno de karuloj aŭ gastoj.

6. Niŝang — fama muzikaĵo en Tang-dinastio.

7. Gang-o = 3 1/2 m.

8. Besto de bonodoro — bestforma briko el bonodora materialo kiu ellasas aromon je brulado.

9. Sovaĝanseroj estas rigardataj de ĉinoj kiel kurieroj por geamantoj.

10. eosto = oriento

11. minci = esti maldika

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: unu internacia respondkuponon por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Fresfondita Esperanto-rondeto (40 infanoj, 10-14-j.) dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj kun samaĝuloj. Skribu al rondet-gvidanto Valerij Malihin, Esperanto-rondeto, Dvorec Pionerov, ul. Konstitucii, 1, Krasnojarsk, 660049 USSR.

* Geesperantistoj (20-70-j.) de Pollando dez. kor. tutmonde pri E-literaturo, poezio, E-movado, kutimoj kaj interŝ. bildkartojn, poŝtmarkojn ktp. Adr.: Polski Związek Esperantystow, 33-100, Tarnow, skr. poczt. 79. Pollando.

* S-ro Aleksej Ĵuravlov (31-j. teknikisto-priservanto de telefonoj) dez. kor. pri literaturo, poezio, fantasto, politiko kaj interŝ. bk. Adr.: ul. Krasnoj Armii

15-61, Krasnojarsk SU 660021, USSR.

* S-ro Aleksandr Tulupov (29-j. elektroveldisto) dez. kor. pri ĉiuj temoj kaj interŝ. bildkartojn. Adr.: P.K. 2938

Krasnojarsk-10, 660010 USSR.

* Dmitrij Poljakov (22-j. instruisto) kaj lia edzino Svetlana Poljakova (24-j. oficistino) dez. kor. pri E-kantoj, emblemoj, E-familioj. Adr.: ul. Marksa 19-25, Krasnojarsk SU 660049, USSR.

* S-ro Eduard Pronjkin (49-j. trejnisto) dez. kor. pri sporto kaj E-kantoj. Adr.: ul. Kolomenskaja 18-7, Krasnojarsk SU 660037, USSR.

ELEKTITAJ CI-OJ EL LA SUDA TANG-DINASTIO

LAŬ MELODIO “ĈINGPINGJŬE”

de FENG JANJI

*Post pluv', serenias en vesper' nebula.
Basen' plenplenas de pluvakv' lazura.
En korton de salikoj flugas hirundparo.
De l' pavilono rul-levitas la kurten' piktura.*

*Si solas ĉe la ruĝa balustrado en vespero.
La ark' novluna okcidentas en ĉielo.
Sub la perono falaj floroj dancas en la vento.
En silkajn vestojn froston trudas primavero.*

LAŬ MELODIO “ĈJŬETAĜI”

de FENG JANJI

*Ja kiu diras, ke pelitas for jam la ĉagreno?
Ĉiufoje, je printempeveno
Turmentas ree tiu sent' en pleno.
Ĉiutage antaŭ floroj kuŝas ofte la drinkulo,
Malgrasan vizaĝbilon montras la spegulo.*

*Smeraldas herboj sur la bord', salikoj sur la digo.
Respondu al mi, ho, amiko,
Kial po-jare ĉagren-renovigo?
Mi staras sola ĉe ponteto, ventoplenas domo,
La nova luno orfas super la arbar' sen homo.*

LAŬ MELODIO “ŬANGĜJANGNAN”

de LI JU

*Ho, kiom da ĉagreno,
En lasta nokto pro la sonĝosceno:
Mi faris reviziton al la palaco-ĝardeno.*

*Torentis veturiloj, drake viglis la ĉevaloj,
La lun' kaj floroj belis en plenpleno.*

*Ho, kiom da larmeroj
Trafluis la vizaĝon kiel montriveroj.
Ne preparolu korajn sentojn dum larm-torentado,
Ne blovu belan melodion ŝengan-an*
dum la plor-sufero.
Rompigus ja la koro sen dubero.*

LAŬ MELODIO “ŜJANGĜJANHŬAN”

de LI JU

*Senvorte iris sola mi sur la balkonon,
Vidiĝis ark' la luna.
Kviete staris sterkulio en la kort' aŭtuna.
Ekde l' disiga horo
Ĉagreno malgraŭ volo
Senĉese min turmentas.
Neesprimeblas l' eksterordinara sento en la koro.*

LAŬ MELODIO “ĈANGŜJANGSI”

de LI JU

*Montaro post montaro,
Multoblas ja la baro.
Malvarmas l' akvoj kaj nebulo, altas la ĉielo.
Sopiro pro l' folioj ruĝaj de acero.*

*Prosperis krizantemoj,
Velkiĝas krizantemoj.
De l' nord' sovaĝanseroj sed ne mia vir' revenas.
Je vento kaj lunlum' la ĉambro plenas.*

Elĉinigas LAŬLUM

*Ŝeng-o -- ĉina blovinstrumento kun anĉ-havaj tubetoj, kies sonoj similas al tiuj de buŝharmoniko.

KORPO-SANIGAJ METODOJ (IV)

Digesta sistemo

LIENO KAJ STOMAKO

1. Staru rekte. Turnu vin maldekstren kaj rekte etendu la maldekstran manon maldekstren, fleksu la dekstran manon maldekstren kaj tuj prenu la pozon de rekta staro. Etendu la du manojn horizontale ambaŭflanken kruco ilin antaŭ via brusto kaj tiru ilin unu la alian por kelka tempo. Atentu, ke vi devas laŭeble teni la antaŭan pozon, teni la spiradon kaj forton en stabileco. Turnu vin dekstren kaj rekte etendu la dekstran manon dekstren. Faru la movojn po 21 fofojn. Fine malrapide disetendu la manojn antaŭen ambaŭflanken. Malstreĉu kaj la menson kaj la korpon. Skuu la supran korpoparton maldekstren kaj dekstren po 21 fofojn. Tio povas likvidi la mal komforton de la stomako, brakoj kaj talio.

2. Antaŭ kaj post la manĝado, sidu kun ambaŭ genuoj ĉirkaŭprenataj per la manoj. Klinu la korpon dekstren kaj maldekstren. Elstarigu la ventron kaj rektigu la

talion. Klinu la korpon maldekstren 21 fofojn kaj dekstren 14 fofojn. Laŭeble tuŝnu la trunkon kaj prenu la lumbajn vertebrojn. Tio povas likvidi la stagnan gason en la stomako kaj ventro, kuraci stomakan ŝveliĝon, malbonan apetiton kaj misfunkcion de la stomako kaj intestoj, malharmonion en la funkcio de la internaj organoj.

3. Sidu kun rektigita talio, levu la dekstran manon kun la manplato supren, subtenu la maldekstrajn ripojn per la maldekstra mano (Bildo 1). Longe enspiru 7 fofojn per la nazo. Tio povas likvidi la stomakan malvarmon kaj dispepsion.

ABDOMENO

1. Surgenuiĝu kaj reguligu la animstaton per la menso por ke la vitala energio senĉese disiĝu al la tuta korpo kaj fine malleviĝu al la piedoj. Post tio malrapide stariĝu, metu la du manojn ambaŭflanken de la ripoj, kvazaŭ la manplatoj en- kaj elspirus senĉese. Kiam vi sentas streĉitecon de la vangoj,

movu la dorson, kliniĝu al la tero (Bildo 2). Tion faru 21 fofojn. Tio povas senigi malvarmon de la genuoj, kuraci malsanon de urina veziko, rigidecon de talio kaj dorso, malvarmon malsupre de la umbiliko.

2. Kaŭriĝu kaj estu trankvila. Fleksu la brakojn kaj metu la manojn unu sur la alian prenu ilin sur la bruston. Puŝu la manojn malsupren kelkajn fofojn. Svingu la brakojn dekstren kaj maldekstren por ke la trunko turniĝu kelkajn fofojn. Fine klinu la kapon al la ventro. Frote puŝu la manplatojn sub la ripoj al subventro laŭ ĉongmaj-vojo ambaŭflanke de la meza linio de la abdomeno. Puŝu supren kaj malsupren 21 fofojn. Tio povas kuraci ventran ŝveliĝon kaj dispepsion.

3. Se vi estas tro sata kaj sentas vian ventron ŝvela, vi sidu kun rektigita talio. Per la buŝo enspiru dekojn da fofoj kontinue. Plenenspirinte, vi elspiru. Tion faru ĝis tiam, kiam vi sentas vin agrabla. Se vi sentas vin malagrabla en la ventro pro malvarmo, vi ankaŭ povas ekzerci vin per tiu ĉi metodo.

4. Se vi sentas, ke via ventro ŝveliĝas de gaso, antaŭ ĉio varmigu la piedojn kaj poste masaĝu la supran kaj malsupran ventron kaj la akupunkturajn punkton *ĉjihaj* (malsupre de la umbiliko je ĉ. 2 cm.). Pli multa masaĝo estas bona (Bildo 3), sed ne malpli ol 21 fofojn dekstren kaj maldekstren.

(Daŭrigota)



1



2



3

SUZHOU

*Suzhou, Sudzou, Souchow--
kiel ajn oni vin literumu
kaj kiel ajn oni vin prononcu,
vi restos tio, kio vi estis
dum du mil kvincent jaroj:
la plej ĉarma, la plej alloga
kaŝloko de l' olda Ĉinio.*

*Via beleco varias
samkiel via literumo,
dum vian veran esencan
respegulas la du ideogramoj
restintaj senŝanĝaj.*

*Jam ekde jarcentoj
oni nomas vin Venecio
de l' Malproksima Oriento.
Devis esti Marco Polo mem,
kiu unua nomis vin tiel,
kvankam li ne vin urbestris,
sed Yangzhou, en malproksim' ne troa.*

*Ĉi-tie ĉie, ĉie verdas.
Verdas nature kaj esperante,
verdas arboj, arbetoj, arbedoj,
verdas herbejoj kaj razenoj
en la abundo de l' ĝardenoj.
Kaj inter la vera, verdanta verdo
ofte ekrozas kaj rozkolora gloras
osmanto, pimpe levigante el sia
arbeda humideco, ĉu rosa ĉu pluva
super la gregoj da nimfeoj aŭ nufaroj
silente flosantaj en marĉaj lagetoj.*

*La posttagmeza varmo humidas
eĉ sub karesoj de leĝera brizo
dum mi paŝas tra ĝardenaj padoj
en la urbo de tricent ĝardenoj
--ĉu ĉiu el ili estis fondita
en 514 antaŭ Kristo kaj kultivita
de Song, Yuan, Ming kaj Qing dinastioj? --
laŭlonge de padoj mozaike pavimitaj
el ŝtonetoj sepiaj kaj brunaj,
kiuj krokizas drakojn, florojn,
testudojn kaj aliajn kreaĵojn
sub miaj senlacaj plandoj.*

*Mi vane klopodas elĉifri
blankajn ideogramojn antikvajn*

*ĉizitajn en nigra ŝtontabulo
apude staranta,
dum la suno ŝajnas enpenetradi
ĉiujn porojn de mia esto,
sed ĉi-tie ne licas laci--
ĉar ne endas ripozi.*

*Sur la Granda Kanalo
videblas nun junkoj kaj barĝoj
plenaj de karbo, ligno aŭ melonoj,
sed ne gondoloj--
ĉinaj geamantoj ja ne emas
publike afiŝi
siajn sentojn kaj dezirojn.
Laŭ la ĉina tradicio, Eroso
povas liberi, eĉ liberegi,
sed nur inter kvar muroj
de onia privateco.*

*Suzhou, Sudzow, Souchow,
oni vin nomas Venecio
de l' Malproksima Oriento --
sed oni ankaŭ nomas vin
Paradizo sur la Tero.
Tial mi, starante sur unu
el la volbaj marmoraj pontoj,
ekplongas en meditado,
kaj subite demandas min mire:
"Kie do estas mia Eva?"*

*Konsole kaj trankvilige
lirlas torenteto elŝprucanta
el fontano kaj lulas min
al kvieto kaj malstreĉiĝo.
De temp' al tempo la lirlado
kontrapunktas kun zumado
de cikadoj, kiuj neniam
dormas, zumante tage kaj nokte.*

*La zumado cikada
akompanas min ĉie tra la urbo,
ĉar la gezumantoj nestas en ĉiuj urbaj
verdaĵoj, sed ekdormas nur vintre.*

*La paradizo sur la Tero
verdas zumante
kaj zumas verdante
en humida varmo posttagmeza.*

ANTIĤVAJ BRONZAĴOJ DE ĈINIO

de LIŬ ŜJAŬDAJ kaj ŜANG JANG

La antikvaj bronzaĵoj de Ĉinio, kiaj laboriloj, kuiriloj, vinuoj, vazoj, armiloj kaj muzikiloj, estis ĉefe el kupro-stana alojo. Tiuj bronzaĵoj estas famaj pro la multeco de la specoj kaj fajneco de produktado. Ĉar la ĉinaj bronzaĵoj originis de malproksima antikveco, tial la metiistoj posedis rafinitan teknikon en kelkmil-jara produktado kaj formis originalan tradicion. La teknologio, formoj kaj desegnaj ornamaĵoj de bronzaĵoj havis sian propran stilon kaj sin diferencigis de la aliaj artoj en la monda belarta historio. Ĉinio estas multnacieca lando. La kreiva aktivado de la diversnaciecaj metiistoj multe riĉigis la antikvajn bronzaĵojn de nia lando.

La antikvaj bronzaĵoj de Ĉinio plejparte surhavis bildojn sur siaj ventro, kolo, piedoj, soklo kaj kovrilo. La bildoj povas dividiĝi en tri specojn: geometrian, animalan kaj tiun de homaj aktivadoj. La geometriaj bildoj inkluzivas tiujn strian, buletan, nuban, vortican, ŝnurajn, skvaman, rubandan, ondajn k.a. La animalaj bildoj inkluzivas tiujn bestokapan, drakan, serpentan, birdan, elefantan, fiŝajn k.a. La bildoj de homaj aktivadoj inkluzivas festenon, ĉasadon, batalon k.a. Multaj bronzaĵoj surhavis skribaĵojn, kies enhavo estis kulto,

instrukcio, batalo, premiado, titolo, alianciĝa ĵuro, kontraktado ktp. La plej simpla skribo havis nur unu aŭ du ideogramojn montrantaj la nomon de la mastro aŭ klano de la objekto.

Historiaj materialoj diras, ke Ĉinio komencis muldi bronzaĵojn jam antaŭ longe. Tio estis jam konstatita de bronza tranĉilo muldita en 3000 a. K., elterigita el ruinoj de Maĝjajaŭ-kulturo de Gansu-provinco en 1975. La pli posta Ertitoŭ-kulturo kun Erlitoŭ-ruino de Henan-provinco apartenis al bronza periodo. Inter la bronzaĵoj de Erlitoŭ-kulturo estis vinuoj kaj aliaj ujoj, krom laboriloj, armiloj kaj ornamaĵoj. La tiamaj bronzaĵoj, maldikaj, simplaj, senornamaj aŭ ornamitaj nur per buletaj desegnoj, estis faritaj per pluraj muldiloj. Estas rimarkinde, ke iuj Erlitoŭ-aj bronzaĵoj inkrustigis per turkisoj. Iu ronda plato kun multaj kruciĝaj desegnoj en plurtavolaj cirkloj el turkisoj kaj alia oblonga plato plena de belaj bestokapaj desegnoj el turkisoj havas altan valoron de arto.

En Ŝang-dinastio (la 16-a jc—la 11-a jc a.K.) la bronzaĵo-farado eniris en sian prosperan periodon de la disvolviĝo. Ĝi dividiĝis en du etapojn: Erligang-etapo kaj Jin-

ruina etapo. La bronzaĵoj de Jin-ruina etapo markis prosperiĝon de ĉinaj antikvaj bronzaĵoj en la historio. La bronzaĵoj de Erligang-etapo de Ŝang-dinastio estis multspecaj, maldikaj kaj plastike harmoniaj. La tiamaj modaj desegnoj kun fluaj strekoj estis rubandaj bestokapoj kun perlaĵoj supre kaj malsupre. En Erligang-etapo oni jam povis muldi grandajn bronzaĵojn. En 1974 elterigis du grandaj kvadrataj *ding*-oj (kuiraj kaldronoj) en Henan-provinco, el kiuj unu 100 cm. alta kaj 82.4 kg. peza estas maldika kun ventro profunda, piedoj malplenaj kaj altaj teniloj ĉe la rando. Tiutempaj bronzaĵoj ekhavis mallongan epigrafon ĉefe en hieroglifaj kaj ideografiaĵoj, similaj al skribaĵoj sur testudaj ŝeloj kaj ostoj.

La muroj de bronzaĵoj de Jin-ruina etapo fariĝis dikaj kaj multformaj, ne nur kun tutkorpaj desegnoj, sed ankaŭ kun fonaj desegnoj, kaj eĉ pompaj desegnoj sur desegnoj. Oŭfangji (vinujo) de Jin-ruina Fuhaŭ-tombo elterigita en 1976 forme similas al oblonga domo. Ĝia kovrilo aspektas kiel kvarklina tegmento kun elstaraj ĉevronoj ĉe la rando. Sur la tiamaj bronzaĵoj eĉ vidiĝas bildoj de konstruaĵoj. Sur la bronza vinujo Oŭfangji estas paro da bestokapoj kun

buŝo malsupren, staranta birdo, fiŝagla kapo, elefanta kapo k.a. La desegnoj estas tre komplikaj kaj riĉaj je mistikeco. Komplikeco, mistikeco kaj feroceco estis elstara trajto de la tiama bronza arto.

La plurmuldila mulda teknologio de bronzaĵoj en Ŝang-dinastio atingis altan nivelon. La bronzaĵ objektoj estis multspecaj, multnombraj, plastike seriozaj, desegne komplikaj kaj mulde delikataj. Ekz., vazo kun kolono volvita de drako elterigita el Jin-ruino havas en sia ventro starantan floron volvititan de drako. La floro estas turnebla. El Jin-ruino oni elterigis ankaŭ malmunteblan maldik-kolan vinkruĉon. Krome, troviĝas nemalmultaj bestoformaj vinujoj, similaj al skulptaĵoj. Rimarkinda estas iu vinujo kun kurb-kornaj ŝafoj sur la kvar flankoj. La dorso kaj brusto ornamigis per skvamoj kaj ties antaŭaj kruroj similas al piedoj de longkresta birdo. La soklo de la vinujo surhavas desegnojn similajn al drakoj. Kun reliefo kaj linia gravuroj ĝi estis rigardata kiel raraĵo el bronzaĵoj de Ŝang-dinastio. Tiu-tempaj bronzaĵoj fariĝis pli grandaj. La granda *ding*-o Simuu (aŭ Hoŭmuu) elterigita el Jin-ruino,

133 cm alta, 875 kg peza, estas la plej granda bronzaĵo ĝis nun trovita. Muldi tiel grandan pezaĵon postulis altan teknikon kaj sperton por organizi la laborfortojn.


En Ĝou-dinastio (la 11-a jc ĝis 256 a. K.), la bronzaĵ-arto ekhavis novajn trajtojn. La fruperiodaj bronzaĵoj de la Okcidenta Ĝou-dinastio estis karakterizitaj per komplika kaj pompa stilo en ornamaj desegnoj same kiel tiuj en Ŝang-dinastio. Sed poste la desegnoj de la bronzaĵoj fariĝis simplaj iom post iom. La okulfrapa trajto de bronzaĵ objektoj en tiu periodo estis longa epigrafo sur ilia korpo kun strekoj firmaj kaj fortaj. Ekz., sur la *ding*-o Daju legiĝas 291 ideografiaĵoj, sur la *ding*-o Ŝjaŭju 390 ideografiaĵoj. La valoro de la tiama bronzaĵoj montriĝis ĉefe en iliaj epigrafoj kun enhavo ĉioamplaksa. Ili jam fariĝis gravaj materialoj por la posteuloj en studo de la tiama historio kaj la ĉina antikva kaligrafio. La bronzaĵoj de la Okcidenta Ĝou-dinastio plejparte apartenis al la reĝa familio kaj ĝiaj vasaloj. En la Orienta Ĝou-dinastio (770 a.K.— 256 a.K.) ankaŭ la vasalaj regnoj ekhavis multajn bronzaĵojn. Pro tio la bronza-

ĵoj ekhavis lokajn kolorojn.

En la periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770 a.K.—221 a.K.) la ĉinaj bronzaĵoj atingis sian alian prosperiĝon. Tiam la bronzaĵoj estis multaj en specoj, variaj en formoj kaj diversaj en ornamo. En ĉiuj tiuj flankoj ili superis tiujn en la pasinta periodo. Aperis damaskonado. Oni multe aplikis damaskenadon, reliefon kaj ajuran gravuradon. Dank' al invento de luta tekniko, furoris bronzaĵ objektoj muntitaj per ornamaĵoj de tridimensiaj animaloj. Ekz., en Henan-provinco oni elterigis bronzan kruĉon kun gruo sur la kovrilo, dutavolaj lotusfloraj petaloj sur la aperturo kaj drakoj sur la korpo, la du ajuraj teniloj en formo de drakoj kaj du kuŝantaj bestoj sube. Krom la desegnaj lotusfloraj petaloj, la aliaj ornamoj estas solidaj figuroj, precipe la staranta gruo kun levita kapo kva-zaŭ ĝi laŭte krius. Ili plene montris skulpturan talenton de la metiartisto. Oni ankaŭ aplikis lutadon en ornamado de la soklo. Ekz., La Bronza Lanterno-trio prenas starantan homon kiel sian korpon kun tri lanternoj supre. La homfiguro kun arĝenta kapo kaj brilaj okul-

La pelvo Ŝiĉjang





Desegno sur bronza vinujo (La periodo de Militantaj Regnoj)

Bronza domo kun orkestro (La periodo de Militantaj Regnoj)

globoj el nigraj gemoj ridetas senĝene, tenante lampo-stangon per dekstra mano. Serpento kun levita kapo, volvrampanta sur la stango persekutas simion, sur la stango la simio retrorigardas malsupren. La maldekstra stango konsistas el du serpentoj, el kiuj unu rampas de la suba telero supren, la alia rampas suben de la supra telero al la homfiguro, sed ĝi estas firme kaptita de la homo per la maldekstra mano je ĝia kolo. La bronzaĵo similas al akrobata ludo. La figuroj estis delikate faritaj. Ĝi estas praktika kaj bela majstra metiartaĵo, lerte projektita. La tiamaj bronzaĵoj en animala formo jam atingis altan nivelon, ekz. vinujo en formo de fortika, vigla rinocero elterigita en Ŝingping estas plene kovrita per damaskenitaj nubaj desegnoj.

Post la dinastioj Ĉin kaj Han (221 a.K.—220 p.K.), la bronzaĵoj estis iom post iom anstataŭitaj de feraj, lakaj kaj porcelanaj objektoj,

sed la bronza arto ankoraŭ havis novajn kreaĵojn. Ekz., la bronzaĵoj ĉaroj kaj ĉevaloj elterigitaj ĉe la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio en Ŝenŝji-provinco estas strukture komplikaj grandaj bronzaĵoj el pluraj partoj. Ili estis kolore pentritaj sur la tuta korpo. La ĉaroj surhavas ĉefe nubajn kaj rombajn desegnojn grandajn kaj delikatajn. La bronzaĵoj elterigitaj en 1968 el la tombo de la princo Ĝing en la regno Ĝongŝan de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.—25 p.K.) atestis, ke tiam oni multe aplikis damaskenadon, orumadon kaj inkrustadon en farado de bronzaĵoj. Ekz., la damaskenita forno "Boŝan" kun aĵura soklo sube, inkrustitaj desegnoj tutkorpe, kaj pluraj montoj kun multaj homoj kaj bestoj sur la kovrilo. Ankaŭ la Ĉangŝin-palaca lanterno forme estas palaca knabino tenanta la lanternon, kies lumo-direkto estas ŝanĝebla. Ili estas raraj artaĵoj.

La Orienta Han-dinastio (25 p.K.—220 p.K.) markis la lastan etapon de ĉinaj antikvaj bronzaĵoj en ilia historio. Tamen tiam ankaŭ troviĝis bonaj artaĵoj, ekz., la fortika kaj viveca bronza artaĵo galopanta ĉevalo elterigita en Gansu-provinco. Ĝi kvazaŭ galopus kun levitaj kapo kaj vosto, unu hufo sur birdo, dum la aliaj tri hufoj en aero. La plastiko estas perfekta ĉu en formo ĉu en spirito, ĉu en realeco ĉu en imago.


La bronzaĵoj aperis jam en Ŝang-dinastio, furoris en la periodo de Militantaj Regnoj kaj farigis speciala artaĵo. En Han-dinastio ili prosperis, ekhavis novajn formojn, desegnojn kaj eĉ epigrafon, senĉese renovigis siajn formojn, surhavis diversajn ornamojn kaj vidiĝis senlima ŝanĝiĝo sur la limigita spegula dorso. Nemalmultaj epigrafoj de Han-dinastiaj bronzaĵoj estas eminentaj poemoj, kiuj okupas certan pozicion en la literatura historio de Ĉinio.




La vinujo Oūfangji (La lasta periodo de Ŝang-dinastio)

Vinujo (La Okcidenta Ĝou-dinastio)





Bronza vinujo (La periodo de Militantaj Regnoj)



Rinocerforma vinujo (La periodo de Militantaj Regnoj)

Indekso de EPC 1988

ESPERANTO

Esperanto—scienco—biblioteko	1. 18
La faka asocio ELF/AREK	1. 20
Ĉinaj Esperanto-poŝtstampoj	2. 18
Ŝanhajo, lulilo de la ĉina Esperanto-movado	3. 19
Varman gratulon al UEA okaze de ĝia 80-jariĝo	4. 2
La E-movado de Ĉangĉun en disvolviĝo	4. 17
Karmemore al prof. Ivo Lapenna	4. 22
La evoluo de la Gŭangdong-a E-movado	5. 13
Esperanto altiras ilin	5. 16
Ĉu denaskismo, kial ne?	5. 17
Zensto — entuziasma semanto de Esperanto	6. 15
La Internacia Fervojista Esperanto-Federacio	6. 17
Kontrolo de lingva unueco	7. 20
Sincera espero de ĉinaj famuloj	7. 17
Honfan kaj EĈV	8. 16
D-ro Josef Kondor kaj lia helpagado por lepruloj	8. 19
La disvolviganta scienc-teknika Esp-movado en Ĉinio	9. 14
Lia amo kaj lia aspiro	10. 56
Memore al prof. Paul Neergaard	10. 58
Dum la 73-a UK	11. 2
Ponto de la Espero	11. 12
“La neŭtrala lingva fundamento estu lingvo interhoma”	11. 10
Kion ni faru por tiu ĉi nova jarcento?	11. 11
La 2-a IAKSTE en Pekino	12. 2
Filatelito por Esperanto	12. 9
(Sur Nia Librobreto)	
Granda pando vizitis mian hejmon	3. 22
Laŭtema vortaro kompletigita	7. 21
Amuza legado pri Til’ Strigospegul’	9. 17
Simpozio pri esperantismo	11. 14
Pri “Atlaso de Insekta Morfologio” (Por Komencantoj)	
Bonaj gejunuloj; “Dankon al vi, frateto!”	1. 24
Homo kaj fajro	2. 61
Gitaro; Mia amiketo	3. 23
Malgranda montvilaĝo	4. 23
Flugiloj de ansero	5. 21
Araba anekdoto	6. 21
Ombro kaj homo; Aglo; Fosaĵo	7. 23
Tri fabloj	8. 23

Du antikvaj ĉinaj fabloj	9. 54
Tri fabloj	10. 68
Tri antikvaj fabloj	11. 21
Mi ŝatas promeni; La filo dommastrumas	12. 11

POLITIKO

Ĉinio ĉe nova startpunkto al la estonteco	1. 2
Demokratiigo en Ĉinio	4. 2
Grava paŝo en demokratiigo	7. 2

EKONOMIO


Prezo-reformo iras stabile	1. 5
Post arbara incendio	1. 15
Laŭkontrakta administrado—vitala forto de la ĉinaj entreprenoj	2. 2
La ekonomio de la Ŝjangŝji-a Subprovinco en disvolviĝo	3. 6
Kemiindustria urbo sur Miaŭŝan-monto	3. 16
La ĉina aŭtoindustrio ĉe turnopunkto	4. 14
Gŭan Gŭangmej luis butikojn	5. 2
Enkonduko de alilanda investo en Ĉinion	5. 4
Kampara reformado kaj grena problemo por miliardo da loĝantoj	6. 2
Pli da produktaĵoj por la popola vivo	7. 5
Kiel Ĉinio traktas la industriajn polucion?	7. 7
En la petrola urbo Daĉing	8. 6
La ĉina poŝto kaj telekomunikado	8. 2
La unua digo de la Flava Rivero — Longjangŝja-hidroelektrajo	9. 6
Pri la ekonomia disvolviĝo de Ĉinio en dek jaroj	10. 2
Trapaso sub la Flava Rivero	10. 9
Privataj entreprenoj en Ĉinio	11. 18

KULTURO, EDUKADO KAJ SCIENCO


La Pekina Biblioteko marŝanta al moderneco	1. 26
“Mirinfanoj” en universitato	2. 22
Edukado rapide disvolviĝas en Janbjan	3. 26
Nova etapo de edukado pri profesia tekniko en Ĉinio	5. 19
Kiel ili fariĝis mastroj de kulturo?	6. 22
Doktorino Ni Jiŝin	7. 29

Superkonduktivito feliĉigos la homaron	7. 26	Pri la envazaj miniaturaj fruktaroj de Ĉinio	4. 30
Elektronika strato de Ĝonggüancun	8. 14	La lanterna butikoj de Ŝen (Novelo)	5. 40
Universitato en ĝusta tempo	8. 24	Juna esperdona baleta trupo	5. 51
Scienc-populariga grupo sur altebenaĵo	12. 16	Maljunaj geedzoj (Novelo)	6. 26
Scio kaj interesa instruado	12. 18	Evoluo de la belo en la lando de vestoj	6. 68
SPORTO, MEDICINO KAJ HIGIENO		Esotera disĉiplo (Novelo)	7. 46
Espero de la glacia kaj neĝa sportoj	1. 38	Mondfamo el "sorgokampo"	7. 62
Vizito al la hejmloko de ginsengo	2. 66	Seka herbo (Novelo)	8. 40
Granda konkurso de ĉinaj sportistoj	3. 2	Muzika insuleto Gulang	8. 48
Internacia konferenco por antaŭenpuŝi akupunkturaron kaj mokson	4. 27	Mirinda marioneta arto de Ĉjüangöu	9. 64
Vigla maljunulo en sporto	5. 24	Destino (Novelo)	10.25
Novaj sukcesoj de la ĉina farmacio	5. 27	Neelĉerpebla fonto	10. 21
Jang Ĝijing sin dediĉanta al kuracado de kancero per ĉina medicino	6. 24	Redukti aĝon je dek jaroj (Novelo)	11. 37 12. 37
Jang Ŭenŝuj kaj lia ostomedolita hospitalo	7. 37	"La Sovaĝa Kampo", signifa provo de la ĉina opero	11.30
Sportoj populariĝas en Ŝunde-gubernio	7.34	Suzhou	12. 29
Promesplena naĝsporto de Ĉinio	8. 38	Ju Ŝigi, artisto de moderna teatro	12. 42
Granda transgrimpado	9. 2	(Ĉina Literaturo)	
La Nuna Nordĉinia Farmacia Korporacio	10. 18	Pejzaĝaj idiliaj poetoj de la prospera Tang-dinastio kaj iliaj verkoj	1. 40
Azia ĉampionino de 10000-metra ebenkuro	11. 24	Landlimaj poetoj en la prospera periodo de Tang-dinastio	2. 37
Ostogustigisto Ĝuo Ŭejhüaj	11. 26	Li Baj, granda romantika poeto	3. 41
Ĝeng Ŝiju rompis 3 mondajn rekordojn	12. 22	Granda realisma poeto Du Fu	4. 44
Ĝaŭ Ĝanggüang kaj har-panaceo	12. 20	Granda realisma poeto Baj Ĝjuji	5. 45
(Ĉina Medicino)		La kampanjo de klasika prozo en Tang-dinastio	6. 39
Pri fundamenta teorio de la tradicia ĉina medicino	1. 29	Poetoj en la meza periodo de Tang-dinastio	7. 57
Diagnozaj metodoj de la ĉina medicino	3. 29	Poetoj de la malfrua periodo de Tang-dinastio	8. 44
Kuracaj principoj de la tradicia ĉina medicino	5. 29	Kuriozaj rakontoj de Tang-dinastio	9. 23
Pri ĉinaj medicinaĵoj (I)	7. 40	Kuriozaj rakontoj de Tang-dinastio	10.38
Pri ĉinaj medicinaĵoj (II)	9. 66	Naskiĝo de ci-o kaj Hŭaĝjan-skolaj ci-istoj	11. 41
Sendrogaj terapioj de la ĉina medicino (I)	11. 28	Li Ju kaj aliaj ci-istoj de la Suda Tang-regno	12. 24
(Por Via Sano)		(Ĉinaj Artoj)	
Masaĝo (IV)	2. 64	Popolaj novjaraj bildoj	2. 30
Masaĝo (V)	4. 29	Ĉinaj porcelanaĵoj	3. 32
Korpo-sanigaj metodoj (I)	6. 37	Argilaj modlaĵoj	5. 32
Korpo-sanigaj metodoj (II)	8. 30	Ĉina ĝardenistiko	6. 30
Korpo-sanigaj metodoj (III)	10.20	Brokatoj de Ĉinio	7. 31
Korpo-sanigaj metodoj (IV)	12. 28	Lakpentraĵoj de Ĉinio	8. 31
		Gravuraj lakaĵoj de Ĉinio	9. 31
		Ĉinaj ksilografiaĵoj	10.31
		Antikvaj bronzaĵoj de Ĉinio	12. 30
LITERATURO KAJ ARTO		SOCIA VIVO	
Parado de ĉinaj artoj	1. 8	Kiam ili bezonas helpon...	1. 46
Ĉi-vespere li ne havas partneron en balo (Novelo)	1. 43	Individuaj entreprenistoj en Pekino	2. 44
Fero dolĉa, fero fiodora (Novelo)	2. 26	Edzoj loĝantaj en edzinaj hejmoj	3. 49
Esperantisto-miniaturisto	2. 40	Diferenco kaj kompreno	4. 50
"Chinoiserie"	2. 41	Kion la reformo portis al la oficistoj kaj laboristoj de Ĉinio?	5.7
Bofilino de malproksime (Novelo)	3. 39	Maltrankvilo pri la loĝantaro	6. 7
Pordo malfermita al la monda akrobatiko	3. 46	Hu Ŝjaŭping — estonta vestoprojektistino	8. 61
Krei sian figuron per siaj verkoj	4. 37	Ĉinaj laborantinoj alfrontas novan defion	9. 21
Gu Heng kaj Li Ŝjangnan	4. 39		

Ĉinio	8. 37	Nuntempaj porcelanaĵoj	4
La Flava Rivero	9. 49	Argilaj modlaĵoj	5
La fekunda kaj bela Nanŝa-insularo	10.51	Ĉina ĝardenistiko	6
Ĉinaj salolagoj	11. 65	Brokatoj de Ĉinio	7
Antikvaj steleoj de Ĉinio	12. 44	Lakpentraĵoj de Ĉinio	8
(Pladoj kaj Legendoj)		Gravuraj lakaĵoj de Ĉinio	9
Helluna bongusta koko	7. 67	Antikvaj ksilografiaĵoj de Ĉinio	10
Ora porkaĵo	9. 52	Modernaj ksilografiaĵoj de Ĉinio	11
Blanka nuboj ĉirkaŭita de ruĝaj floroj kaj blanka jado kun verdaj pinoj	11. 56	Antikvaj bronzaĵoj de Ĉinio	12
(Inter Ni)		Interne de la Dorskovrilo	
Bondeziro kaj espero	1. 63	Moso-oj apud lugu-lago	1
Pri apliko de Esperanto kaj kontaktiĝo per ĝi	4. 54	Diablaj maskoj en Junnan	2
Por plibonigi "El Popola Ĉinio"	7. 68	Vido en Lhasa	4
Anonco	11. 9	La riĉa Sangĝang-ebenaĵo	6
		Taj'ŭan-insulo, perlo en maro	7
		La Budhosunuma Festo	8
		Sur fiŝista duoninsulo	9
		La Internacia Konkurso de Drakboatoj en Pekino	10
		Hongkongo	11
		Nova aspekto de Anjang	12
BILDOSERIOJ		Sur la Dorskovrilo	
Sur la Kovrilo		(Fotoj Faritaj de E-istoj)	
Draka danco	1	Moskeo Fazd en Irano	5
La popola novjara bildo "Ĝinju"	2	Parko en la urbo Stromsnasbruk, Svedio	5
Ĉampiono de arto gimnastiko	3	Pejzaĝoj de Rana-intermonto en Rumanio	8
Tibeta junulino	4	Balta marbordo ĉe Rostock, DR Germanio	11
Ji-a knabino	5	La Blanka Monto ĉe sunleviĝo	11
Imperiestra edzino Jang Juhŭan en la danco "Ora Danco, Arĝenta Ormano"	6	(Ĉinaj Poŝtmarkoj)	
Gong Li, ĉefrolulino de la filmo "Ruĝaj Sorgoj"	7	Antikvaj ĉinaj mitoj	1
Laboristino en Daĉing	8	Kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj de U Ĉangŝuo	2
Kuna prezentado	9	Tutlandaj sport-kunvenoj de Ĉinio	3
Bakado de patkuko (Kampana pentraĵo)	10	Drako	4
La ĉina klasika danco "Koloraj Modlaĵoj en Dunhŭang"	11	Famaj antikvaj turoj de Ĉinio	6
Tibeta knabino	12	Pejzaĝoj de Taj'ŭan	7
Interne de la Kovrilo		Nobelinoj kun harpinglo	9
(Vivo de Ordinaraĵoj Ĉinoj)		Krizantemo	10
Junulinoj el kamparo	1	Poŝtmarkaj blokoj el kvin pecoj	12
Loĝantoj en stratetoj	2		
Esperantista familio	3		
Printempa ekskurso de tibet-naciecanoj	4		
Evenkoj en praarbaro	5		
Nova vivo venis en la mondon	6		
Kampana familio	7		
Anĝeloj en verdaj vestoj	8		
En kampanaj familioj de norda Ŝenŝji	9		
Lantern Festivalo en Bejhaj-parko	10		
Ruĝaj folioj en Ŝjangŝan-monto	11		
Familio de geedzoj-pilotoj	12		
Koloraj bildoserioj			
(Ĉinaj Artoj)			
Modernaj ĉinaj freskoj	1		
Popolaj novjaraj bildoj	2		
Ĉinaj porcelanaĵoj	3		



Granda kvadrata ding-o kun homvizaĝoj (Ŝang-dinastio)



Vinujo kun figuroj de ŝafoj (Ŝang-dinastio)

REDUKTI AĜON JE DEK

JAROJ (Novelo)

(Daŭrigo)

Per unu spiro la 39-jara Ĝeng Ĝenhaj biciklis hejmen. Li demetis sian malnovan grizan jakon kaj ĵetis ĝin sur la seĝon. Li sentis sin energioplana. Li ja havis multon por tuj fari pro la redukto de aĝo.

“Ha lo,” li salutis, sed neniu respondis. Sendube la dekjara filo petolaĉas eksterdome, sed kial la edzino ne estas hejme? Kien ŝi fortiriĝis? Hm, ĉu ŝi devas esti tiel zorga por la familio?

Li subite rimarkis, ke la sofoj, kiujn li mem faris, estis en malraciaj mezuroj. Pro troa oblikveco de la apogilo oni ne povas sin apogi sur la apogilo, kaj sentas sin tre laca pro la brakapogiloj tro malaltaj kaj la kuseno tro alta. Tio estis ŝia kulpo, ke ŝi enviis, ke aliaj havas sofojn, kaj urĝis la edzon fari anstataŭ aĉeti, ĉar ili ne havis sufiĉan monon. Sed kiel banale estas, ke ĉiuj havas en sia domo sofojn, same kiel ĉiuj portas monotonan uniformon. Filistraĉo!

Li miris, kiel li edziĝis al ŝi siatempe. Ŝia familio, filistra, babilaĉis pri nenio krom enspezo, frandado kaj tualetado. Ŝi ne estis bone klerigita. Ŝi estas fidela kopio de la patrino. Ŝi parolas obtuze kaj krude. Post akuŝo ŝi rapide bareliĝis. Ŝi ne havas belan staturon, nek ĉarman vizaĝon kaj indan karakteron. Ve, kial mi edziĝis al ŝi?

Nu, fakte li mem urĝis sin edziĝi, ĉar li ankoraŭ estis fraŭlo en la aĝo de ĉirkaŭ 30 jaroj, kaj pro tio li ne faris multajn elektojn. Nun post aĝo-redukto li fariĝos 29-jara. Li intencis rekonsideri pri la edzeco. Hieraŭ ŝi flamiĝis kontraŭ li, ke li aĉetis altklasajn cigaredojn, kaj minacis per eksedziĝo. Eksedziĝo? Mi konsentos! 29-jara fraŭlo facile trovos ĉarman

junulinon. Pli bone ŝi estos 23-24-jara gracia studentino ĵus diplomita. Gestudentoj fariĝos bonaj geedzoj. Sed la edzino estas diplomito de mezlernejo. Li bedaŭras la geedzecon.

Jes, estas necese rearanĝi la vivon. Estos domaĝe, se la vivo estos pasigita en indiferenteco. Kien ŝi nun fortiriĝis?

Ŝi hastis al vestovendejo por virinoj, tuj post la finiĝo de la deĵoro.

Jueĝjŭan ekscitiĝis kaj iluziiĝis pro la aĝo-redukto. Ŝi ĝojiĝis, ke ŝi, baldaŭ 40-jara, fariĝos 29-jara. Kia feliĉo! Juneco estas netakseble valora en la mondo.

Vere flora aĝo! Ŝi rigardis al sia malhela kaj sengusta vesto kaj sentis ĝisostan aflikton. Per unu spiro ŝi kuris en vestovendejon, rekte al la sekcio de modaj vestoj. Ŝi balais per okuloj la pendantajn helkolorajn robojn. Subite ŝia rigardo haltis sur ruĝa robo kun pasamento el blanka gazo. Ŝi petis la komizinon montri al ŝi la robon. La juna komizino ĵetis al ŝi ekzamenan rigardon, sen ajna milda mieno sur la vizaĝo, kvazaŭ ŝi estus skulptita el ŝtono, kaj la malmilda mieno aludis malestimon.

Kio? Ĉu mi ne indas porti belan veston? Jueĝjŭan ofte koleris en la lastaj jaroj, kiam ŝi iris aĉeti vestojn. Ŝi decidis aĉeti post longa elektado, sed la edzo Ĝenhaj ofte malkonsilis: “Tiu vesto ne bone sidos sur vi, ĝi taŭgas por pli junaj.” Kio? Ĉu vi preferas, ke mi vestu min kiel avino? Ofte estis, ke ŝi forlasis la planon en kolero kaj kverelis hejme preskaŭ tutan nokton. Ve, kiel konservativan edzon



mi havas!

Jes, mi ne bezonas koleri kontraŭ tia malafabla komizino. Kion tiu knabinaĉo scias? Ĉu ŝi scias pri la baldaŭa publikigo de la dekreto? Kial 29-jara junulino ne devas porti belan veston? Ĉinoj ja estas konservativaj, dum eksterlandaj avinoj portas tre belajn vestojn en freŝaj kaj helaj koloroj. Vestado estas mia privata afero, kaj vi ne enŝovu vian nazon. Mi nepre aĉetos spite vian straban rigardon.

Ŝi pagis kaj iris en provejon por ekzameni, ĉu la robo bone sidas sur ŝi aŭ ne. Ŝi rigardis en la spegulon kaj vidis, ke la ruĝa robo strikte sidas sur ŝia korpulenta korpo, okupante tro vastan parton en la spegulo. Ve, kiel dika korpo! Estas nepre necese maldikigi la korpon. Redukti aĝon je dek jaroj estas facile, sed maldikigo estas peniga. Redukti korpopezon je dek kg. ja estas malfacila tasko. De longe ŝi rigore praktikas malmultamelan kaj sengrasan dieton, kaj tre malofte frandas fruktojn. Do ankoraŭ kiaj rimedoj troviĝas por ŝi?

Ŝi revenis hejmen spiregante kaj enpaŝis en la ĉambron kiel arda flamo. Ĝeng Ĝenhaj surprizite eksaltis el la sofo:

“Kial vi tiel aspektas?”

“Kio mirinda?”

“De kie vi akiris tiun robon?”

“Mi aĉetis. Nu, kiel vi opinias?” Ŝi levis la baskon de la robo kaj faris turniĝon de modelino kaj sur ŝia vizaĝo videblis neretenebla plaĉiĝa rideto.

Sed Ĝeng Ĝenhaj verŝis sur ŝin malvarman akvon:

“Freŝaj, helaj koloroj ne sendistinge taŭgas por ĉiuj.”

“Ĉu ĝi ne taŭgas por mi?”

“Sed via aĝo eble ne...”

Mi aĉetis post sufiĉa pripenso. Mi aĝas 29 jarojn. Tiu aĝo bezonas belajn vestojn.”

“Vi, 29-jara?” miregis Ĝeng Ĝenhaj.

“Jes, 29-jara. Post aĝo-redukto mi aĝas fakte nur 28 jarojn kaj 11 monatojn. Mi certe portas ruĝajn kaj verdajn vestojn.” Ŝi vigle pozadis, kiel afektama stelulino de popularaj kantoj sur scenejo.

Ho ve, kia korpulenta junulino! Li ne volis vidi ke ŝi restas tiel pufa, kun dika talio, malgraŭ redukto de la aĝo je dek jaroj. Li fermis la okulojn kaj subite malfermis kaj alnajlis ilin al ŝi:

“La supera instanco decidis redukti ĉies aĝon je dek jaroj por aktivigi la oficistaron, ke ili pli konscience sin dediĉu al la moderniga konstruado, sed ne por vestado.”

“Ĉu vestado malhelpos la modernigan konstruadon? Nu?”

“Mi nur sugestas, ke oni devas elekti vestojn laŭ sia staturo...”

“Kia estas mia staturo?” Ŝia vunda loko estis pikita de la edzo, kaj ŝi malcedeme kriis al la edzo: “Mi diru la veron. Vi abomenas mian dikecon, sed tamen mi abomenas vian malgrasecon. Vi, malgrasa kiel skeleto, kun la frunto plena de faltoj, ĉiam iras spiregante. Tiam mi edziniĝis al vi en la konsidero, ke vi estas intelektulo. Sed fakte via intelektuleco ne portis al mi bonajn vestojn, nek frandaĵojn kaj loĝejon. Hm, nun mi estas 29-jara, sufiĉe juna, mi povos edziniĝi al iu ajn privatulo-podetalisto, malgraŭ ke li vendas surstangajn kandiditajn kratagfruktojn aŭ arkidojn, ĉiu el ili estas pli taŭga ol vi.”

“Agu laŭ via plaĉo.”

“Tro facile. Se hodiaŭ ni disiĝos, tuj morgaŭ mi edziniĝos al aliulo.”

“Mi tute konsentas!”

Lia respondo incitis ŝin kvazaŭ abeluojn. Antaŭe nur ŝi rajtis minaci per “eksedziĝo”, kaj Ĝeng Ĝenhaj neniam kuraĝis uzi tiun vorton. Sed hodiaŭ li fariĝis senprecedence aŭdaca kaj eĉ kuraĝis diri eksedziĝon. Tio netolerebla!

Aĝo-redukto faris vin spitema. Ĉu vi, turpa kiel diablo, aŭdacas diri eksedziĝon? Fi al via revol!” de

kolero eksplodis Jüegjüan kaj sin ĵetis kapon antaŭen rekte al sia edzo.

“Ĉu vi fantazias, ke la mondo jam apartenas al vi sola post aĝo-redukto?” ĉi-foje la edzo ne volis cedi.

* * *

“Ŝjaŭlin, morgaŭ oni balos en la kultura domo. Jen bileto por vi.” Fratino Li, oficistino de la laborista sindikato, mansignis al Lin Sufen. Sed Lin ne respondis kaj haste sin pafis el la oficeja domo.

Post la aĝo-redukto Lin Sufen aĝos nur 19 jarojn. Ĉu 19-jara fraŭlino bezonas svaton de sindikato kaj helpon de svatagentejo? Ĉu fraŭlino en flora aĝo bezonas ĉeesti balon por trovi amaton? For la superfluajn zorgojn.

Kien ajn venis la 29-jara fraŭlino, ŝi renkontis neelteneblan rigardon plenan de kompato, moko, singardemo, suspekto... Oni kompatis ŝin pro ŝia soleco, mokis ŝin pro ŝiaj fiereco kaj elektemo en amafero, oni sin gardis kontraŭ ŝi pro ŝia nervozeco kaj suspektis ŝin pri histerieco kaj anormala psiko. Iun tagmezon, kiam ŝi brogis por si bovlon da rapide pretigeblaj vermiĉeloj kaj aldonis du ovojn, ŝi aŭdis ĉikanon:

“Ŝi bone zorgas sian sanon.”

“En anormala psiko.”

Ŝi larmis en la koro. Ĉu 29-jara fraŭlino, kiu mem preparis tagmanĝon el du ovoj anstataŭ iri al la komuna manĝejo, devis esti rigardata kiel en anormala psiko? Kiu instruis al ili la tezon?

Kaj la plaj intimaj amikoj ofte urĝis ŝin edziniĝi. Ŝajnis al ili, ke fraŭlineco en 29-jara aĝo estas damninda krimo, kaj devas esti temo de sensenca babilaĉado. Ŝia nomo kaj la fraŭlineco ruliĝadis de langoj al langoj, kio multe ĝenis ŝin. Ĉu por virino ne estas pli grava afero ol edziniĝi?

Nun ŝi estis liberigita de la psika turmentado. Ŝi fariĝos 19-jara, kaj neniu povos babilaĉi pri ŝi. Ŝi rigardis al la serena ĉielo kaj imagis al si, ke la nubopecoj fariĝis poŝtukoj, per kiuj ŝi ŝtopis la buŝojn de la babilaĉantoj. Kiel agrable! Lin Sufen fiere levis la kapon, elstarigis la bruston, facilpaŝe sin pafis al la garaĝo, trovis sian biciklon kaj fluge forveturis el la oficejo.

Estis la horo de finiĝo de deĵoro. La stratoj estis plenaj de pasantoj. Ambaŭflanke de la stratoj mikse viciĝis butikoj ŝtataj, korporaciaj kaj privataj. La orelojn agacis la tekstoj de vulgarej kantoj: “Mi amas vin...”, “Ve, vi ne amas min...”, “Mi ne povas vivi sen vi...”, “Vi tute ne havas min en via koro...”

For la banalajn tekstojn!

Amo ne estas varo atendanta aĉetanton. Por 19-jara fraŭlino estas sufiĉa tempo kaj bonŝancoj. La plej aktuala tasko por ŝi estas lernado kaj kompletigo de la scioj. Nur dank’ al sia solida bazo de scioj oni utilas al la socio kaj la popolo, kaj povas gajni respekton de la socio. Kaj ilia vivo povas fariĝi pli enhavoriĉa kaj signifoplena. Tiutempe amo venos al ŝi kaj ŝi kompreneble ne rezignos. Amo devas esti kaŝa, nebuleta, sed tamen profunda.

Jes, mi nepre sukcesigos min en ekzameno por eniri superan lernejon. Aĝo de 19 jaroj estas tre taŭga por studo en supera lernejo. Oni povas lerni en postlabora aŭ televida lernejo, kaj de tie oni povas akiri diplomon. Sed diplomo de veraj universitatoj estas multe pli valora ol tiu de la menciitaj lernejoj. Ŝi bedaŭris, ke ŝia juneco estis vane pasigita. Kiam ŝi lernis en la kvara klaso de elementa lernejo, komenciĝis la “kultura revolucio”. Ŝi traamuziĝis kelkajn jarojn kaj akiris diplomon de elementa lernejo. Kiam ŝi lernis en mezlernejo, ŝi neniel povis kompreni la lecionojn donitajn de la instruistoj, sed tamen ŝi akiris refoje diplomon. Post tio ŝi venis al la kamparo kaj laboris tie kelkajn jarojn, kaj pro tio ŝi jam komplete forgesis la sciojn lernitajn en la lernejoj. Post la fino de la “revolucio” ŝi revenis en la urbon kaj atendis labordonon. Post multe da klopodoj ŝi akiris oficon en servokompanio. Ŝajne ĝis tiu tempo ŝi jam ne havos aliajn aferojn krom edziniĝi, naski infanon, lavi urintukojn, prepari manĝon, kvereli kun la edzo... kaj tiel ĝis la lasta spiro.

Ĉu la vivo devas esti tiel travivita? Lin Sufen ne volis. Ĉiu devas kontribui al la socio dum sia vivo. Sed ŝia edukiteco restis en la nivelo de elementlernejano. Ŝi ne estis laboristo, nek kamparano, nek intelektulo. Ŝi sentis solecon en la socio.

Ŝi decidis rekomenci la lernadon de aboco. Ŝi dediĉis preskaŭ ĉiujn postlaborajn horojn al diversaj kursoj kaj plejparton de la salajro ŝi elspezis por aĉeti librojn postulatajn de la kursoj. Ŝi lernis pri literaturo, matematiko, la angla lingvo, pentrarto k.a. Ŝi sentis, ke ŝi progresis malrapide. Ŝi volis rapide veni al la sukceso, ĉar la aĝo jam ne estis tre juna. Ŝi akcentis la anglan lingvon, lernante kaj en la radio-kurso kaj en televida kurso. Post monato ŝi rimarkis, ke homoj lernantaj la anglan lingvon estas tro multaj, kaj preskaŭ ĉiuj ili estis gefraŭloj de pli ol 30 jaroj. Ili ĉiuj volis trovi facilan vojon por atingi la celon. Sed fakte lerni la anglan lingvon ne estas facile. Kaj krome, por kio tio utilos, eĉ se ŝi bone posedos la anglan lingvon? Diplomitoj de frem-



dlingvaj institutoj estis tre multaj, kaj memlernantoj malfacile trovas bonan profesion.

Ŝi do sin turnis al koresponda instituto de literatura verkado. Jes, verki novelojn aŭ poemojn, kaj elverŝi la aflikton kaj sopiron de tiu generacio. Junuloj de la 21-a jarcento devus scii la historion, la tragikan sorton de parto de la junuloj en la lasta jarcento, kiuj estis mizere mistifikitaj de la historio. Ili estis senkulpaj, ili perdis ĉion, kion ili devus posedi; ili portis pezan ŝarĝon, kiun ili ne devus porti. Kun la peza ŝarĝo ili sin trenas al fino de sia vivo.

Ĉu estas facile fariĝi literaturisto? La verkaĵoj de la samtempuloj estas naŭze nelegeblaj, sed kiam ŝi volis komenci verkadon, ŝi eĉ ne sciis, kiel komenci. Ŝi jam forŝiris plurajn kajerojn, kio teruris la familianojn, kiuj opiniis, ke ŝi estis sorĉita. Evidente ne ĉiuj povas fariĝi verkisto.

Ĉu lernu kontadon? La socio urĝe bezonas kontistojn.

Ŝi hezitiĝis. Ŝi afliktiĝis, ke ŝi ne povas koni sin mem, ne scias, kion ŝi volas fari, kaj kion ŝi devas fari. Iuj konsilis al ŝi: “Ne fantaziu, jam estas la aĝo

por edziniĝi.” Kaj alia asertis al ŝi: “Post edziniĝo vi havos solidan vivon.”

Sed ŝi ne volis edziniĝi.

Ĉar la mondo tute ŝanĝiĝis. La mondo subite fariĝis senkompare ĉarma -- post aĝo-redukto ŝi fariĝos 19-jara. For la afliktiĝon kaj malagrablejaĵon. La vivo ne forlasis min! Mi certe utiligos ĉiun tempeton. Mi sendevie iros al la difinita celo. Mi volas lerni, mi volas viziti lernejojn, mi volas havi sciojn.

Jes, mi komencu hodiaŭ, tuj.

En bonega humoro ŝi rekte biciklis al la butikoj de sciencaj kaj teknikaj libroj.

En la sekvanta mateno la oficejo dronis en granda gajeco. Ĉiuj de la domo troviĝis en ĝojo. Suferantoj de kormalsano unuspire grimpis sur la kvinan etaĝon kaj montris nenian aspekton de malsanulo. Sesdek-jaruloj antaŭe senenergiaj kaj lantaj en parolado nun parolas en laŭta voĉo aŭdebla eĉ ĉe la alia fino de la koridoro. Ĉiuj ĉambroj lasis la pordon malfermita, la oficistoj navetis de unu ĉambro al alia kiel en bazaro, intime verŝante siajn ekscitiĝon, plezuriĝon, idealon kaj grandiozan planon.

Subite iu proponis:

“Ni manifestaciu pro la refoja liberiĝo!”

Sekvis aktiva respondo. Oni komencis prepari transversan rubandon kun frapfrazo kaj ankaŭ ruĝajn kaj verdajn paperajn flagetojn. Oni elprenis el tenejo tamburegon en grandeco de ronda tablo kaj ruĝajn silkajn rubandojn por danco *Janggo* (tre populara ĉina danco). En palpebrumo kolektiĝis impona vicaro antaŭ la oficejo, sur la ruĝaj transversa rubando estas frapfrazo “Celebru la rejuniĝon”. Sur la diversformaj flagetoj esprimiĝis la koro de la manifestaciantoj “Subtenon al la saĝa elpenaĵo de la Aĝesplora Asocio”, “Dediĉu la junecon al la konstruado”, “Vivu la juneco” k.a.

Eksonis la ekscita tamburado. Ĝi Ŭenjaŭ alte staris sur la supro de la perono kaj sentis, ke boliĝis la sango. Li estis preta fari paroladeton kaj intencis direkti la manifestacion. Subite dekoj da emeritiĝintaj kadroj svarme kuris al li kaj kritikis lin:

“Kial vi ne sciigis nin, ke la aĝo reduktiĝos je dek jaroj?”

“Vi... vi jam emeritiĝis...” respondis Ĝi Ŭenjaŭ.

“Ne, absolute ne!” ĥore kriis la maljunuloj.

Ĝi Ŭenjaŭ alte levis la brakojn kaj kriis plengorĝe:

“Kamaradoj, ne bruu, ne...”

Sed la amaso rifuzis lin, kaj la krio tondris ĝis la ĉielo:

“Ni ĉiuj egale ĝuas la rajton juniĝi je dek jaroj, sed kial vi forlasis nin?”

“Ni devas agi en la kadro de dokumento, sed ne devas agi laŭplaĉe.” Ankaŭ Ĝi Ŭenjaŭ laŭtigis la

voĉon.

“Kie estas la dokumento? Kial ne komuniki al ni la dokumenton?”

“Montru la dokumenton!”

“Kial vi ne montras la dokumenton?”

Ĝi Ŭenjaŭ sin turnis al la estro de la oficeja kabineto kun la demando:

“Kie la dokumento?”

La estro respondis en konfuziĝo:

“Mi ne scias.”

Tiam ekkriis junaj novvenintoj en aĝo de 18-19 jaroj:

“Ni ne volas redukti la aĝon je dek jaroj!”

“Nun ni jam akiris oficon, post aĝo-redukto ni devos rekomenci lerni en la tria klaso de elementa lernejo. Tion ni absolute rifuzas!”

Infanetoj de la infanvartejo de la oficejo ĵetiĝis kiel anasidoj al Ĝi Ŭenjaŭ, brakumis liajn gambojn kaj kaptis liajn manojn kun pepado:

“Kien ni reiros, se la aĝo reduktiĝos je dek jaroj?”

“Mia naskiĝo terure suferigis la patrinon, oni faris al ŝi ventrofundigon!”

Ĝi Ŭenjaŭ falis en konsterniĝon kaj refoje laŭte vokis la estron de la oficeja kabineto: “Dokumenton, tuj trovu la dokumenton.”

Tute embarasiĝis la estro. Li traserĉis en la dosierujo, sed ne trovis.

Iuj proponis:

“Ĉu en la dosiera ĉambro?”

“Ĉu iu prunteprenis?”

“Ve al ni, se iu ĵetis ĝin en paperkorbon.”

En rumoro Ĝi Ŭenjaŭ fariĝis aplomba. Li tuj ordonis: “Mobilizu la amasojn al serĉado de la dokumento. Serĉu atenteme preterlasante nenian anguleton.”

“Ĉu disigi la vicaron?” demandis la estro de la oficeja kabineto.

“Kial? Unue serĉu la dokumenton!” (Fino)

Esperantigis Ŭang Sen

KOREKTO

Pro malatento ni inverse presis la bildon sur p. 55, 11-a numero, 1988.

KORESPONDI DEZIRAS

Farifo: unu internacia respondkupono por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizo povas senpage aperigi anoncon kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* F-ino Larisa Rubcova (24-j. bibliotekistino) dez. kor. pri muziko, fantasto kaj politiko. Adr.: ul. 4 Prodolnaja, 4, Krasnojarsk SU-660056, USSR.

* Aleksandr Filipov (24-j. fotisto) dez. kor. pri turismo, fotado kaj

interŝ. bk. Adr.: Pr. “Krasnojarskij raboĉij” 73-3, Krasnojarsk SU-660059, USSR.

* S-ino Elvira Malihina (24-j. pediatro) dez. kor. pri kuirarto, tradicioj, turismo kaj interŝ. kalendaretojn. Adr.: per. Vuzovskij 16-83, Krasnojarsk SU 660025, USSR.

* Eduard Lanenko (24-j. studento) dez. kor. pri radiotekniko, E-kantoj kaj moderna muziko. Adr.: P.K. 16748, Krasnojarsk, SU 660074, USSR.

* S-ro Vladimir Ĵuravlov (28-j. instruisto pri la rusa lingvo) kaj 10 lernantoj (10-12j.) dez. kor. pri diversaj temoj Esperante. Adr.: ul. Zeljonaj 69, ŝkola (lernejo) N 26. st. Zeledevo, Krasnojarskij Kraj, USSR 662070.

* Pri ĉigong-o kaj tradiciaj terapioj dez. serioze kor. J. Bondone, Ave. Roldan 282, 2550 Bell Ville, Ar-

gentino.

* Marta Plaskanka dez. kor. kun 16-17j. geesperantistoj el Ĉinio. Adr.: ul. Goralska 2 m 7, 01-112 Warszawa, Pollando.

* Mi planas eldoni lernolibron pri fiziko kaj serĉas kunlaborantojn tutmonde. Mag. Walter Klag. Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien, Aŭstrio.

* “SUKERO, NUTRADO, KARIO”. Nemalhavebla por via sana vivo! Prezo 2,40 gld. (+ kutimaj sendokostoj): Libroservo de UEA.

* 20-j. fraŭlino dez. kor. kun geesperantistoj tm. pri diversaj temoj, kolekti bildkartojn. Adr.: Barbara Kmak, 58-400 Kamienna Gora, ul. Lipowa 3/18, Pollando.

* 12-j. esperantistino dez. kor. kun samaĝuloj el Ĉinio. Adr.: Min-ka Kazakova, Str. “Maksim Gorki” 8-A-18, Dimitrovgrad-6400, Bulgario.



Ju Šiĝi

ŬEJ LJAŬ kaj ŬANG HONGTAŬ:

JU ŜIĜI, ARTISTO DE MODERNA TEATRO

En salono mi sidigis antaŭ sinjoro Ju Ŝiĝi kaj ekpemis la registran butonon de mikromagneto-fono. Antaŭ dek minutoj, tie okazis teatra kunveno prezidita de li, la unua vicestro de la Pekina Popola Arta Teatro. Foriris la kunvenintoj, sinjoro Ju aspektis laca. Profunde kaviĝis la sofo sub lia peza korpo.

Mia magnetofono registris lian malrapidan aplomban parolon:

“Kiam mi estis juna knabo, mi havis strangan deziron fariĝi lingvisto! Tiam mi aŭskultis diskon de internacia fonetika alfabeto, la voĉo estis ĉarma kaj eĉ rava. Sekve de tio mi ekhavis al fonetiko grandan intereson. Poste, mi legis ‘Fonologion’ verkitan de fama ĉina lingvistiko Ŭang Li.”

Tamen ne longe daŭris la sonĝo de Ju Ŝiĝi fariĝi lingvisto. “Tio rezultis el malriĉeco de mia familio. Lingvistiko estis luksa kaj ne praktikebla por malriĉuloj. Malgraŭ

tio, kiam oni petis min aktoriĝi, mi estis malvolonta, ĉar mi damaĝis la sciojn akiritajn de mi en la junaĝo pri lingvistiko.

“Mi volis ankaŭ fariĝi pentristo. Kiam mi estis elementlernejanino, mi lernis de pentristo skizadon, ankaŭ pri tio mi interesiĝis longtempe. Foje mi pentris kelkajn reklamojn kaj ricevis de tio monon,” tion dirinte, sinjoro Ju ridis senĝene.

“Mi deziris ankaŭ esti literaturisto, por tio mi legis nemalmultajn librojn pri la ĉina literatura historio. Sed mi neniam pensis okupiĝi pri la moderna teatro, neniam imagis, ke tiuj leĵnitaĵoj estas utilaj por mia posta aktora vivo. Ekz., lerni lingvistikon estas utila por akriĝi la homan aŭdon kaj kapti la trajton de alies parolo, lerni pentradon estas utila por kulturobservan povon, kaj trapenetri la koron pere de observo de iliaj eksteraj trajtoj, kaj lerni literaturon

estas grava vojo por altigi la kvaliton de aktoroj.”

En 1949 sinjoro Ju Ŝiĝi kiel profesia aktoro aliĝis al la Nordĉinia Popola Ensemblo (la nuna Pekina Popola Arta Teatro). Antaŭ tio, por vivtenado li laboris, kiel triaklasa aktoro. En la ensemblo lia vivo estis garantiata, li komencis plenergie esplori pri la prezenta arto de moderna teatro. La scioj lernitaj de li en la juna aĝo metis al li solidan bazon por altigi lian prezentan nivelon. Li rapide montris sian talenton kaj prezentis al la spektantoj plurajn brilajn figurojn sur scenejo: Li ludis vagantan artiston Frenezulo Ĉeng en “Longŝjugoŭ”, kiu kontrastigis la malnovan kaj novan socion de Ĉinio; rikiŝiston Ma en “Kamelo Ŝjangzi”, kiu priskribis la malfeliĉon de rikiŝistoj en la malnova Ĉinio; la mastron Ŭang Lifa en “Te-trinkejo”, kiu malkaŝis la duonjarcentan obskuran socion de la malnova Ĉinio, kaj aliajn.

De la 50-aj jaroj ĝis nun, sinjoro Ju kreis 29 rolojn entute. Pri kiu li estas plej kontenta?

Antaŭe mi kun plena memfido pensis, ke tio estas aŭ Ŭang Lifa en "Te-trinkejo" aŭ Weller en kartludo.

Ŭang Lifa estis tragedia persono en verko de fama ĉina dramisto Laŭ Ŝe: Li estis obeema regato en la obskura socio, volis riĉiĝi depende de siaj propraj saĝo kaj inteligenteco, sed fine li sinmortigis pro malsukceso. Ludi tian rolon estis tre malfacile. Unue, li estis ĉefa heroo de la teatro, li kontaktigas diversajn personojn ĉirkaŭ la te-trinkejo. Due, li prezentis la heroon de lia 20-a jaraĝo en la unua akto ĝis 70-a jaraĝo en la tria akto. La prezentado de Ju Ŝiĝi profunde montris la karakterajn, plastikajn kaj psikajn trajtojn de la mastro Ŭang en malsamaj periodoj, malsamaj medioj kaj malsamaj aĝoj, sekve de tio li donis al la heroo fortan verecon. Precipe en prezentado de la maljuna Ŭang Lifa, Ju Ŝiĝi dotis la heroon per

apatia rigardo, mokrido por sin liberigi el mokata stato, apartaj aplombo kaj sobreco en retrorigardo de lia pasinta vivo. El tio, la spektantoj kvazaŭ vidus lian tremantan koron. "Te-trinkejo" prezentigis pli ol 400 fojojn de la 50-aj jaroj ĝis nun kaj ĉiufoje la teatro estis plenplena. En ludo de Ŭang Lifa, Ju Ŝiĝi prezentis de sia aĝo de pli ol 20 jaroj ĝis tiu de pli ol 50 jaroj. Kaj ju pli aĝa li estis, des pli elstara estis lia prezentado kaj lia ludo preskaŭ atingis spiritan kaj aspektan perfektan.


"Kartludo" estis verkita de uŝona verkisto D. L. Coburn. La tuta intrigo estis 14-foja ludo de kartoj sinsekve farita de Weller kaj Fonsia, du maljunuloj de kadukulejo. Ju Ŝiĝi, kiu ludis la rolon de Weller, montris lian malsaman trajton en ĉiufoja ludo. En la unufoja ludo, li rigardis sin "veterano" en instruado de novico, tial li sin montris memfida kaj facila; en la duafoja, kiam li trovis la rivalon lerta en la ludo, li fariĝis vigla kaj rapidigis sian movon en donado de

la kartoj, sed post sinsekve trifoja perdo li malrapidigis siajn movojn en donado kaj ludo de la kartoj por liberigi sin el ĉagreno. En la tria sceno li dubis, ke la rivalo uzas magion en la ludo, tial li fikse rigardis ŝin kaj malrapide donis la kartojn. En la lasta ludo li kvazaŭ metus sian sorton sur la ludon, li detenis sian spiron, kvazaŭ serĉus la ŝlosilon de sia sorto. Post kiam li perdis la lastan ludon, li histerie bastonis la tablon kaj kartojn. Tio montris la senesperon kaj solecon de la heroo. La ludo plene montris la elstaran talenton de sinjoro Ju Ŝiĝi en prezentado de la interna mondo de la heroo pere de liaj movoj.

Tamen la respondo de sinjoro Ju mirigis min. Li diris: "Mi ne ludis rolojn aparte kontentajn. Se mi kontraŭvole respondos la demandon, tiu estis la rikiŝisto Ma en 'Kamelo Ŝjangzi'."

Ĉiuj, kiuj spektis la modernan teatron adaptitan laŭ la fama romano "Kamelo Ŝjangzi" verkita de sinjoro Laŭ Ŝe, konis, ke la rikiŝ-

Rikiŝisto Ma, rolo en la dramo "Kamelo Ŝjangzi"



Ju Ŝiĝi (dekstre) ludas la rolon de Weller en "Kartludo".



isto Ma estis akcesora rolo, kiu aperis nur por 10 minutoj en du scenoj. Sed mi baldaŭ informiĝis, ke Ju Ŝiĝi havis apartan amon al la rolo de rikiŝisto Ma. En la 50-aj jaroj, kiam oni sin preparis por prezenti la dramon, Ju Ŝiĝi estis jam fama aktoro, sed li skribis peticion de 3000 ideogramoj por ludi la rolon. La pli-ol-70-jara rikiŝisto Ma vekis ĉe Ju Ŝiĝi la rememoron pri lia mizera infaneco. En la kaduka korto, kie li loĝis, vivis ankaŭ rikiŝisto onklo Haŭ. Onklo Haŭ estis malriĉa kaj havis nur unu terliton kiel la familio de Ju Ŝiĝi. Li bone konis onklon Haŭ kaj havis al li intiman senton. Kun emocio Ju Ŝiĝi brile kreis figuron de Ma en

10 minutoj sur scenejo. Liaj malrapidaj inertaj paŝoj, nebuleca vido de la okuloj larmantaj de vento, lia malklara parolo pro manko de dentoj kaj lia forta nazalo kaŭzita de ofta malvarmumo ja donis al spektantoj neforgeseblan impreson.

“La vera ekscitiĝo por aktoroj sur scenejo estas trajto de ni maljunaj aktoroj,” diris Ju Ŝiĝi post ioma meditado. “Ni preskaŭ ne ricevis sisteman fizikan kaj voĉan trejnadon, tio estas nia manko, sed la vera sento estas nia superaĵo en la prezentado.”

En la pasinta jaro la Ĉina

Dramo-eldonejo eldonis lian libron “Opinioj de Ju Ŝiĝi pri Prezenta Arto”. Lego de lia verko estas vera ĝuo. La aŭtobiografio el la libro tre similas al gracia kaj humura stilo en la verkoj de la pasinta fama ĉina verkisto Ŝen Congŭen.


Por esti la unua vicestro de la Pekina Popola Arta Teatro, li efektive sentas tion malfacila kaj ĉagrena. Foje li eĉ kriis: “Mi tuj atingos la aĝon de 60 jaroj. Mi devas ekŝiĝi de la ofico, kaj fari ion farblan...” Li tro ŝatas teatran prezentadon. Li deziras okupiĝi pri drama verkado aŭ gvido de drama verkado, kiam li maljuniĝos kaj ne povos fari tion. Li ŝatas tion...

ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO

ANTI-KVAJ STELEOJ DE ĈINIO

de LAN ŜAN

Steleo kun gravuritaj drakoj



Origine la ĉinaj steleoj estis ŝtonpecoj speciale starigitaj. Poste oni nomas steleoj ĉiujn ŝtonajn kolojn antaŭ palacoj kaj temploj por observi la sunombron kaj ligi brutojn kaj tiujn antaŭ tomboj. Nun la senco de la ĉinaj steleoj estas pli larĝa. Ĉiuj oblongaj kaj cilindraj ŝtonpecoj starigitaj surtere, tiuj kun tomboskribo entombigitaj kaj rokmuroj kun gravurita skribaĵo estas rigardataj kiel ĉinaj steleoj.

Jam en la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio kaj la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (841-476 a.K.) aperis en Ĉinio la plej fruaj steleoj. Tio estis ŝtonkoloj starigitaj en la palacoj kaj temploj, kiuj estis uzataj

por ligi brutojn, observi la sunombron por scii la horojn. Tiam ĉe la entombigo de mortintaj aristokratoj, la tombkavoj ĝenerale estis tre profundaj. Por enmeti la ĉerkon, oni devis ligi ĝin per ŝnuroj kaj starigi plurajn kolonojn lignajn kun rondaj truoj ĉirkaŭ la tombokavo. Post entombigo oni lasis la lignajn kolonojn tie kaj gravuris ideogramojn sur la kolonoj, kiuj funkciis kiel signo de la tombo. Ankaŭ ili estis rigardataj kiel speco de ĉinaj steleoj.


Nun el la konservataj steleoj la plej fruaj estas tiuj postlasitaj de la Unua kaj Dua Imperiestroj de Ĉindinastio (221--206 a.K.) en vizito de famaj pejzaĝoj de Ĉinio. En la lastaj jaroj de la Orienta Handinastio (25-220 p.K.) furoris starigo de steleoj. Tiam oni starigis steleon ne nur antaŭ la tombo de aristokratoj kaj ŝtataj oficistoj, sed ankaŭ antaŭ tiu de ordinaraj homoj kaj eĉ infanoj, kaj krome la steleoj fariĝis pli kaj pli belaj kaj poluritaj. Iliaj supro kaj korpo estis plenaj de reliefaĵoj aŭ gravuritaj desegnoj.

La steleoj ĝenerale konsistis el supro, korpo kaj soklo.

La steleosupro ĝenerale estis pinta, duonronda aŭ kvadrata. Sur la steleosupro estis titolo de la steleo. La steleoj starigitaj speciale por noti la historion kaj meritojn de la laŭdata homo ĝenerale estis tegmentitaj.

La steleokorpoj estis la ĉefa parto. Ĝenerale ili estis oblongaj kaj ĉ. 2 metrojn altaj. Sur ilia fronta flanko gravuriĝis ĉefa skribo kaj sur la dorsa la akcesora, ekz. la nomo de la ŝtongravurinto. Origine oni unue skribis ruĝajn vortojn sur la ŝtonplato kaj poste ĉizis laŭ la skribitaj vortoj. Poste aperis reliefo kaj aliaj por beligi la steleon. La steleoj uzataj por alia celo iafaĵe estis pluredraj aŭ cilindraj.

La sokloj estis kvadrataj aŭ testudformaj. Sur kvadrataj sokloj vi-



Stelearo en la Kvinpagoda Templo de Pekino

diĝis gravuritaj desegnoj. La testudformaj sokloj aperis en la periodo de Sudaj kaj Nordaj Dinastioj (420-580 p.K.). Ili fariĝis imponaj en la periodo de la dinastioj Ming kaj Ĉing. Ili kapo similis al tiu de biŝji, filo de drako laŭ legendo. Ĉar ĝi estis portama, tial oni metis steleon sur ĝian dorson.

La formo de steleoj en la feŭda socio estis farita laŭ rigoraj difinoj. Ili devis esti konformaj al la rango de la tombomastro. La tomba steleo de diversrangaj homoj havis malsamajn epigrafon, desegnon, formon kaj grandecon. Ekz. en Ming-dinastio la steleosupro de la 7-4-a klasaj oficistoj estis ronda, tiu de la triklasaj oficistoj similis al la kapo de cervoforma monstro, tiu de la duklasaj al la kapo de ĉjilin, beno-simbola besto, kaj tiu de la unuaklasaj oficistoj al la kapo de drakoforma monstro.

Iuj steleoj surhavis nur la nomon kaj rangon de la tombomastro, aliaj surhavis artikolon pri la brilaj meritoj de la tombomastro, la triaj tiun pri la heroaĵoj de ge-

neralo, la kvaraj tiun pri la konstruo de la tombo kaj deveno de la koncerna historia objekto, la sesaj poemojn kaj eseojn verkitajn de literaturistoj kaj la sepaj budhisman sutron. Dank' al ili konserviĝis grandnombraj historiaj literaturoj, abundo da kaligrafaĵoj kaj ĉizitaj metiartaĵoj. Tial la antikvaj steleoj estas parto de la brila ĉina kulturo.

En la urbo Ĉjufu, Ŝandong-provinco, konserviĝas plej multe da steleoj de Han-dinastio (206 a.K.--220 p.K.). La antikva urbo Ĉang'an (la nuna urbo Ŝji'an, Ŝenŝji-provinco) estas loko, kie konserviĝas plej multe da steleoj kun gravuritaj epigrafoj. En la stelearo de la urbo konserviĝas pli ol mil steleoj de Han-dinastio ĝis Ĉing-dinastio (1644-1911). Ŝtonaj steleoj arbare staras en la Ĝuanlin-a Ŝtongravuraĵ-eksponejo de Lŭojang, Henan-provinco, en Ŝaŭlin-Templo de Songŝan-monto kaj multaj aliaj turismaj lokoj de Ĉinio. Ili ornamas la pitoreskajn pejzaĝojn kaj beligas la naturon.

GASTI ĈE MONBAA VILAĜO

Dum kvar tagoj mi kaj miaj kolegoj trairis profundajn valojn kaj densajn arbarojn sur la Tibeta Altebenaĵo kaj ĉe la lasta vesperiĝo ni vidis vilaĝon.

Tio estas la vilaĝo Bejbeng de monbaoj. Ĝi situas sur montodeklivo ĉe la kunfluejo de la riveroj Dŭoŝjong kaj Jarlung Zangbo. Sur la ŝtuparkampoj rizo bonodoras. La krepuska ĉiellumo orange ruĝigas grandan parton de la monto. Verdaj baŝooj balanciĝas en venteto. Inter la bambuaroj kaŝiĝas violaj lignaj dometoj. Fumstrioj el kamentuboj ŝvebas inter bambuoj. Vidinte nin, venintojn de malproksime, loĝantoj en lignaj dometoj elŝovis sian kapon tra la fenestroj kaj svingante brakojn

vokis al ni.

Kiam ni atingis la enirejon de la vilaĝo, jam staris sur kamporando vico da vilaĝanoj. Maljunulo portis surdorse sitelon kun vino. Apude staris du junulinoj, unu tenis kupran kuleregon plenan je vino, kaj la alia ambaŭmane tenis porcelanan bovleton kun bluaj desegnoj. Ili aliris al mi, plenigis la bovleton per vino kaj petis min eltrinki per unu tiro. Mi antaŭe spertis la moron de monbaoj regali gastojn per vino. Tio estas "bonveniga vino" ĉe la enirejo de vilaĝo. Antaŭ ol eniri la vilaĝon, ĉiu veninto devas trinki kuleregon da rizvino por danki la mastron pro sincereco. Ni ĉiuj unutire fortrinkis la vinon.

La maljunulo nomiĝas Nobu. Li estas la vilaĝestro de Bejbeng. Li estis kondukanta nin al sia hejmo por ripozi. La bonvenigantoj svarme akompanis nin kantante. La kantado resonis en la valoj. Ankaŭ aliaj vilaĝanoj eliris el siaj lignaj dometoj, kaj amasiĝis antaŭ tiu de la vilaĝestro. Iuj dorse portis sitelon kun vino, aliaj tenis baŝoojn super la kapo, triaj tenis ruĝajn persikojn surmane... Ĉiuj ridetis kaj kantis tostokanton.

La tieaj dometoj havas tri etaĝojn kaj estas subtenataj de kvar kolonoj. La teretaĝo servas kiel stalo. La unua etaĝo estas loĝdomo. Oni povas iri laŭ ligna eskalo al la ekstera koridoro sur la etaĝo, kaj trairinte la antaŭpordon eniri la ĉambron. La dua etaĝo estas tenejo de greno kaj brulligno. Nobu sidigis nin en la ĉambron. Monbaoj havas kutimon sidi sur planko. Por akcepti gastojn, la mastro sternis antilopan felon por sidigi nin. Nobu sidis kontraŭ ni. Ĉirkaŭe sidis vilaĝanoj, ĉiu sur sia loko. En la centro de la ĉambro sur tri ŝtonpecoj sin apogis ŝtona poto super fajro. La fajro arde brulis, ke ĉiuj vizaĝoj estis ruĝe lumigitaj. Io estis kuirata en la poto. Vaporo kaj fumo kune leviĝis.

Apenaŭ ni sidigis, la mastro, edzino de Nobu, alportis al mi plenan tason da vino, kaj en la alia mano ŝi tenis kuleregon da vino. Mi timis, ke mi ebriiĝos, ĉar mi jam trinkis kuleregon da vino ĉe la enirejo de la vilaĝo. Mi fordankon-

Monbaaj virinoj



tis, la mastrino ekkantis tostan kanton:

Levu tason! ĉi-vespere plej aromas vino.

Kantu, verŝu vortojn el la fundo de la sino.

Kiam drinkus ni, se ne en tiu ĉi momento?

Kiam koron montrus ni, se regus nun silento?

Ŝi kantante dancis, kun kulerego kaj vintaso en la manoj -- tiel monbaŭoj drinkigas gastojn. Aliaj vilaĝanoj kantis ĥore:

En bolanta domo ardas fajro kun fervoro.

Kaj la ĝoja sun' jam leviĝas en nia koro.

Drinku ĝis ebrio, homoj el la malproksimo!

Kantu! dancu! ho karuloj de la plejintimo!

Kiun tagon ree venos la ĉi-hora ĉarmo?

Kiam ĉe ni alifoje renkontiĝa varmo?

Ni esperu, ke ni ne disiĝos en amaro;

Ni atendas ĝis kuniĝo tie ĉi post jaro.

Venkite de la insisto de la mastrino, mi ekstaris, prenis la tason ambaŭmane, kaj laŭ monbaa kutimo trempis la dekstran mezfingron en la vinon, kaj fingre ĵetis la likvaĵon trifoje al aero, por esprimi mian adoron al la ĉiela dio kaj al Budho. Sekve mi trinkis la vinon per unu tiro. La mastrino tuj pleningis la tason. Post ĉiu mia ektrinko ŝi pleningis la tason, kaj ŝi permesis al mi demeti la tason, ĝis mi eltrinkis la vinon en la kulerego. Ŝi proponis vinon al la ĉeestantaj gastoj kaj vilaĝanoj laŭvice. La tuta ĉambro estis plena je kantoj kaj saturita de vinodoro. Vilaĝanoj alportis sitelojn da vino unu post alia. La dekkelkaj siteloj pendis sur ligna hokego dekstre super la kameno. Vere brave estus fortrinki tiom da vino, mi pensis.



Esplorantoj ĉe la fonto de Dūoŝjong-rivero (la unua de dekstre estas la aŭtoro)

La mastrino proponis vinon al ĉiu ĉeestanto, kiam ŝi returnis sin al mi kun la dua kulerego da vino. En tiu momento mi vere volis fuĝi.

“Ne! Trinku ĝin!” la vilaĝestro Nobu ekkriis. Sekvis lin la gejunuloj. Kvazaŭ junulo, Nobu kaptis miajn brakojn; iuj junuloj tiris miajn orelojn, aliaj forte tuŝis miajn ŝultrojn, ili perforte trudis la vinon al mi. Mi sciis, ke tio estas maniero prenata por drinkigi plej intimajn amikojn. La junulinoj krevis de ridego, brakumante unu alian, ridis kaj kantis kune kun la mastrino.

Mi prenis plian plenkuleregon. Kvankam la vino ne estis tre forta, tamen mi ne povis elteni la fortecon de tiom da vino. La monbaa vino estas farita el rizo, maizo kaj milio. Post vaporumiĝo kaj fermento la materialoj estas tenataj en bambua filtrilo aŭ sitelo. Oni aldonas akvon post ĉiufoja trinko, tial la vino ĉiam malplifortiĝas. Ĝi estas acide dolĉa.

Nokta kurteno falis. Tra fenest-

tro mi vidis, ke la ondantaj montoj kvazaŭ kaŭrantaj bestegoj forglutas la tutan vilaĝon. Nur sporadaj ruĝaj lumbriloj flagris, kvazaŭ okuloj de la bestegoj.

La etoso en la domo plivarmiĝis. Klakis la fajro en brila flamo, kiu prilumis duonan ĉambrom. Mi vidis, ke mia kolego Ĉen jam ebrie kuŝas apud la vilaĝestro Nobu.

Vino donis entuziasmon. Oni ekdancis monbaan dancon ĉirkaŭ la fajro. Duona rondo konsistis el viroj, kaj la alia duono, el virinoj. Ili movis siajn brakojn kaj kruojn laŭ belsona melodio. La tuta vilaĝo pulsadis en kanto kaj danco. La virinoj en ruĝaj veŝtoj kaj buntstriaĵoj kaj viroj en blankaj survestoj dancis kun granda plezuro. Flirtante en fajrolumo, la kostumoj aspektis blindigaj. Nobu, jam pli-ol-sesdek-jara, tamen dancis kiel junulo. La planko bam-bum-is sub liaj piedoj. Mi ne scipovis danci. Sed nun la vinodoro, la varmo, la kanto kaj danco min sorĉis, ke mi pretervole ekdancis kune kun la aliaj.

ĈINAJ SOJFABOJ

Antikve, nur Ĉinio produktis sojfabojn. Nun, ĉiuspecaj sojfaboj produktataj en diversaj landoj estas "posteuloj" de la ĉinaj sojfaboj.

Laŭ noto, antaŭ 4000--5000 jaroj Ĉinio komencis kultivi sojfabojn. Oni notis pri sojfaba kultivado en la ĉina klasika verko Libro de Poezio. En la komenca tempo de ĉi jarcento, sojfaboj kreskis ankoraŭ nur en Ĉinio kaj ĝiaj najbaraj landoj. En la lastaj kelkdek jaroj, ĉie en la mondo kultiviĝis sojfaboj kaj Usono kaj Brazilo plej multe produktis sojfabojn. Nun Ĉinio kultivas sojfabojn sur 6.66 milionoj da hektaroj kaj la produktokvanto okupas la trian lokon en la mondo.

La specoj de sojfaboj estas diversaj. En Ĉinio estas almenaŭ pli ol 5000 specoj. En la regionoj, kie senprujna periodo daŭras pli ol 100 tagojn, oni povas kultivi sojfabojn. En Ĉinio, de Hejlongĝjang-provinco norde ĝis Gŭangdong-provinco sude oni povas kultivi sojfabojn. La Nordoriento kaj basenoj de la Flava Rivero, Hŭajhe-rivero kaj Jangzi-rivero estas grandaj produktoj de sojfaboj de Ĉinio.

Plejparto da grundo de la Nordoriento de Ĉinio estas nigra kun abunda humo kaj nitrogeno kaj taŭgas por kreskigi sojfabojn. Post kiam la sojfabo produktita en la Nordoriento de Ĉinio estis honorita en la Viena Foiro en 1873, la areo por ĝi pli kaj pli vastiĝis kaj la produktokvanto pli kaj pli multiĝis. En 1987 la ŝtataj kultivejoj de la provinco Hejlongĝjang produktis 1.27 milionojn da tunoj da sojfaboj.

La sojfaboj de la Nordoriento havas kolorojn flavan, verdan, brunan, nigran k.a. La grandeco de iliaj grajnoj estas tute diferenca. 100 malgrandaj grajnoj pezas nur 5 g., kaj 100 grandaj pezas 50 g. Nun estas multe da novaj specoj de sojfaboj en la Nordoriento. Iuj portas grajnoj grandajn, rondajn kaj blondajn, aliaj enhavas 44% da proteino, triaj enhavas 23% da oleo. La sojfabo "Blanka Perlo", bonvenigata en la internacia merkato de la lastaj jaroj, enhavas 42% da proteino kaj pli ol 16% da oleo. Por pli vaste kreskigi sojfabojn en la Nordoriento de Ĉinio, oni elkulturis specojn adaptiĝantajn al aparta klimato aŭ tero, kiaj tiuj

frostorezista, alkalorezista, akvorezista, kaj ankaŭ malgrandgrajna, kiu taŭgas kiel brutonutraĵo. Ankaŭ sovaĝa sojfabo povas kreski tie.

La grajno de sovaĝa sojfabo estas malgranda, nigra kaj ovala. 100 tiaj grajnoj pezas 3 g. Ĝi, kun maldika tigo, rampas sur arbobranĉoj, fragmitoj aŭ herboj, floras aŭtune kaj donas nigrajn guŝojn. Post maturiĝo la guŝo krevas kaj la grajnoj falas surteren. La sovaĝa sojfabo ripetfoje guŝas ĝis aperas prujno. Ĝiaj grajnoj ĝermas nur post vintro. La sovaĝa sojfabo estas la viva specimeno por esplori la originon, evoluon, ekologian staton, specon, genetikon kaj rason de sojfabo. Ĝi

Manĝaĵo el sojfaboj



estas tre malfacile akirita en aliaj landoj. Tial alilandaj sciencistoj ofte venas al la nordorienta Ĉinio por akiri specimenojn de la sovaĝa sojfabo.

La sojfabo estas nutroriĉa. La sojfabo oleo estas unu el la tradiciaj kvar specoj da vegetala oleo (sojfabo, ternuksa, sezama, napsema) de Ĉinio.

Laŭ analizo, la enhavokvanto de proteino en sojfabo estas 3-, 4-, 5-, 18-oble pli granda ol tiuj en tritiko, maizo, rizo kaj terpomo respektive. La enhavokvanto de proteino en sengrasigita sojfabo estas des pli granda. Krom proteino, ĝi enhavas ankaŭ grason, sukerojn, vitaminojn kaj mineralojn. Sojfabo enhavas ok aminoacidojn bezonatajn de homa korpo. Lisino estas tre grava por akceli la kreskon de homa korpo, precipe por kreskigi infanojn. Sojfabo enhavas femalan kaj masklan hormonojn, kiuj plilongigas la junecon de la virinoj kaj plivigligas la virojn. La nutraĵo en sojfabo efikas por preventi arteriosklerozon, infarkton de la miokardio, apopleksion ktp. Tial, la manĝaĵoj el sojfabo tre utilas al la suferantoj de kardiovaskula afekcio kaj efikas por kuraci obezecon. La enhavokvanto de proteino kaj tiu de oleo en sojfabo estas tenataj en inversa proporcio. La enhavokvanto de oleo de la sojfabo, kiu kreskas en fekunda grundo kun sufiĉa akvo, estas kompare granda kaj la proteina enhavokvanto estas kompare malgranda; sed male, se la proteina enhavokvanto estas granda, la olea enhavokvanto -- malgranda. La Nordoriento de Ĉinio estas regiono produktanta sojfabojn kun multa oleo, dum la baseno de Jangzrivero estas regiono produktanta sojfabojn kun multa proteino.

El sojfabo oni povas prepari multajn manĝaĵojn, kiaj toŭfuo, lakto, faruno, pano, biskvito, mononatria glutamato kaj artefarita viando. Toŭfuo estas tre malmutekosta kaj apetitoveka.

ABONU "EL POPOLA ĈINIO"

Nun komenciĝas abonvarba kampanjo 1989 por "El Popola Ĉinio". EPĈ kun interesaj artikoloj kaj belaj bildoj raportas pri Ĉinio en diversaj flankoj kaj E-movado en kaj ekster Ĉinio. Tiu, kiu abonas aŭ reabonas nian gazeton en la kampanjo (de 1988.10.01 ĝis 1989.02.28), ricevos unu koloran kalendaron 1989 en Esperanto. La abonvarbantoj ricevos ĉinstila(j)n memoraĵo(j)n laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al nia peranto en via lando aŭ rekte al ni: *Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.*

ABONTARIFO DE EPĈ

(ekvalidas la 1-an de oktobro 1988)

lando	valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	15.00	25.00	35.00
Aŭstrio	ATS	200	340	480
Belgio	BEF	550	930	1300
FR Germanio	DEM	30.00	50.00	70.00
Britio	GBP	8.00	13.60	19.00
Finnlando	FIM	64.00	108.00	150.00
Francio	FRF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	ESP	1200	2000	2900
Italio	ITL	18000	30600	43000
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Jugoslavio	YUD	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZD	20.00	34.00	48.00
Portugaliao	PTE	1100	1800	2600
Svisio	CHF	25.00	42.00	60.00
Usono	USD	12.00	20.00	28.00
Kanado	CAD	14.00	23.00	33.00

Por aliaj landoj en Eŭropo:

GBP	8.00	13.60	19.00
USD	10.00	17.00	24.00

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

GBP	5.00	8.50	12.00
USD	6.50	11.00	16.00

SINDIKATO, LABORDONO KAJ DISVOLVIĜO

La sindikato, organizo reprezentanta centojn da milionoj da oficistoj kaj laboristoj de la mondo, fariĝas neignorebla forto en la nuntempa politika kaj ekonomia vivo kaj grava faktoro stabiligi la socion kaj disvolvi la ekonomion por diversaj landoj.

Kiel ĉiuj politikaj kaj sociaj organizoj en la mondo, ankaŭ la nuna sindikato alfrontas sian problemon, nome la tradician problemon sub la modernaj cirkonstancoj -- pri labordono al laboristoj. Tamen en la nuntempo por la sindikato estas nesufiĉe nur zorgi pri labordono al laboristoj, ĝi devas doni ankaŭ pli aktivan zorgon al la ekonomia disvolviĝo de la tuta socio, kiu estas nedisigebla de labordono.

De la 23-a ĝis la 25-a de aŭgusto 1988 la sindikataj reprezentantoj el 16 landoj kaj regionoj de Azio, Afriko, Amerikoj kaj Eŭropo venis al Pekino kaj okazigis kolokvon sub la temo "La funkcio de sindikato en labordono kaj disvolviĝo" por diskuti sian komunan historian taskon.

LA NEDEZIRINDA SITUACIO DE LABORDONO

La reprezentantoj unue turnis la atenton al la nuna mondsfera situacio de labordono.

Reprezentanto de la Itala Ĝenerala Konfederacio de Laboro Paolo Brutti montris, ke en 1981-1987 la procentaĵo de senlaboruloj de Italio kreskis de 9.1% al 12%, kaj en la meza regiono tiu de senlaborulinoj atingis 30.6%.

Li diris, ke estas aparte okulfrapa en la grandaj entreprenoj la reduktiĝo de procentaĵo de laborricevintoj. En tiu periodo tia procentaĵo en la grandaj entreprenoj reduktiĝis je 25.5%, dume, kvankam iom leviĝis la procentaĵo de laborricevintoj en la malgrandaj entreprenoj kaj servaj laborfakoj, tamen tio neniel povis plibonigi la staton, ke reduktiĝis la procentaĵo de laborricevintoj kaj kreskis senlaboreco tra la tuta lando.

Reprezentanto de la Hindia Asocio de Laboruloj s-ino Kamala Sinha montris, ke en Hindio nun estas 30 milionoj da senlaboruloj. Ŝi diris, ke la fakto montris, ke en la granda plimulto de la disvolviĝantaj landoj pli kaj pli serioziĝas senlaboreco, malbona laborkondiĉo, malriĉeco kaj aliaj neraciaj fenomenoj.

Reprezentano de la Kanada Konfederacio de la Naciaj Sindikatoj Lecoold Beaulieu diris, ke en la evoluantaj landoj, kia Kanado, la meznombra procentaĵo de senlaboruloj jam atingis 8%, kaj la indico eĉ multe pli alta en iuj lokoj.

Pri la nedezirinda labordono sur la terglobo, la reprezentantoj eldiris malsamajn opiniojn.

Reprezentanto de Kanado opiniis, ke la alta procentaĵo de senlaboruloj en Kanado kaŭziĝis de neplanizita disvolvado de la kapitalisma ekonomio. Li opiniis, ke la neracia ekonomia strukturo de Kanado estas la rekta kaŭzo pri estiĝo de granda nombro da senla-

boruloj. Krome, la konkurenco pri importitaj produktaĵoj intensigis la malfacilon en labordono al kanadaj laboristoj.

Reprezentanto de la Sendependa Oficist-Laborista Sindikato de Sri-Lankao opiniis, ke la malfacilo en labordono al laboristoj en la disvolviĝantaj landoj spegulas grandegajn malfacilojn renkontitajn de tiuj landoj en ekonomio. Kaj tiuj malfaciloj esence kaŭziĝis de la internacie neegalaj ekonomiaj rilatoj. Li diris, ke nun multaj disvolviĝantaj landoj dronas en la ŝuldoj, la enspezoj de eksportitaj produktaĵoj plejparte estas uzataj por kovri la interezojn. Li emfaze montris, ke la translandaj korporacioj de la disvolviĝantaj landoj per sia grandega forto malhelpas la sendependan ekonomian disvolviĝon de tiuj landoj.

La sindikataj reprezentantoj el Kenjo, Pakistano kaj Benino opiniis, ke la internacie neegalaj ekonomiaj rilatoj kaŭzis mondsferan ekonomian malboniĝon, kio neeviteble influas labordonon de multaj landoj, precipe de la disvolviĝantaj landoj.

SINDIKATO DEVAS ADAPTIĜI AL LA NOVA SITUACIO

En la 80-aj jaroj, ne nur en la internacia politiko okazis gravaj ŝanĝiĝoj, sed ankaŭ en la monda ekonomio aperis la tendenco reordigi industriojn. Iuj reprezentantoj emfazis, ke sub la nuna situacio la sindikato devas adaptiĝi al la nova situacio. I.a., plej grave estas, ke la sindikato ne nur devas zorgi pri okupoj kaj aliaj interesoj de labor-



Prezidanto de la Ĉina Federacio de Sindikataj Unuiĝoj Ni Ĝifu (maldekstre) intervidiĝas kun ĉeestantoj de la kolokvo.

istoj, sed ankaŭ devas doni seriozan atenton al la ekonomia disvolviĝo de sia lando kaj la tuta terĝlobo. Labordono al laboristoj estas malfacile garantibla definitive, sen bona internacia ekonomia medio, sen plena disvolviĝo de la landa ekonomio.

Reprezentanto de la Ĉina Federacio de Sindikataj Unuiĝoj Fang Ĝjade diris, ke en Ĉinio nun iras ampleksa reformo de la ekonomia sistemo kaj la Ĉina Federacio de Sindikataj Unuiĝoj alvokis, ke la 130 milionoj da oficistoj kaj laboristoj aktive subtenu la reforman planon de la registaro, ĉar sukceso aŭ malsukceso de la plano koncerne la proprajn interesojn de ĉiu oficisto aŭ laboristo. Li diris, ke samtempe kun tio, la Ĉina Federacio de Sindikataj Unuiĝoj donas specialan atenton al la problemoj koncerne al la interesoj de oficistoj kaj laboristoj. Nun praktikante la sistemon dungi laboristojn laŭkontrakte, la sindikato unuflanke kontraŭstaras senkaŭzan maldungadon de laboristoj, kaj aliflanke

konsiliĝas kun la registaro pri fonda de asekura sistemo por senlaboruloj, kaj kunlabore kun entreprenoj kaj koncernaj registaraj instancoj helpas senlaborulojn kiel eble plej frue trovi novan okupon.

Reprezentanto de Sri-Lankao diris, ke la Sendependa Oficist-Laborista Sindikato neglektis akceladon de la ŝtata ekonomio, nun ĝi jam bone komprenas la signifon de tiu problemo. En sia parolado li aparte emfazis la necescon kunlabori kun la registaro en la batalo kontraŭ la koloniismaj fortoj kaj translandaj korporacioj.

Rilate la novan situacion alfrontatan de la sindikato, reprezentanto de la Usona Kamionista Sindikato Harold Wolchok opiniis, ke Usono estas lando eniranta de la industria epoko en tiun elektronikan, ĝiaj laborul-socitavoloj kaj rilato inter laboro kaj kapitalo grave ŝanĝiĝas. Li montris, ke en 1988 la agrikulturaj laboristoj konsistigis 2% de la tutlandaj laboruloj, la procentaĵo de laboristoj ne superis

trionon de la tutlandaj laboruloj. La labordona centro turniĝis de industrio al servaj okupoj. Pro tiuj ŝanĝiĝoj la usona sindikato verbas membrojn ne plu nur el inter industriaj laboristoj. De la lastaj jaroj ĝi klopodas varbi membrojn el inter fakaj teknikistoj.

Li opiniis ankaŭ, ke en Usono la rilato inter laboro kaj kapitalo transiras de diskuta tipo al kunlabora tipo. Ĉar kunlaboro ne nur povas porti bonstatigon al la sindikataj membroj, sed ankaŭ prosperigi la entreprenojn. Tial tiu nova rilato inter laboro kaj kapitalo povas pli efike akceli la ekonomian disvolviĝon de la tuta socio.

En la tritaga kolokvo reprezentantoj rimarkigis, ke la sindikatoj de diversaj landoj kaj regionoj devas plifortigi kontaktojn inter si, ofte interŝanĝi opiniojn pri siaj malfaciloj kaj taskoj, kio donos utilan influon sur la disvolviĝon de la sindikata movado kaj sur tiun de la mondsfera ekonomio.

LIGNAJ DOMOJ DE DONG-OJ

de ŜJAŬ ĈJIGONG

La dong-oj, koncentre loĝantaj en la limregiono inter la provincoj Hunan kaj Gujĝoŭ kaj la Gŭangŝji-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono de Ĉinio, estas lertaj en konstruado de lignaj domoj. Ili unue faras precizan mezuradon, difinas la struktur-an formon, poste notas la mezuritajn ciferojn de diversaj konstrupartoj per specialaj signoj sur duon-igitan bambustangon "Ŝjangan". Laŭ la notitaj ciferoj oni faras konstrupartojn. Poste oni instalas domon per la konstrupartoj sufiĉe lerte, ke ili ĉiuj sidas sur sia loko.

La domoj ĝenerale estas trietaĝaj. La etaĝoj estas aranĝitaj laŭ naturaj kondiĉoj kaj bezonoj de sekureco, sanigo, oportuno, komforto kaj aliaj. Pro la humida klimato en montregiono kaj por eviti bestan

Lignaj domoj de dong-oj



Ligna konstruaĵo en vilaĝo de dong-oj

atakon, la teretaĝo ne estas loĝata, sed uzata por bredi kortobirdojn kaj brutojn, teni pistujon, agrikulturilojn kaj aliajn. La mezetaĝo servas por manĝado, ripozo, manlaborado kaj akceptado de gastoj. Ĝi estas vasta, oportuna, aerumata kaj hela. En ĝi ĝenerale troviĝas koridoro al la vestiblo. Ekster la koridoro estas balustrado malpli ol unu metron alta kun benkoj ene. Tie ofte kolektiĝas la familianoj. Kiam alvenas gastoj, la mastro regalias ilin per aroma gluriza vino, acida fiŝaĵo kaj aliaj. Malantaŭ la vestiblo estas kuirejo kaj hejtejo. La tria etaĝo estas seka kaj aerumata. En ĝi estas greno tenejo, unu aŭ du ĉambroj kaj certa loko por sekigi rikoltaĵon.

Tiaj palafitaj domoj de dong-oj tenas la tradician ĉinan arkitekturon kaj havas evidentan nacian kaj lokan guston. La altkonstruaj plastiko kaj principo de han-nacio estis alprenitaj de dong-aj arkitektoj laŭ naciaj estetikaj postuloj kaj lokaj kondiĉoj. Kreive aplikante tiujn arkitekturajn principojn, la dong-oj formis sian nacian arkitekturan stilon.

Dingĝoŭ estas antikva urbo sur la Nordĉinia Ebenaĵo kaj ankaŭ naskiĝloko de ĉujge-aj muzikaĵoj. Legendo diras, ke Su Dongpo (1036 - 1101), literaturisto de Song-dinastio de Ĉinio, siatempe verkis komponaĵojn kaj tekstojn laŭ melodio de Dingĝoŭ. Tial oni nomis lin komponisto Su.


ĈUJGE-OJ DE DINGĜOŬ

de GAŬ KUĜOŬ

Ĉujge-o estas formo de prezentado de popolaj muzikinstrumentoj kun originala koloro kaj populariĝas en la tieaj vilaĝoj, inter kiuj plej vigliĝas tiurilate Ziŭej-vilaĝo. Ĝi havas ĉujge-grupojn de geknaboj, virinoj, junuloj kaj maljunuloj. Lernantoj ofte kunportas en sia librosako malgrandan gvanzi-on (speco de senklava klarneto) aŭ alispecan kaj ekludas ĝin en libera tempo. En ĉiu festotago oni ofte kolektiĝas por prezenti ĉujge-ojn. Tio jam fariĝis moro de tiu loko.

Nun oni jam surbendigis pli ol 40 muzikaĵojn de

LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Ĉinghaj-provinco 2. Ningŝja-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono 3. Anĵang 4. Suĝoŭ
5. Ljaŭĵang 6. Hunan-provinco 7. Gujĝoŭ-provinco 8. Gŭangŝji-a Gŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono

Dingĝoŭ-ĉujge-oj. Inter ili troviĝas “Azenopaŝtado”, “Jujubo-rikolto” pri kamparana vivo kaj kampa pejzaĝo, kaj ankaŭ “Tualeta Tablo”, “Gaja Printempo” kaj aliaj adaptaĵoj faritaj laŭ popolkan-
toj.

La trajtoj de -ĉujge-oj estas jene: Gvanzi-oj estas ĉefaj muzikiloj, kaj surnaoj, ŝeng-oj, flutoj, banhu-oj (dukorda muzikilo de Ĉinio) kaj aliaj servas kiel akompanaj muzikiloj. La ludantoj verve ludas kaj atentis pri-bela gusto. La melodioj prezentas lokajn morojn kaj havas fortan vivetoson.

Dum prezentado de ĉujge-oj ofte okazas interesaj spektakloj: Post prezento de peco da muzikaĵo, la ludantoj metas sian muzikilon flanken, sed el ilia buŝo aŭdiĝas plu strangaj sonoj. Ĉar sub la langoj de ludanto submetiĝas fajfilo el ladpecoj, kiuj eligas la sonojn. Aŭstralia esplorantino pri ĉinaj popolaj muzikinstrumentoj petis surnaoludanton Lĵang Pejĵin de Hebej fari prezentadon. Ŝi admire diris, ke ĝi estas la miriga muzikilo plej malgranda en la mondo.

IMPRESOJ DUM VOJAĜO EN ĈINIO



F-ino Sabira Stahlberg interparolas kun ĉina esperantistineteto.

Al Ĉinio mi ĉifoje venis sen konkretaj planoj. Mi ja sciis, ke precipe en Ĉinio plano neniam realiĝas se ĝi estas tro detala. La nura fiksita dato estis la 14-a de julio: Studado en la Lingva Instituto de Pekino.

Antaŭ mia foriro el Finnlando mi ofte rigardis mapon de Ĉinio, pripensadis kaj finfine elektis aron da urboj kiuj interesis min aŭ simple situis survoje al la sekva loko. Mi sendis kelkajn leterojn al dele-

gitoj kaj al la Ĉina Esperanto-Ligo. Tamen, en la trajno tra Siberio mi komencis dubi pri mia aventuro. Ĉu mia kuraĝo sufiĉus por pli ol tri monatoj? Kion mi faros se mi ne sukcesos trovi esperantistojn? Multaj konatuloj avertis, ke estas danĝere por junulino vojaĝi sola en vasta lando kiel Ĉinio. Kompreneble — kaj feliĉe — mi ne aŭskultis ilin.

Jam antaŭ du jaroj mi unuafoje vizitis Pekinon dum la 71-a Univ-

ersala Kongreso. Tiam mi ankoraŭ estis lerneano, en la lasta klaso, kaj mi devis decidi pri mia estonteco. Iom post iom mi komprenis, ke Ĉinio profunde impresis min kaj mia intereso pri Azio estis neneglektebla. Do mi elektis fakon nomatan Orientazia esplorado, t.e. Ĉinio, Japanio kaj Koreio. Mia dua vizito al Ĉinio estas parto de miaj studoj, ĉar mi specialiĝas en sinologio.

La 27-an de majo frumatene mi alvenis el frosta Siberio al la ŝvitiga Pekino. Gravis por mi nek homamasoj, nek la subita varmo. Mi nur ĝuis denove esti en Ĉinio. Mi eĉ havis kuraĝon bicikli en la ŝajne terura trafiko, kiu fakte iras glate kaj mi povis konstati ke biciklo estas la plej utila veturilo en Pekino.

Post kelktaga restado en Pekino mi ensaltis trajnon al Tjanĝin, granda kaj industria urbo, la “por-do al la ĉiela urbo”. Ankaŭ tie mi restis tri tagojn kaj sekve vojaĝis al Nankino, ĉe Jangzi-rivero. Nankino estas tre verda urbo kaj relative malgranda. Eĉ pli malgranda estas Hefej kie mi pasigis kelkajn varmegajn tagojn. Por pristudi la kamparanan vivon de Ĉinio mi vizitis agrikulturan universitaton en Jangling, oriente de Ŝji’an. Fine mi iris al la antikva, subĉiela muzeo Ŝji’an por propraokule vidi la miraklojn tre famajn. Mi reatingis Pekinon post tri semajnoj kun



F-ino Sabira Stahlberg (maldekstre) en la inaŭguro de "La Espero"

plenplena dorsosako.

Mi repakis iomete kaj povis vojaĝi al Ĉingdaŭ kun duone malplena sako. En Ĉingdaŭ okazis inaŭguro de la televida kurso "La Espero". Partoprenis eminentuloj ĉinaj kaj eksterlandaj, esperantistoj kaj neesperantistoj. Poste mi havis eblecon vojaĝi kun ili al Ĉjufu, la hejmloko de Konfuceo. La

grupo ankaŭ vizitis Tajŝan (ni grimpis nur parton kaj per kablakaro ni atingis la pinton) kaj Ĝjinnan. En Ĝjinnan nia grupo disiĝis kaj mi triafoje revenis al Pekino, denove kun tro plena sako.

Mi plurfoje dum ĉi tiuj vagadaj semajnoj konstatis, ke se oni volas lerni, oni devas sperti. Do mi vidis kaj la vivon de ordinaraj homoj

kaj la luksajn hotelojn. Pli kaj pli mi sentis ke estas malfacile diri ion ĝeneralan pri Ĉinio, ĉar abundas ne nur homoj sed ankaŭ diferencoj en ĉio.

Ŝajnas ke la ĉina socio antaŭe evoluis rapide, sed hodiaŭ ĝi eksplodas en ĉiuj direktoj. Esperanto estas parto de tiu tertremo. Mi renkontiĝis kun komencantoj, precipe gejunuloj. Ili estas tre aktivaj, sed pro manko de praktiko multaj ne estas motivigitaj perfektigi en Esperanto. Preskaŭ ĉie mi fariĝis vindindaĵo por gesamideanoj, kaj ili ĉiuj volis, pere de mi, altigi sian lingvokapablon. De esperantistoj mi ricevis valorajn informojn pri Ĉinio, kaj mi estas tre dankema al ili, ĉar ili havis tempon kaj paciencon respondi al miaj demandoj (kiuj ne estis malmultaj).

Nun, kiam mia vivo kiel vagabondo jam finiĝis kaj mi fariĝis Pekinano, ŝajnas al mi, ke mi trovis kaj novan laborkampon kaj amase da novaj geamikoj. Klopodante priskribi miajn spertojn mi jam eluzis kelkajn skribilojn kaj du notlibretojn. Sed por pli detale rakonti pri Ĉinio mi devus verki aron da dikaj libroj. Tion mi tamen lasos por la venonta fojo.

RADIO HAVANO KUBO ES- PERANTO ELSEN- DOJ

Ĉiudimanĉe horaro valida de 1988-11-07 ĝis 1989-03-04

HORO LAŬ UNIVERSALA TEMPO (UTC) FREKVENCOJ
(KHZ)

0800-0820 9520 POR OKCIDENTA, NORDA AMERIKOJ KAJ
PACIFIKA AZIO

1700-1720 15340/15230/11875/11760/11725/9550/6060 POR
NORDA, MEZA KAJ SUDA AMERIKOJ

1840-1900 15155/11950/11800 POR EŬROPO KAJ MEDITER-
ANEA REGIONO

2200-23 ERARO

2200-2220 15155/11950 POR EŬROPO KAJ MEDITERANEA
REGIONO

2240-2300 11970/11820/11795/6060/6025 POR NORDA, MEZA
KAJ SUDA AMERIKOJ

●En 1987 la eksterbuĝeta enspezo de Ĉinio atingis 202.8 miliardojn da jŭanoj, kun pliiĝo de 29.1 miliardoj da jŭanoj kompare kun tiu en 1986.

●La jara produktokvanto de fabrikoj el pura ŝaflano de Ĉinio

atingis 20 milionojn da tunoj. La eksporta valoro okupas la trian lokon en la mondo, post Hongkongo kaj Italio.

●Ĝis nun, la ĉina ŝipkonstrua servo kontraktis pri farado de eksportotaj ŝipoj kun kapacito de pli

ol 2.3 milionoj da toneloj, inter kiuj tiuj kun kapacito de 1.3 milionoj da toneloj estas transdonitaj al uzado. En 1988 oni mendis al Ĉinio tiajn ŝipojn kun kapacito de 0.4 miliono da toneloj.

●En 1987 la totala sumo por ĉinaj eksportaĵoj estis 34.6 miliardoj da usonaj dolaroj, 2.56-oble pli multe ol tiu en 1978 kaj 2.7-oble kiom en la periodo de 1949, kiam fondiĝis la nova Ĉinio, ĝis 1978, kiam Ĉinio ekpraktikis pordomalferman politikon al la eksterlando.

●De la fino de la nuna jarcento ĝis la komencaj jaroj de la venonta jarcento, Ĉinio asignos 11 miliardojn da jŭanoj kaj konstruos 9 grandajn hidroelektrajn sur Uĝjang-rivero, la plej longa branĉo de Jangzi en ĝia supra baseno, kun generatora kapacito de 8.5 milionoj da kW.

●Ĉinio finkonstruis en ultramalprofunda maro moveblan naptan putoboran platformon, la unuan en la mondo.


●Jangpu-haveno en la nordokcidenta Hajnan-provinco servos kiel "libera haveno" per libera komerco kaj garantio de la libera importado kaj eksporto de kapitaloj.

●Rapide disvolviĝas individua komerco en Ĉinio. La negocvaloro konsistigas 20% de la totala negocvaloro de socia detalado. La nombro de iliaj komercejoj superis 10 milionojn, kun 14 milionoj da laborantoj.


●En Ĉinio estas 400000 deficiitaj entreprenoj, inter kiuj 3/4 ne funkcias plu.

●La 7-an de septembro Ĉinio sukcese lanĉis la unuan eksperimentan meteorologian sateliton,

En la Nankina Lan-teksa Fabriko



118000-tonela cisternŝipo konstruata de la Daljan-a Ŝip-farejo por Norvegio



kiu eniris la sun-sinkronan orbiton, kun la aparatoj funkciantaj normale.

●Lastatempe la usona registaro sankciis, ke Hughes-kompanio kaj aliaj lanĉos tri telekomunikajn satelitojn per ĉinaj raketoj.

●Vicprofesoro Ŝju Ĵongŝjang de la Ĝuangming-a Ĉin-medicina Instituto pri Brulvundo kaj Traŭmato en Pekino aplikis novan terapion. Dank' al ĝi, la vundo estas humida, sendolora kaj seninfekta, kaj postlasas nenian cikatron post ĝustatempa kuracado.

●De la 1-a de oktobro 1988 la oficiroj kaj soldatoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo portas novajn uniformojn ornamitajn de insignoj pri militistaj rangoj. Tio estas grava enhavo de la nova sistemo pri militistaj rangoj por la armeo. La rangoj por oficiroj dividiĝas en tri gradojn kaj 11 klasojn. Rangoj por generaloj: unuaklasa arma generalo, arma generalo, korpusa generalo kaj divizia generalo. Rangoj por koloneloj: plej supera kolonelo, supera kolonelo, kolonelo kaj subkolonelo. Kaj rangoj por la plej malaltrangaj oficiroj: kapitano, leŭtenanto kaj subleŭtenanto.

●La ceremoniaro de Ĉinio estas reformita. Unu el la novaj reguloj estas, ke oni ne regalu per fortaj brandoj, inkluzive de Maŭtaj-brando, en la naciaj festenoj.


●En Ŝanhajo funkcias 17 hejmuzeoj. Ili estas muzeoj de horloĝoj, kalkuliloj, tetrinkiloj, pluvfloraj agatoj k.a.

●Proksime de Ĝjajugŭan-pasejo de Gansu-provinco, Ĉinio, antaŭ nelonge malfermiĝis glaĉera turisma loko kun areo de 3 kvadrataj kilometroj je 4200 metroj alta super la marnivelo.

●En Langou en la supra baseno de la Flava Rivero estas malkovrita safiro peza je 18 kg. Ĝi estas rekonata kiel unu el la sep multe-



Ĝaŭ Zijang, vicprezidanto de la Centra Milita Komisiono, donas al superaj oficiroj konfirmilon pri milita rango de generalo.



Frosta turisma loko ĉe Ĝjajugŭan

kostaj ŝtonoj en la mondo.

●Deng Ŝiŭhu, instruisto en mezlernejo de Siĉŭan, penike transskribis 4712 ĉinajn poemojn kun pli ol 100000 ideogramoj sur ventumi-

lo longa je 30 cm.

●Antaŭ nelonge ĉina knabino Peng Li gajnis la unuan lokon en la Konkurso pri Nunaj Novaj Internaciaj Modelinoj de 1988 okazinta en Italio.

ĈARMA PEJZAĜO DE LUŜAN-MONTO

de MEJ ĜJI

Luŝan-monto sude de la urbo Ĝiŭĝjang estas unu el la famaj vidindejoj de Ĉinio. Ĝi staras sude de Jangzi-rivero. La belaj vidaĵoj, agrabla klimato, imponaj akvofaloj, varia nebulo ĉiŭ forte altiras al si turistojn.

AGRABLA MONDO

En Luŝan-monto la klimato estas tiu de humida subtropika zono. La jara meznombra temperaturo estas 11.4oC, la plej alta temperaturo 32oC. Tie somero ne estas varmega, tial Luŝan-monto de ĉiam estas somerumejo.

Mi ekveturis per plezuraŭto de Ĝiŭĝjang al Luŝan-monto en sufoke varma vespero. La tuttage sunumita urbo elspiris varmecon. Nia aŭto, rapide elirinte el la urbo, veturis sur ebena ŝoseo inter ondantaj montaroj. Venteto de tempo al tempo blovis internen de la aŭto, kio sentigis refreŝigan kaj kvietan agrablecon.

Sur la supro de Luŝan-monto estas multe pli agrable ol en ĝia malsupro. Dum mia restado sur la monto estis eĉ pli malvarmete pro plurtaga pluvado. Montanoj diris al mi, ke sur la monto printempo

venas pli malfrue je du monatoj. Baj Ĝjuji (772-846), granda poeto de Tang-dinastio, verkis poemon pri tio: "En majo, malsupre la floroj jam tute velkiĝis, en templo surmonta jen floroj persikaj ekpompas." En varma somero la temperaturo sur la monto ĝenerale estas je 7-8oC pli malalta ol tiu ĉe la montpiedo. Tiam ĉe la montpiedo regas sufoka varmo, dum sur la monto malvarmeto.

INTERMONTA URBETO

La turistoj, unuafoje vizitantaj Luŝan-monton, havas impreson, kvazaŭ ili estus en intermonta urbeto. Tie estas la Bubala Urbeto, la servocentro de Luŝan kaj ankaŭ loĝloko de la pli ol 10000 laborantoj kaj iliaj familianoj. En la urbeto sterniĝas bonorde stratoj, funkcias diversaj restoracioj kaj hoteloj kun pli ol 20000 litoj. La turistoj neniam maltrankviliĝas pri loĝado en Luŝan. Sur Luŝan-monto etendiĝas ŝoseoj en ĉiuj direktoj, kaj oni povas atingi ĉiun ajn vidindaĵon per aŭto.

La montanoj diras, ke la urbeto similas al bubalo, tial oni nomas la monton Bubala Monto kaj la urbeton Bubala Urbeto. Mi plurfoje surgrimpis proksiman monton kaj aprecis la urbeton, sed mi neniel povis konstati, ke ĝi similas al bubalo. Tie vidiĝas nur vilaoj kun ru-



ĝaj tegmentoj kaj ruĝaj muroj inter montĉenoj, kiuj jen aperas jen malaperas en maldika tavolo da nebulo. Tie oni sentas sin kvazaŭ en fabela mondo.


JANGZI-RIVERO EN MAL-PROKSIMO

La pejzaĝo de Luŝan-monto formiĝas el du partoj: Ŝjigu-valo okcidente de la Bubala Urbeto, inkluzive de Ĝinsiŭ-valo, la Flora Vojeto, Liut-simila Lago, Granda Ĉiela Lago kaj Drakkapa Krutaĵo, kaj Donggu-valo, inkluzive de Pojang-entena Buŝo, Botanika Ĝardeno, Pintaro de Kvin Maljunuloj kaj Tritavola Fonto.

La Flora Vojeto estas tre kvieta ĝardeno. Printempe tie pompas floroj nazfrappe aromantaj. Laŭdire, la poeto Baj Ĝjuji verkis versaĵon pri floroj en la loko kaj pro tio ĝi ricevis la nomon. Ekster la pordo de la ĝardeno troviĝas klara lago, en kiu estas kiosko. La lago similas al antikva ĉina liuto, tial ĝi ricevis la nomon Liut-simila Lago. Sur la bluverda akvo turistoj remis kaj de tempo al tempo aŭdiĝis ridado.

Flanke de la Liut-simila Lago estas Ĝinŝiŭ-valo longa je pli ol unu km. En la valo ĉarmas pejzaĝo, kuŝas groteskaj rokoj kaj serpentas zigzaga vojeto. Enirinte en la valon la turistoj senescepte ĝuigas al siaj okuloj variajn vidindaĵojn.

La Pojang-entena Buŝo ricevis sian nomon pro tio, ke la montaro prenas la formon de buŝo, kvazaŭ ĝi prenis iom el la akvo de Pojang-lago oriente. Ĝi estas bona loko rigardi sunleviĝon de oktobro ĝis majo de la venonta jaro. Dekstre de Pojang-kiosko staras la Granda Hanjang-pinto, la plej alta pinto de Luŝan-monto, kaj maldekstre de ĝi -- la Pintaro de Kvin Maljunuloj. La lasta havas formon de kvin malsampezaj maljunuloj. Mi antaŭeniris laŭ la pado flanke de la Pojang-entena Buŝo



grimpado

kaj atingis la unuan pinton de la pintaro kaj poste la duan. La pintaro estas timinde grandioza kaj apika. Sur apika rokmuro de la dua pinto kreskas verda pino. Ĝi kvazaŭ bonvenigas la turistojn per sia etendita frondaro, tial oni nomas ĝin Gastobonveniga Pino.

Sur Luŝan-monto troviĝas ankaŭ aliaj vidindejoj, kiel la Malgranda Ĉiela Lago. Laŭdire, la akvo en ĝi estas magia. Kvankam seka, tamen ĝi ne estas senakva; kvankam la lago estas plenplena de akvo, tamen ĝi ne superfluas. Ĝi ricevis sian nomon pro tio, ke ĝi estas malpli granda ol la Granda Ĉiela Lago en Ŝjigu-valo. Proksime, sude de la lago, staras malgranda kiosko kun ruĝa tegmento, kiu nomiĝas Riverrigarda Kiosko. Iun vesperon, la subiranta suno radiis ĉe la horizonto, la vesperruĝo ŝvebis en la ĉielo. Rigardate de la kiosko al la montmalsupro, Jangzrivero aspektis kiel blanka rubando kaj arĝente radiis en la suno.

LA TRIŜTUPA AKVOFALO

Luŝan-monto abundas je akvofaloj, el kiuj la Triŝtupa Akvofalo estas la plej spektakla. Enprenante en sin la falakvon el la Pintaro de Kvin Maljunuloj kaj Dajŭe-pinto, ĝi falas en tri ŝtupoj, kun maksimuma niveldiferenco de 120 metroj.

Atinginte la piedon de la Pintaro de Kvin Maljunuloj kaj daŭre irinte ŝanceliĝe parton da tervojo, nia aŭto ne povis antaŭeniri plu. Elaŭtiĝinte mi piediris tra larĝa kampo pavimita per ŝtonetoj kaj surgrimpis monton laŭ ŝtonŝtuparo. Sur la monto ombraj densaj arboj kaj lirlas fonto klara, dolĉa kaj pura. Turistoj soifantaj de irado kaj varmeco, vidinte la fonton, alkuris kaj sate trinkis el la akvo.

Estas tre penige surgrimpita la Triŝtupa Akvofalo. Por atingi la montsupron oni devas grimpi laŭ pli ol 900 ŝtonŝtupoj. Atinginte la montsupron, mi jam ekanhelis. Poste mi alvenis al la duaŝtupa

teraso de la fonto. Tie oni povas apreci akvofalojn de la unua kaj dua ŝtupoj.

De la dua ŝtupo ne plu estas vojo por antaŭeniri kaj turistoj devas halti. Tamen, grimpante per la manoj kaj piedoj tra la arbetaĵo sur la montodeklivo, mi atingis la montpiedon fronte al la Triŝtupa Akvofalo. Jen prezentiĝis antaŭ mi la panoramo de la fonto. La akvofalo de sur alta krutaĵo falas malsupren tra la tria ŝtupo en la Drakan Lageton. La disŝprucigitaj akveroj en kontinua tuto aŭdigas teruran bruon.

Nur tiam mi ekkomprenis la diron de la Luŝan-anoj: "Ne veninte al la Triŝtupa Akvofalo, oni ne vidas la veran ĉarmecon de Luŝan-monto."


LUŜAN-MONTO EN NEBULO

En la sekva tago post mia alveno al Luŝan-monto, la ĉielo nubigis. En la postaj 7-8 tagoj preskaŭ ĉiutage regis nebulo aŭ pluveto.

La nebulo de Luŝan estas vidindaĵo propra al ĝi. Ĉ. 190 tagoj en la jaro estas nebulaj. En majo estas meznombro 21 nebulaj tagoj. Ĝenerale, julie ne multas nebulo, tamen julie ĉijare ne mankis nebulaj tagoj tie.

Luŝan en nebulo estas aparte interesa. Iutage ni devis resti en pasloĝejo pro tro densa nebulo. Subite aŭdiĝis kriego kaj mi rigardis eksteren. Mi vidis kolonojn da blanka nebulo ŝvebante eniri nian ĉambron kiel feinoj descendantaj de la ĉielo. Mi admiris la magiecon de la nebulo de Luŝan.

La nebulo de Luŝan, varia kaj diversforma, de tempo al tempo kovras la montan pejzaĝon per mistera koloro. Iutage mi vizitis Ĝinŝiŭ-valon. Kiam mi atingis la valon, prezentiĝis antaŭ la okuloj la ĉirkaŭa bela montaro, sed en palpebruma daŭro nebulpecoj levigis unuj post aliaj de la fundo, kiel




La Drakkapa Krutaĵo

sovaĝaj ĉevaloj galopantaj al la montsupro. Subite fariĝis apenaŭ videbla la monta pejzaĝo. Ankaŭ la turistoj estis ĉirkaŭitaj de nebulo kaj ne povis klare vidi unu alian. Kiam la nebulo iom disiĝis, la montsupro elstariĝis kvazaŭ insuleto en maro.

Kelkiam nebulo de Luŝan kiel grandioza akvofalo torentas malsupren de sur la montpinto. Tie iam aperas mirakla spektaklo de akvofala nuboj, longa je kelkaj kil-


ometroj, kiu muĝante falas al la valo. La nebulo kovras la sunon, kaj ekster ĝi estas la blua ĉielo. La nuboj brilanta en la suno formas belan spektaklon.

Allogate de la nebulo, mi plurfoje sidis senmove sur unu vidindaĵo ĉ. du horojn por rigardi ĝian ŝanĝiĝadon. La nebulo jen densiĝis jen maldensiĝis, jen kiel feraĵo besto englutanta la tutan mondon, jen kiel flirtanta feino. Vere ĉarma estas Luŝan-monto en nebulo!



La Riverrigarda Kiosko en malproksimò





La Pojang-entena Bušo

Turistoj sur la Pintaro de Kvin Maljunuloj






Pado inter abioj

La Liut-simila Lago en matena nebulo




Sendinto:

Adreso:



REDAKCIO DE EL POPOLA ĈINIO
P. O. KESTO 77
PEKINO, ĈINIO



KONKURSO DE EPĈ-AMIKOJ

Karaj amikoj,

En la unua numero ĉijare la redakcio informis, ke ĝi okazigos decembre de 1988 konkurson de EPĈ-amikoj. La konkurso destinas premiojn en tri klasoj, kaj ĉiuj respondantoj al la testo, kiuj ne estis premiitaj, ricevos memoraĵon. Jene estas 20 demandoj por la testo. Bonvolu substreki la ĝustan solvon kaj elsendi vian respondon antaŭ la 15-a de februaro de 1989 (laŭ la vialoka poŝtoŝtampa datstampo). Respondo post la dato estos senvalida. Certan sukceson al vi en la konkurso.

La Red.

1. (a. Ĉengdu, b. Ĉongĉing aŭ c. Leŝan) estas la plej granda ekonomia kaj komerca centro kaj grava nodo de surakva trafikado ĉe la supra baseno de Jangzi-rivero.
2. La plej granda ĉina olekampo (a. Dagang, b. Ĝongjŭan aŭ c. Daĉing) situas en la provinco Hejlongĝjang de nordorienta Ĉinio.
3. En la reformado la ĉina planizita ekonomia sistemo estas transiranta al la (a. merkata ekonomio, b. planizita ekonomio aŭ c. planizita kaj merkata ekonomio en kombino).
4. La provinco, kiu plej multe utiligas fremdlandajn kapitalojn, estas (a. Ĝjansu, b. Ĝuangdong aŭ c. Ŝandong).
5. La ĉina filmo (a. "Malnova Puto", b. "Ruĝaj Sorgoj" aŭ c. "La Urbeto Fuĵong") gajnis la premion de Ora Urso en la 38-a Internacia Filma Festivalo de okcidenta Berlino.
6. Antaŭ (a. 500, b. 1000 aŭ c. 2000) jaroj jam aperis akrobataĵo en Ĉinio.
7. La reprezentantaj pejzaĝaj kaj idiliaj poetoj de Tang-dinastio (618-907) estis (a. Gaŭ Ŝi kaj Li Baj, b. Ŭang Ŭej kaj Meng Haŭĵan aŭ c. Ŭang Ŭej kaj Du Fu).
8. (a. Baj Ĝjuji, b. Han Ju aŭ c. Du Fu) gvidis la movadon de nova Ĵuefu, kiu grave influis la historion de la ĉina literaturo.
9. (a. Zigong, b. Ĝoŭkoŭdjan aŭ c. Ĉangŝa) estas nomata hejmloko de Dinosauroj.
10. La plej malalta loko en Ĉinio estas la baseno (a. Ĉajdam, b. Turpan aŭ c. Ĝungar).
11. La plej granda sala lago en Ĉinio estas la lago (a. Ĉinghaj, b. Ĉaka aŭ c. Ajding).
12. Laŭ la plej freŝa malkovro de ĉinaj arkeologoj, la ĉina civilizacio komenciĝis en la dinastio (a. Jin, b. Ŝja aŭ c. Ĉin).
13. (a. Bajoroj, b. Bulangoj aŭ c. Ĝingpooj) en la provinco Junnan havas feston de Sun-bonvenigo en aprilo.
14. Oni devas uzi poton el (a. fero, b. fajenco aŭ c. aluminio) por dekolti drogojn de ĉina medicino.
15. En 1988 (a. 11, b. 12 aŭ c. 13) sportistoj de Ĉinio, Japanio kaj Nepalo surgrimpis Ĉomolangma de ambaŭ flankoj.
16. En aprilo de 1988 la Tria Azia Ĉampioneca Konkurso de Naĝado okazis en (a. Ŝanhajo, b. Pekino aŭ c. Kantono).
17. (a. Pekino, b. Uhan aŭ c. Ŝanhajo) estis la lulilo de ĉina Esp-movado.
18. En 1988 Ĉinio faris (a. 1, b. 2 aŭ c. 3) televida(j)n filmo(j)n por Esp-instruado.
19. (a. 1, b. 2 aŭ c. 3) el la 45 akademianoj de Esperanto estas ĉino(j).
20. En aŭgusto de 1988 la Dua Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto okazis en (a. Ŝanhajo, b. Pekino aŭ c. Tjanĝin).

Ĉiu ĝusta respondo gajnos 5 poentojn kaj la kompleta plenigo de la testo gajnos 100 poentojn.

Nomo:

aĝo:

profesio:

Adreso:

ANJANG, LA UNUA ANTIKVA ĈEFURBO DE ĈINIO

En Ĉinio estis sep antikvaj ĉefurboj: Pekino, Ŝj'an, Lŭojang, Kajfeng, Nankino, Hangĝoŭ kaj Anjang. La ruinoj de Ŝang-dinastio ĉe Anjang estis la sidejo de la plej frua antikva ĉefurbo de Ĉinio laŭ kronikita historio.

En la jaro 1387 a.K. Anjang fariĝis la ĉefurbo de Ŝang-dinastio (komence de la 17-a jc.--la 11-a jc. a. K.).

Anjang situas en norda Henan-provinco, la Flava Rivero ŝirmas ĝin en la sudo kaj Tajhang-montaro staras en ĝia okcidento. Tie fekundis la tero kaj mildis la klimato. Ŝang-dinastio prenis Anjang kiel sian ĉefurbon dum 273 jaroj ĝis sia pereco.

Osto kun skribo elterigita en Jin-ruinoj



SKRIBOJ SUR TESTUDAJ ŜELOJ KAJ OSTOJ EN JIN-RUINOJ

Anjang kiel la ĉefurbo de Ŝang-dinastio estis konstatita de granda kvanto da elterigitaj testudaj ŝeloj kaj ostoj kun surskribo, delikataj bronzaĵoj kaj aliaj historiaj objektoj ĉe Jin-ruinoj apud la urbo.

Fine de la 19-a jarcento, ĉina fakulo pri skribo sur antikvaj bronzaĵoj Ŭang Jifong trovis gravuritan skribon nekonatan sur ĉina drogo "drakaj ostoj" fosiliaj ostoj de vertebruloj. Post esplorado li kaj liaj kolegoj konstatis, ke tiuj ostoj estas testudaj ŝeloj kaj bovaj skapoloj kaj la skriboj sur ili estas antikvaj skriboj.

La sklavaj mastroj de Ŝang-dinastio estis tre superstiĉaj kaj opiniis, ke ĉio en la mondo estas decidita de Dio. Tial ili aŭguris por informiĝi pri dia volo kaj gravuris la enhavon kaj rezulton de aŭguro sur testudaj ŝeloj aŭ bovaj skapoloj. Kaj pro tio oni nomas ankaŭ la skribon orakola skribo.


El Jin-ruinoj elteriĝis pli ol 160000 pecoj de testudaj ŝeloj kaj ostoj, kiuj plejparte konserviĝas en Ĉinio kaj la aliaj en muzeoj kaj ĉe privataj personoj de Usono, Japanio, Germanio, Kanado k.a. Sur tiuj testudaj ŝeloj kaj ostoj gravuriĝis 4500 hieroglifoj, kies kvarono estas nun legebla.

La apero de hieroglifoj markis la eniĝon de la homa socio en la civilizacian tempon. La skriboj sur testudaj ŝeloj kaj ostoj atingis sufiĉan perfektecon en sia disvolviĝo. Ili havis fundamentan formon de la postaj ideogramoj kaj gramatiko de Han-lingvo en strukturo kaj servis al komunikado kaj akumulo de scioj. La skriboj multe akcelis la disvolviĝon de antikva Ĉinio kaj konadon de la historio de Ŝang-dinastio.

La orakola skribo registris diversajn okazajn: aktivadoj de la reĝoj en malsama tempo kaj la ekonomio kaj socia vivo, inkluzive de kulto, rikolto, milito, kalendaro, sun- kaj lun-eklipsoj, kometo, vetero kaj malsanoj.

OFERAJ KAVOJ KAJ MALLIBEREJO

La sklavaj mastroj kruele traktis la sklavojn. La



Ruino de Joŭli

nobeloj de Ŝang-dinastio okazigis oferadon por ĉiu grava aktivado. Ĉe ĉiufoja oferado estis mortigita granda nombro da sklavoĵoj. En 1976 oni trovis en Jin-ruinoj grandan oferkampon kun areo de dekmi-
loj da kvadrataj metroj. Nun oni prifosis areon de 4700 kvadrataj metroj kaj trovis 250 oferaj kavoj. 1178 skeletoj estis elterigitaj el 191 kavoj. Nun la loko estas malfermita kiel ekspoziciejo. El multaj prifositaj aliaj tomboj en Jin-ruinoj oni vidis ankaŭ postsignojn de enterigo de vivantoj, mortigitaj kaj oferado per homoj. Tiuj viktimoj estis sklavoĵoj.

15 km sude de Anjang estas la ruino de Joŭli, malliberejo de Ŝang-dinastio. Legendo diras, ke la lasta reĝo Ĝoŭ de Ŝang-dinastio malliberigis sian politikan rivalon Ĝji Ĉang' la regnestro Ŭen de Ĝoŭ je 7 jaroj. Poste lia filo renversis Ŝang-dinastion kaj starigis la Okcidentan Ĝoŭ-dinastion (la 11-a jc.--771 a.K.). En la ĉina kronikita historio Joŭli estis la unua ŝtata malliberejo.

DELIKATAJ BRONZAĴOJ

La bronzaĵoj elterigitaj el Jin-ruinoj atingis altan nivelon. Tiam oni povis pliigi aŭ malpliigi la proporcion de kupro kaj stano laŭ postuloj de malsamaj objektoj. El la bronzaĵoj de Ŝang-dinastio vidiĝas ne nur rondaj kaj kvadrataj, sed ankaŭ bird- kaj bestformaj. Sur ilia parieto veziketoj estas malfacile troveblaj kaj la ekstera surfaco surhavas klarajn kaj delikatajn desegnojn. Inter la elterigitaj objektoj estas forme majesta oblonga ding-o (kuirilo) kun alto de 133 cm, longo de 110 cm kaj larĝo de 78 cm, kiu pezas 875 kg kaj estas la plej granda el la bronzaĵoj elterigitaj en Ĉinio.

Inter la elterigitaj objektoj troviĝas ankaŭ diversaj fajencaĵoj, kiaj kruĉo, vazo, kuvo, pleto, vinujo k.a. Iuj el ili estis glazuritaj. Ili estis faritaj el kaoli-

no kaj poste bakitaj en temperaturo de 1050-1150° C. Krome, vidiĝis tie ankaŭ objektoj ŝtonaj, jadaĵoj kaj ostaj kun tre alta valoro de arto.

Oni malkovris en Jin-ruinoj multajn konkvojn, kiuj estis monoj por varo-interŝanĝo. Tio montras, ke floris siatempe komerco en la urbo.

SENDIFEKTA TOMBO DE REĜA EDZINO

En 1976 oni prifosis tie la tombon de Fuhaŭ, la edzino de Uding, reĝo de Ŝang-dinastio. Ĝi estis unika bone konservita el la tomboj de la reĝa familio de Ŝang-dinastio en la ruinoj.

Uding estis la plej kompetenta reĝo de Ŝang-dinastio. Li regis 59 jarojn. Fuhaŭ estis lia edzino plej favorata. Ŝia nomo aperis ofte en orakolaj skribaĵoj. Ŝi plurfoje gvidis armeon al ekspedicia milito. Foje ŝi komandis armeon el 13000 soldatoj kaj faris militon kontraŭ Ĉjangfang.

La tombo estas oblonga. Ĝia aperturo longas 5.6 m de norde suden, larĝas 4 m de okcidente orienten kaj altas 7.5 m. En la orienta kaj okcidenta muroj de la aperturo alta je 6.2 m estas niĉoj, en kiuj oni enterigis akompanajn homojn. En la fundo de la tombo estas kavoj, kie oni enterigis unu akompanan homon kaj unu hundon. Sur la tombo staris kulta halo oblonga kun longo de 5.5 m kaj larĝo de 5 m.

En la tombo estis enterigitaj 16 homoj, 6 hundoj kaj 1928 entombigitaĵoj, inter kiuj estas ŝtonaj kaj gemaj objektoj, bronzaĵoj, ostaĵoj, jadaĵoj kaj eburaĵoj. Multaj el ili surhavas epigrafojn.

LA ANTIKVA URBO HODIAŬ

Post Ŝang-dinastio pliaj ses dinastioj prenis Anjang kiel sian ĉefurbon. Anjang estis ĉefurbo dum 399 jaroj. Tie troviĝas ne nur elterigitaj historiaj objektoj de Ŝang-dinastio, sed ankaŭ multaj historiaj restaĵoj, kiaj prahoma groto ĉe Ŝjaŭnanhaj, Ŝiŭdingsi-pagoda brikgravuraĵo de Tang-dinastio (618-907), ŝtonkaverno kaj ŝtongravuraĵoj de la Norda Ĉji-dinastio (550-577) sur rokmuroj de Ŭanfovalo.

Antaŭ nelonge oni konstruis Jin-ruinan Muzeon ĉe la ruino-protekta regiono de Ŝang-dinastia ĉefurbo. Tie oni povas vidi tri palacajn konstruaĵojn similajn al tiuj de Ŝang-dinastio. Unu el ili estas la kulta halo por Fuhaŭ.

Anjang estas difinita kiel fama historia kultura urbo de Ĉinio kaj ankaŭ nova urbo ĉefe kun ŝtala, elektronika kaj tekstila industrioj.

Parto da varoj de Anjang vendiĝas jam en internacia merkato. La eksportita kvanto de la bicikloj "Fejĵing" produktitaj de la Anjang-a Bicikla Kompanio en la unuaj ok monatoj de 1988 konsistigis kvaronon de la eksportitaj bicikloj de Ĉinio en la sama tempo kaj havas grandan debiton en la eŭropa kaj amerika merkatoj.

Nova aspekto de Anjang

Fotoj de LI ZIŠING




Parto de Anjang



Strato





Reliefoj en la templo Lingĉjūan



En parko

La antikva pagodo Ŭenfeng




En bicikla fabriko

ĈINAJ POŝTMARKOJ

Poŝtmarkaj blokoj el kvin pecoj

de LJAŬ T'JAN



Elia ĉinaj poŝtmarkoj estas blokoj el tri aŭ kvin pecoj. Jen tri blokoj, ĉiu el kvin specialaj poŝtmarkoj. La bildoj estas kunmetebaj. Ĉiu peco prezentas sendependan scenon. Ĉiuj pecoj interligitaj formas kontinuan tuton, kio bone konigas la enhavon de rakonto.

Supre: la bloko "Nova aspekto de Akvolando" (T.34) emisiita la 30-an de novembro 1987. Meze: la bloko "Produktado de Kemfibroj" (T.25) emisiita la 15-an de junio 1978. Malsupre: la bloko "Fari Signon sur Iranta Boato por Poste Trovi Enakvigintan Glavon" (T.59) emisiita la 10-an de marto 1981.